

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

5


1980



**Speciala  
numero**

**por la 30-jara  
jubileo de EPĈ**






La Ĉina Esperantista Delegacio al la 63-a UK kune kun la mondfama sempatologo d-ro Paul Neergaard kaj ĉefdirektorino de JEI s-rino Iso-be en Varna de Bulgario, 1978

# Amikeco inter esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj

Nia islanda leganto s-ro Ragnar kune kun Beijing-aj esperantistoj ekskursas al Xiangshan-parko.





Niaj usonaj legantoj ges-roj Frost vizitis Beijing en 1978.

Nia sveda leganto S. W. Ahlm en Beijing



La Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPC-amikoj kaj ĉinaj esperantistoj en amuzkunveno, 1978





La supraj Esperantaj libroj estas nove eldonitaj kaj represitaj de Ĉinio. Vidu detalojn pri ili en tiu ĉi numero.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Por la 30-jara jubileo de EPC

### BILDPAĜOJ:

#### 1 KOLORA SERIO

Amikeco inter esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj

#### 2 NIGRA-BLANKA SERIO

- (1) Dan en la Pekina Opero
- (2) En la redakcio de EPC

#### 3 KOLORA SERIO

La Sep Steloj-rokoj

#### 4 NIGRA-BLANKA SERIO

- (1) Patrino kaj ŝia fileto sur la Tibeta Altebenaĵo (Skulptaĵo)
- (2) Kaligrafado kaj pentrado de amatoroj

#### 5 KOLORA SERIO

- (1) Fotografiaj verkoj de esperantistoj
- (2) Muro kun pentraĵo

### SUR LA DORSKOVRILO:

Montvilaĝo (Ĉinstila pentraĵo)

Retrospektivo kaj perspektivo . . . . .	2
30 jarojn kune kun EPC . . . . .	3
GRATULOJ DE AMIKOJ:	
Gratulo al la 30-a datreveno de la fondiĝo de El Popola Ĉinio . . . . .	5
Grava ŝanĝo al El Popola Ĉinio . . . . .	6
El popolo al popolo . . . . .	7
Kion "El Popola Ĉinio" signifas por nederlanda leganto? . . . . .	8
Espero de ĉina erudiciulo . . . . .	9
Esperanto — ponto de amikeco kaj kultura interŝanĝo . . . . .	10
Pri la ĉina Esperanto-movado en la pasinta jaro . . . . .	12
Esp-Novajoj . . . . .	14
PAGO DE RADIO PEKINO: Nia esperanta disaŭdiĝo . . . . .	16
Por vestoj de 900-miliona loĝantaro . . . . .	17
Ŝanĝiĝo de Xigou-brigado . . . . .	20
Knabinoj tefoli-kolektantaj . . . . .	23
Plej elstaraj sportistoj de Ĉinio . . . . .	24
VIDINDAJ LOKOJ: La Sep Steloj-rokoj . . . . .	26
Ellogo el la domo (humoraĵo) . . . . .	28
60 jarojn en Beijing . . . . .	29
Sciencistino Lin Lanying . . . . .	32
En korto de Beijing . . . . .	34
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	37
Religioj en Ĉinio . . . . .	38
Komponisto Lü Yuan . . . . .	41
Tintsonoras Fonto (Soprana solo) . . . . .	42
Flutado de cervopaŝtistino . . . . .	44
KULTURAJ NOTOJ . . . . .	46
EN REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Gejunula rajdludo de kazaĥoj . . . . .	48
Karikaturo . . . . .	49
Kiu estis la unua vojaĝisto al Meksikio? . . . . .	50
TRA LA MONDO . . . . .	52
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	53, 55
POR INTERKOMPRENIGO . . . . .	54
Novaj Esperantaj libroj de Ĉinio . . . . .	55
Favorajn kondiĉojn profitu! Abonu kaj abonigu! . . . . .	56

Generala distribuanto: Esperanta  
Sekcio de GUOZI SHUDIAN  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Retrospektivo kaj Perspektivo



La Redakcio de EPĈ

“El Popola Ĉinio” naskiĝis en majo antaŭ 30 jaroj. Tio okazis nur iom pli ol duonjaron post la fondiĝo de la nova Ĉinio — la Ĉina Popola Respubliko.

La fondiĝo de la nova Ĉinio markis, ke la antikva nacio eniris novan historian periodon. Kvankam Ĉinio estas fame konata tra la mondo pro sia brila antikva kulturo, tamen en la lastaj ĉ. cent jaroj antaŭ 1949 ĝi fariĝis simbolo de malriĉeco, malsato, postĝinteco kaj malklereco. Sed la ĉina popolo, kiu vivis longtempe en abismo de mizero, finfine forskuis la pezan jugon de sur sia korpo post refleksebla batalado. Ĝuste kiel Napoleono diris, Ĉinio subite vekigis kiel leono post miljara dormado. Tio estis rigardata kiel historia “miraklo”. Kiel aperis tiu ĉi “miraklo”? Kian signifon ĝi havas al la evoluo de la homa socio? . . . Tiuj ĉi problemoj ne povas ne vekii atenton kaj intereson ĉe la publiko. Aliflanke, la nove naskita Ĉinio estis aklamita de la popoloj tra la mondo. Ili donis entuziasman simpatian kaj fortan subtenon al la ĉina popolo multe suferinta kaj brave batalinta, kaj rigardis ĝian venkon kiel la sian. Ili esperis informiĝi, kiel la ĉina popolo kreas sian novan landon, kian rolon ĝi ludos sur la monda scenejo, kian influon ĝi donos al ili en la nuno kaj estonto . . .

Ĝuste sub tia historia fono, la ĉinaj esperantistoj daŭrigis la gloran tradicion servigi Esperanton al la popolo kaj konsciante sian mision en la nova historia periodo, fondis tiun ĉi esperantan gazeton kiel kanalon por konigi la novan Ĉinion al la popoloj de diversaj landoj kaj plifortigi amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Tuj je la ekapero, nia revuo estis aklamita de esperantistoj de la mondo. Ili ne nur legis ĝin kun granda intereso, sed ankaŭ ĝin recenzis kaj peris kaj repensis aŭ tradukis ĝiajn artikolojn, ĉio ĉi tio donis al ni grandan helpon kaj inspiron. Dank’ al la amika kunlaboro de multaj fervoraj amikoj, EPĈ fariĝis unu el la revuoj ŝatataj de diverslandaj esperantistoj kaj progresas kun la tempo.

Tamen, ĉiu afero en la mondo neeviteble iras neglatan vojon, ankaŭ nia gazeto trapasis zigzagan vojon en siaj pasintaj 30 jaroj. Unue, ĝia eldono ĉesis pro ia kaŭzo en 1954. Estis feliĉe, ke la vaka tempo daŭris ne tre longa. En 1957, kun nova vervo ĝi reaperis. Des pli ĉagrenaj kaj doloraj estas la okazintaĵoj en la 10 jaroj ekde 1966. Dum tiu periodo la “kvarpersona bando” portis al la ĉina popolo senprecedencan plagon. Kvankam EPĈ ankoraŭ eldoniĝis tiam, tamen ĝi deviis de sia difinita redakta

principo. Ĝia enhavo estis vanta kaj la lingvo seka. Tio kaŭzis malkontenton de legantoj. Ili bedaŭris, ke nia faro vanigis ilian esperon. Ili soife esperis, ke ĉinaj esperantistoj povos iutage turni EPĈ en vere valoran esperantan revuon.

Estis ĝojinde, ke finfine venis tiu tago.

Post falo de la “kvarpersona bando”, Ĉinio eniris novan historian etapon. La ĉina popolo refoje kun plena memfido volas krei belan estontecon. Ĝi decidis modernigi sian landon en industrio, agrikulturo, nacidefendo, sciencoj kaj teknikoj, multe levi sian nivelon de sciencoj kaj kulturo kaj senlace klopodi por defendi la mondpacon.

Ĉinio estas lando kun la plej granda loĝantaro, kiu preskaŭ konsistigas kvaronon de tiu de la mondo. Tial ĝia prosperiĝo kaj potenciĝo ne povos ne produkti aktivan influon al progreso de la homaro kaj mondopaco. Ĝuste pro tio, la ĉina popolo ofte sin instigas al tio, ke ĝi devas fari pli grandan kontribuon al la homaro. Ankaŭ tio estas la volo de la ĉinaj esperantistoj. La senĉesa plivastiĝo de Esperanto en la lando kun vasta teritorio kaj multa loĝantaro, kia Ĉinio, sendube estas granda puŝo al la esperanta movado en la tuta mondo.

# 30 JAROJN KUNE KUN EPC



**D**E antaŭ tridek jaroj mia vivo fariĝis nedisigebla kun gazeto El Popola Ĉinio. Mi spertis kun ĝi ĝojon kaj ĉagrenon.

La memoro estas ankoraŭ freŝa. Kiel mi ĝojis, kiam oni sciigis al mi en Shanghai (Ŝanhajo) en la printempo de 1950, ke la redakcio de EPC en Beijing (Pekino) atendis min por komenci eldonon de tiu ĉi nova Esperanta gazeto! Mi tuj preparis la vojaĝon, kvankam mi iom bedaŭris forlasi mian tiaman laboron en la redakcio de Xinhua-Librejo.

## RENKONTIĜO KUN MALNOVAJ AMIKOJ

Veninte al Beijing, min bonvenigis nur du esperantistaj kamaradoj nome k-doĵ Ĉ. Ĉen kaj Venlo Fon. Ili ambaŭ estas miaj malnovaj konatoj en la komenco de la kvardekaj jaroj en Chongqing (Ĉongking), kaj kun

la lasta mi longe kunlaboris en la Koresponda Esperanto-Lernejo. La renkontiĝo post preskaŭ dekjara disiĝo donis kredeble al ni grandan ĝojon. Des pli ĝojinda estis tio, ke la renkontiĝo okazis pro preparado de Esperanta gazeto en la kadro de la nove fondita Fremdlingva Eldonejo.

Ni ĝojis ankaŭ pri tio, ke la subtenado al la gazeto fare de la Fremdlingva Eldonejo ja signifas subtenadon de la popola reĝimo. Kiam Ĉina Esperanto-Ligo ankoraŭ ne organiziĝis, tio estas vere grava evento por ĉina Esperanta movado.

## SOPIRO LONGE TENATA

Verŝajne estis kutimo por esperantistoj, ke se la cirkonstanco permesas, ili nepre eldonas ian Esperantan periodaĵon unue por interligi esperantistojn kaj due por pruvi utilecon de la internacia lingvo. Sed por ĉinaj

esperantistoj tio signifas pli. Ili ja volas per tio interamikigi la ĉinan popolon kun popoloj en diversaj landoj.

Tia kutimo enradikiĝis en ĉinaj esperantistoj jam de la tridekaj jaroj, kiam la ĉina popolo leviĝis por nacisavado kontraŭ invado de la japana imperiismo.

Tiam eldoniĝis sinsekve multaj Esperantaj gazetoj kaj informiloj ekz-e PEK-Bulteno, Ĉinio Hurlas, Voĉo el Oriento, Heroldo de Ĉinio, Jan'an-a Esperantisto, La Ĵurnalisto, El Ĉina Muziko, k.a.

Jes, ili eldoniĝis sinsekve. Ĉar neniu el ili vivis longe aŭ pro subpremo kaj persekutado de Kuomintanga reĝimo, aŭ pro mizera monujo de la esperantistoj mem. Tial kiam la cirkonstanco iom pliboniĝis, ili devis rekomenci la laboron. Sed en la lastaj jaroj de Kuomintanga

---

En la malkvieta mondo, Ĉinio jam fariĝis lando atentata de la tuta mondo. La popoloj de diversaj landoj varme subtenas la ĉinan popolon en konstruado de la lando. Sen trograndigo ni povas diri, ke ĉie en la mondo troviĝas niaj amikoj, kaj kompreneble, ili ankaŭ inkluzivas la

diverslandajn esperantistojn. Kiel laborantoj de la redakcio de EPC, ni ofte sentas tian varman amikecon. Pro tio, kiam ni celebras la 30-an datrevenon de la ekapero de EPC, ni havas plenan memfidon pri nia estonteco. Ni certe povas fari nian gazeton pli kaj pli bona por kon-

tentigi la deziron de niaj legantoj.

Fine, permesu al ni ke ni, en la nomo de la laborantoj de nia redakcio, kore danku kaj salutu niajn legantojn, abonantojn, perantojn kaj geamikojn, kiuj varme nin helpis kaj helpas.

regado, eĉ tia mizera espero forvaporigis. La verdsteluloj ĝenerale estis suspektataj, aŭ persekutataj. Iuj el ili eĉ dediĉis sian vivon pro esperantista agado.

Kiel ni sopiris en tiuj jardekoj, ke havu ni propran Esperantan gazeton subtenatan oficiale kaj garantiatan pri daŭra eldonado! Kaj ni pensis tiam, ke tia espero povos efektiviĝi nur post la venko de la revolucio.

Tiu tago fine venis. Fondigis la Ĉina Popola Respubliko en oktobro, 1949, kaj kvin monatojn poste la eldonado de El Popola Ĉinio estis preparata. Kiel feliĉe estis por mi, ke ankaŭ mi partoprenis la preparadon!

## LA NOVNASKITO

Guste en Maja Tago antaŭ tridek jaroj naskiĝis nia gazeto El Popola Ĉinio.

Foliumante la unuan numeron de EPC nun mi trovas ĝin eldonaĵo tre modesta. Ĝi estis nur okpaĝa (en formato duoble pli granda ol la nuna), senkovrila, monata informilo kun neluksa ĵurnala papero, simplaj ilustraĵoj kaj dense presita teksto.

Tamen por ni la unuaj laborantoj de EPC ĝi estis kvazaŭ nia kara novnaskita infano. Ĉar en ĝi enkorpiĝis la longjara sopiro de ĉinaj esperantistoj, la ĝojo de la tuta ĉina popolo post la Liberiĝo kaj la subteno de la popola reĝimo al Esperanto, kion neniam antaŭe la ĉinaj esperantistoj spertis.

La unuaj krioj de la novnaskito anoncis sian deziron herediton, kion ĝiaj antaŭirintoj postlasis, t.e. la principon servi per multflankaj aktualaj informoj al la ĉina popolo kaj al la

esperantista legantaro ke la lasta akiru klaran bildon pri la nova Ĉinio kaj profundan komprenon al la ĉina popolo, kaj per tio enradikigi intiman amikecon inter ili.

Jam en la unua numero oni trovis informojn pri fervoro de ĉinaj laboristoj, nova rekordo de produktado, subtenado al mondopaco, nova vivo de ĉinaj virinoj, popola eduko en diversaj formoj, kaj famajn sed mallongajn literaturajn verkojn ktp. Ili ja estis nur facetoj el la vivo de la ĉina popolo ĵus liberiĝinta. Tamen oni povas el ili aŭdi la paŝbruojn de ŝia progreso kaj percepti la direkton de ŝia socialisma konstruado.

## FAVORAJ RESONOJ

La novnaskito vekis ne nur dorlotadon de siaj vartantoj sed ankaŭ favorajn resonojn de la legantoj.

Nelonge post la eldoniĝo de EPC, nia redakcio estis surŝutita de gratulaj leteroj el diversaj landoj kaj ĉiuj mondpartoj. Ĉiuj legantoj montris sian ĝojon kaj subtenon al la novnaskito. Ili ne nur tuj abonis mem la gazeton, sed ankaŭ abonigis siajn esperantistajn amikojn, kaj plie koniĝis la enhavon de la gazeto en neesperantistaj kunvenoj, tradukis la artikolojn en sian nacian lingvon por ilin aperigi sur lokaj ĵurnaloj, gazetoj kaj eĉ murgazetoj en siaj uzinoj, lernejoj ktp.

Des pli dankindaj estis tiuj amikoj, kiuj ne nur donis al la redakcio ofte valorajn konsilojn, sed ankaŭ prenis sur sin pezan laboron esti peranto de EPC malgraŭ tio, ke iliaj propraj laboroj estis plenplenaj, aŭ tio, ke ilia aĝo jam ne permesis al ili plenumi tian lacigan taskon!

Ĉio ĉi tio ja estas granda honoro kaj instiga kuraĝigo al flegantoj de la novnaskito.

## KRESKO

En 1957, post preskaŭ kvarjara interrompo pro objektivaj malfaciloj, EPC reaperis kun nova eldonanto — Ĉina Esperanto-Ligo. Kaj mi fariĝis denove unu el ĝiaj flegantoj.

En tiu ĝia dua periodo EPC heredis la tradicion de la unua periodo, sed kun pli freŝa forto daŭrigi la kreskon. Enhavo de la gazeto pli ampleksiĝis, esperantaj informoj pli multiĝis kaj pli beligiĝis ĝia aspekto. Kaj dank' al tio ĝi akiris pli multajn amikojn.


Eble estas menciinde, ke en tiu ĉi periodo nia redakcio donis apartan atenton pri libroeldonado. El ili la Ĉina Antologio (1949-1959) kaj Noveloj de Lusin estas varme akceptitaj de la esperantista publiko.

Kun kresko de la gazeto kaj la legantaro mi elkore ĝojis, kaj kontraŭ la nevenkeblaj malfaciloj mi gustumis la ĉagrenon same kiel aliaj k-doĵoj en la redakcio. Tamen nin akompanis ĉiam espero kun bela perspektivo.

## KATASTROFO KAJ RENASKIĜO

Estas mondkonate, ke ĉirkaŭ dek jaroj antaŭ 1977 en Ĉinio okazis granda katastrofo. Komence superregis ekstrema maldestrismo. Baldaŭ poste la krima kliko de la Kvaro uzurpis parton de la regpovo de la Komunista Partio de Ĉinio. Sekvis tra la tuta lando kompletaj renversiĝoj de ĉiuj normoj. Kompreneble ankaŭ EPC ne povis eskapi el tiu ĉi katastrofo. Mi do fariĝis ĝia atestanto en la





**T**RIDEK jarojn regule, seninterrompe eldonadi unu revuon ne estas tiel facila laboro. Kelkaj similaj revuoj jam aperis en aliaj landoj, sed ne longe eltenis, ĉesis aperi. Okaze de tiel malofta jubileo de "El Popola Ĉinio" mi kiel unu el la perantoj, eble la plej aĝa (83-jara kaj 55 jarojn esperantisto) kaj eble inter la unuaj volas unue gratuli ne sole en mia nomo sed ankaŭ en la nomo de ĉirkaŭ 700 abonantoj en Jugoslavio.

En tia okazo mi esprimu la merititan rekonon al la sennomaj laborantoj dum tiuj 30 jaroj: tradukantoj, redaktoroj, fotistoj, ne forgesante ankaŭ la ekspedantojn k. a. Ne ĉiam estis facila ilia laboro depende de politikaj streĉiĝoj dum iuj periodoj de tiuj tridek jaroj, precipe dum la malbonfama Kvaropo. Tamen la nuna ekipo enkondukis mul-

katastrofo, sed ne plu ĝia fle-ganto.

Katastrofo havas ankaŭ sian finon. Finfine ĝi estis haltigita, post kiam falis la krima kliko de la Kvaro en oktobro, 1976. Kaj

Post la aperigo de "Verku por EPC" en nia gazeto, ni ricevis multajn leterojn kaj artikolojn senditajn de niaj legantoj, en kiuj ili esprimis siajn varmajn gratulojn al la 30-a datreveno de la fondiĝo de EPC, donis multajn laŭdojn, kritikojn kaj kuraĝigojn pri niaj laboroj kaj ankaŭ faris al ni nemalmultajn proponojn por bone funkciigi nian gazeton "El Popola Ĉinio". Ekde tiu ĉi numero ni aperigos iujn el ili unu post alia.

— La Red.

tajn bonajn ŝanĝojn kaj tio respoguliĝis ankaŭ sur la paĝoj de via kaj nia revuo, en kresko de la intereso por la revuo.

Via lando subite turniĝis al la mondo kaj ĝi kun miliardo de loĝantoj transprenas la batalon por la paco, kaj ankaŭ la okuloj de la tuta mondo turniĝas al Ĉinio. Koncerne mian landon, precipe post la vizito de nia Prezidanto Tito en aŭgusto 1977 al Ĉinio kaj la reciproka vizito de via Prezidanto Hua Guofeng al Jugoslavio, la amikaj rilatoj inter la du landoj aktiviĝis je ĉiuj niveloj je bono de ĉiuj homoj en ambaŭ ŝtatoj. La homaro sendube kun plezuro salutis normaligon de rilatoj ankaŭ kun iuj aliaj ŝtatoj.

Tamen estis kaj estas io, kio baras ke la cetera mondo pli bone konatiĝu kun la atingajoj de Ĉinio: la cetera mondo ne konas la ĉinan lingvon, kaj ĉinoj kiuj nun pli ofte vizitas aliajn landojn (ekz. ĉinaj studentoj studas en Usono kaj aliaj landoj)

EPC povis paŝo-post-paŝe forskui la dekjaran katenon de la katastrofo.

Oni diras, ke fenikso, reĝo de la birdoj, mortis post cent jaroj en flamo kaj poste renaskiĝas

malfacile lernas la lingvojn de koncernaj landoj. La elekto de Esperanto kiel peranto estas la sola prudenta solvo, kaj ĝin jam 30 jarojn pere de la revuo "El Popola Ĉinio" praktikas ĉinaj esperantistoj, subtenataj de la ŝtato, por diskonigi la atingajojn de Ĉinio sur kampoj politika, socia, kultura, arta, sporta kaj lastatempe ankaŭ Esperanta.

Tre ĝojiga evento dum la lastaj jaroj estas vizito de ĉina esperantista delegacio al UK-oj de Esp-o, neforgeseblaj prezentaĵoj de Pekina Pupteatro en Jugoslavio kaj tiuokazaj kunvenoj de membroj de via redakcio kun la legantoj de EPC en Beogrado kaj Zagrebo, poste ĉiutaga elsendado en Esperanto de via Radio.

Je la fino mi deziras, ke la revuo retenu en estonto la fizionomion kian ĝi havas nun, ke ĝi estu same varia kaj ke ĝi eniru ankaŭ la landojn en kiuj pro cirkonstancoj tieaj esperantistoj ne havis okazon legi ĝin.

pli bele el la cindro. Eble la dekjara katastrofo estis flamo tia, kvankam nesankta, por EPC. Ĝi ja renaskiĝas el la cindro. Espereble tio alportos al ĝi ion pli belan kaj pli idealan.

*Grava ŝanĝo al  
El Popola Ĉinio*

de A. Lagoutte (Francio)



**O**KAZE de la 30-a datreveno de la fondiĝo de El Popola Ĉinio, mi gratulas ĉiujn gekunlaborantojn de la revuo pro ilia perfekta bona esperanta laboro. Krome, mi deziras por mia amata E.P.Ĉ. novajn sukcesojn en la varbo de ankoraŭ pli multe da legantoj kaj en kreado de ĉiam pli profunda amikeco inter la ĉinaj kaj la alilandaj abonantoj pere de intensa interŝanĝo de korespondado.

Memorante la deklaron de EPC-Redakcio en n-ro 1 de la jaro 1979, kiu elmetis planon por la farota laboro dum la kuranta jaro, mi plezure kons-tatas ke ĉio estas plenumita kiel eble plej bone kaj plaĉe por la legantoj.

Mi jam abonis la revuon antaŭ la likvido de la kvarper-

sona bando sed tiutempe oni sentis kvazaŭ kaŝitan malhel-pon, preskaŭ sekreton en la en-havo de EPC. Ŝajnis ke nur valoras tio kio sekvas la vid-punkton de la tiamaj aŭtorita-tuloj kaj ke ekzistas sur nia tero nur la ĉina mondo. Krome nenio en ĝi povis respeguli la fame konatan, preskaŭ legendan ĉinan afablecon nek la ĉinan gastamon kaj pacamon ankaŭ mondkona-tan de post longaj jarcentoj.

Tial mi rezignis la abonon post kelka tempo ĝis kiam mi aŭdis pri la nova direkto prenita de EPC-Redakcio post liberiĝo de la pensoesprimoj en Ĉinio.

Nuntempe oni povas diri, ke okazis grava ŝanĝo en la revua redaktado ĉar oni povas legi multajn raportojn pri la Espe-rantaj okazintaĵoj kaj ĝenerale pri la vivo eksterlande ĉu pri Esperanto aŭ ne. Oni konstatas ankaŭ ke eksterlandanoj estas nun pli bonvenaj ol antaŭe en Ĉinio. La revuo fariĝis vere in-ternacia.

Fine, ĉio fariĝis pli luma, pli amikeca, preskaŭ intima inter la Redakcio kaj la abonantoj kaj mi estas certa ke la legantoj pli ŝatas la novan formon de la enhavo, formon kiu ankoraŭ povas evolui favore al mia kon-cepto pri liberesprimoj.

En EPC troviĝas nun multaj interesaj rubrikoj kaj mi plej ŝatas tiujn, kiuj rakontas la ĉiu-tagan vivon de la laboristoj, artmetiistoj kaj sciencistoj kaj la vivon ĉe la nacimalplimulto. Min tre interesas la lasta raporto pri la vivo en Tibeto kun vizito

al pagodoj, kie kultis lamaoj kaj ordinara popolo, kaj kun inter-vjuo ĉe vivanta budao. Mi kre-das ke estus bone kaj interese por multaj legantoj, precipe tiuj kiuj dubas pri la religiaj libere-coj en Ĉinio, skribi detalan artikolon pri la nuna situacio de ĉiuj religioj en Ĉinio. Tion faris lastatempe Radio Pekino, sed mi kredas, ke estus bone fari same kiel por la demandoj de italaj gelernantoj en la rubriko "Inter Ni" de la n-ro 10 de 1979-a jaro, tio estas pli kompleta ol disaŭ-digo per radio. Mi kredas ke tiu rubriko "Inter Ni" devas fariĝi la leterkesto por la abonantoj.

Kompreneble ĉiuj rubrikoj, kiuj pritraktas la Esperantan vivon ĉu en Ĉinio ĉu eksterlan-de, estas tre allogaj, kaj ĉiuj samideanoj certe ĝojas, kiam ili legas ke kreiĝis novaj Esperan-to-grupoj kaj kursoj en la lando, kaj kiam ili legas ke EPC akcep-tis fremdan samideanon aŭ ke Radio Pekino kune kun EPC organizis kunvenon aŭ banke-don por tiu samideano.

Enmetu ĉiam multajn kolor-bildojn pri viaj tiel diversaj kaj belaj pejzaĝoj, bildojn kiuj ha-vas krome meriton inciti la le-gantojn al vizito de Ĉinio kaj samtempe al pli profunda kona-tiĝo kun ĝia laborema kaj gast-ama popolo.

Evitu ĉion kio povas repre-zenti ian hegemoniismon aŭ ŝovinismon sed ne pro tio forlasu certan amon al la patrolando. Restu antaŭ ĉio vere internaciis-toj kaj restu nia interligilo eĉ se la cirkonstancoj iam malpliblo-niĝos.

**K**IAM antaŭ 30 jaroj en Beijing oni (re)-“prenis Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan”, malmultaj tiamaj esperantistoj kapablis antaŭvidi la elstaran rolon, kiun ludos El Popola Ĉinio tra la jardekoj.

Tiun rolon ni povas analizi el pluraj vidpunktoj.

Kiam temas pri la lingvo mem, EPC̄ havis stabiligan kaj riĉigan funkcion. Ĝi stabiligis la uzadon de pura Esperanto, ĉar ĝiaj redaktoroj daŭre klopodis ekspluati nur la senfinajn eblecojn de la esperanta vortfardo kaj neniam cedis al “elitismaj” tentoj, laŭ kiuj ju pli malsimplas la uzata lingvo des pli valoras la verkinto. Temis pri vere “popola” Esperanto, kiu ĝis nun restas imitinda ekzemplo por eksterlandaj redaktoroj.

Ĝi riĉigis la lingvon, ĉar ĝi estis la gazeto, kiu pleje parolis pri aktualaj ne-movadaj temoj. Mi opinias ke ĉi-kampe neniu alia gazeto en la mondo povas pensi pri “konkurenco” kun EPC̄, kiu parolis pri ĉio ebla: de agrikulturo al historio, de politiko al silk-produktado.

Kiam temas pri informado de eksterlandanoj pri la vivo en



de Renato Corsetti (Italio)

Ĉinujo, EPC̄ daŭre prezentis realecan bildon pri la plej malsamaj facetoj de la ĉina vivo. Fidelaj legantoj de ĝi estis ĉiam akurate informitaj pri la evoluo kaj materia kaj idea, kaj multaj el ili estas multe pli bone informitaj pri Ĉinujo ol siaj neesperantistaj kuncivitanoj.

Mi ja scias ke multaj okcidentanoj ĉiam taksis la enhavon de EPC̄ simpla propagando. Ĉu ili pravis? Ĉu ili malpravis?

Ili malpravis, se ili per la esprimo “propagando” celis la fakton, ke EPC̄ ĉiam fidele proponis interpreton de la ĉina realaĵo tra la prismo de la tieaj regantaj valoroj. Fakte oni rajtas sin demandi, ĉu la grandaj laŭdire “objektivaj”, usonaj aŭ okcidentgermanaj gazetoj ne prezentas

interpreton de la realo tra la prismo de la ĉi-tieaj regantaj valoroj.

Ili pravis, se per la esprimo “propagando” ili celis la fakton, ke EPC̄ aranĝis sian prezenton de la realo en maniero rekta, ripetada, senduba. Tiun prezentmanieron en kapitalismaj landoj utiligas ĝuste nur la komerca, konsumiga, varpropona propagando. Aliflanke oni devas honeste rimarki ke dum la lastaj jaroj (post la epoko de la kvarpersona bando) ĝi relative pliboniĝis ankaŭ ĉi-rilate.

Fine, ne ekzistas duboj pri la valoro de EPC̄ kiel ligilo inter la ĉina kaj la tutmonda Esperanto-movado. La tutmonda esperantistaro rigardas kun admiro kaj granda espero al la lastatempaj progresoj de la ĉina movado. Jam estas tempo por ke la ĉina esperantistaro transprenu sian lokon en ĉiuj niveloj de la internacia Esperanto-movado (de la komitato de UEA al literatura kaj scienca verkado en la internacia lingvo).

Longan vivon kaj daŭran prosperon al EPC̄. Ĝi plu estu ligilo inter ĉinaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj pere de ili inter la ĉina kaj eksterlandaj popoloj.

Fine mi volas laŭdi la belan prezentadon de la revuo, ĝian altan kulturen nivelon, ĝian riĉan enhavon kun perfekta Esperanta stilo. Certe ĉiuj gekunlaborantoj havas kompletan posedon de nia internacia

lingvo, kaj estas mirinde kiom da novaj vortoj mi povas ellerni pere de la legado de EPC̄.

Ĉinaj Esperantaj geamikoj, marŝu ĉiam antaŭen por la triumfo de nia kara lingvo Espe-

ranto. Vi havas ŝancon ricevi gravan apogon de viaj instancoj por la disvastigo de la lingvo. Sendube tiuj instancoj ankaŭ povas multon fari por la enkonduko de Esperanto en la internaciajn sferojn.

*Kion*

*"El Popola Ĉinio"*

*signifas por*

*nederlanda*

*leganto?*

de Joop van der Hoeven  
(Nederlanda)


**M**I estas posedanto de sep jarkolektoj de la plej bona Esperanto-revuo en la mondo; ekde la jaro 1973 mi ja ricevas la ĉinan E.P.Ĉ. Jam antaŭ tiu jaro 1973 mi aŭdis pri la granda miraklo de la Ĉinio de Mao Zedong; la neatendita venko de la armeo de ordinaruloj kontraŭ fortoj, kiuj tiam ŝajne estis nevenkeblaj. Krom tio ni aŭdis pri la senkompare brila batalo poste kontraŭ mizero, ĝenerala malsato, subpremo, humiligo, morto;

la malbelecoj kiuj sekvas burĝan superregadon kiel ombro. Eksciinte ke tiu mirakla Ĉinio eldonas Esperantan Revuon, mi tuj petis abonon. Du revoj trovis plenumon: Esperanto vere helpas min starigi internacian kontakton multvaloran kaj mi ĉerpis rekte el la fundo de la lando kiujn mi admiras. Nu, mi legis ĉion kun granda atento kaj ĝojis pri ĉiu progreso, pri ĉiu atingajo, ĉar mi klopodis kompreni kion ĉiu paŝo antaŭen signifas por la ĉinaj homoj.

Por mi E.P.Ĉ. estas unue informilo. Rerigardante mi ne povis ne konstati ke la amaso de informoj de E.P.Ĉ. estas abunda kaj varia. Du faktoroj kondukis al tiu rezulto: unue la zorga laboremo de ĉiuj kiuj donas siajn fortojn al la produkto, kaj due la daŭra instigo al la legantoj eldiri opiniojn, sugestojn kaj kritikojn. Pro tio ke nia revuo venas en multajn landojn kaj do renkontas grandajn diferencojn, ni povas nur diveni kun kiom da saĝa pesado la redaktoroj devas kompili la revuon, monaton post monato.

Mi ŝatas aŭdi pri homoj ĉie en Ĉinio, ĉu en montvilaĝoj aŭ en urboj, ĉu han-oj aŭ nacimallimultaj anoj. Mi ŝatas aŭdi pri ilia vivo, pri iliaj malfacilaĵoj kaj pri iliaj venkoj, grandaj kaj malgrandaj. Feliĉe E.P.Ĉ. faras tion kion mi deziras kaj mi esperas arde, ke Ĉinio konservos sian propran vizaĝon kulture. Ĉiu kiu havas akrajn okulojn intertempe jam povas konstati, ke ĝis nun la ĉina popolo estas sufiĉe forta por kontraŭstari fremdajn kaj nefavorajn influojn. Sed mi esperas ke ankaŭ estonte, kiam eble ekonomia influo de ekster la lando kreskos, Ĉinio ne cedos al suprajeco. Je ĉi-tiu punkto venis por mi la momento diri ion pri la belajoj de E.P.Ĉ. — la belegaj, ofte artaj fotoj, la ravaj kaj harmoniaj koloroj, la metiartajoj, ofte kortuŝe belaj, pri la pejzaĝoj. Post jaroj de konatiĝo ili fariĝis por mi nemankipovaj amikoj. Mi volus diri al ĉiuj, ke atento je la belajoj de Ĉinio certe kondukos al ĝoja kono!

Korajn salutojn al miaj samideanoj ĉie en la mondo kaj precipe en la redaktorejo en Beijing.



\* S-ro Arne Gulliksen, Fagerbolth, N-9050 Storsteinnes Norvegujo, ekonomikisto, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj kaj tutmondaj esp-istoj. Hobbies: poŝtmarkoj, radio-amatoro, libroj.

\* S-ro Bertok Zoltan, Varpalota, Kormocbanya l. H-8100

Hungario, 26-jara instruisto dez. kor. kun ĉino.

\* F-ino Prodah Leontina, str. i. Creanga Bloc 8, AP. 17 Hune Doara-2750, Rumanio.

\* F-ino Iliasi Elena, Str. Rozelor, Bloc F.B. 19 Scara B, AP. 13 Slatina-0500, Rumanio, dez. kor. kun diversaj gekorespondantoj pri diversaj temoj.

\* S-ro James Cool, 137 N. Mulberry Street, Wilmington, Ohio 45177, Usono, instruisto pri fremdaj lingvoj dez. kor. kun ĉinaj kaj tutmondaj esp-istoj.

\* F-ino Dagmar Lind, St. Aby, Slaka, S-58590 Linkoping, Svedio, kun esp-istoj el la tuta mondo, aparte kun ĉinoj pri p.m., naciaj pupoj ktp.

# Espero de ĉina erudiciulo

## —Vizito al profesoro Chu Tunan

**K**IA estas la estonteco kaj ebleco de la komuna lingvo en la internacia komunikiĝo de la homaro? La pli-ol-80-jara profesoro Chu Tunan prezentis sian opinion al nia gazeto, ke establi en la Unuiĝintaj Nacioj organon por studi kaj disvastigi Esperanton estas eble la unua afero, kiun oni povas fari nun. Chu estas fama ĉina erudiciulo kaj entuziasma subtenanto de Esperanto-movado. Li funkcias kiel membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Kvankam grandaĝa kaj tre okupita, li multe zorgas pri Esperanto-movado. Antaŭ nelonge mi vizitis lin, kaj li akceptis min en sia legoĉambro.

Informiĝinte pri la nuna stato de la ĉina Esperanto-movado, li ĝoje diris, ke estas inspira la revigliĝo de la enlanda Esperanto-movado. Kiam ni parolis pri la estonteco de Esperanto, li emocie diris laŭ sia multjara sperto en internaciaj amikaj aktivecoj, ke nun la popoloj de pli ol 100 landoj kaj regionoj en la tuta mondo uzas malsamajn lingvojn, kio kaŭzas multajn malfacilojn al tiuj, kiuj

okupiĝas pri internaciaj aktivecoj aŭ scienca laboro, ĉar ili devas lerni plurajn lingvojn. Kaj multaj aparatoj de interpretado estas bezonataj por internacia konferenco. Tio konsumas nekalkuleblajn tempon, forton kaj materiajn rimedojn de la homoj kaj samtempe malhelpas diverslandajn popolojn interŝanĝi sian ideologion kaj kulturon. La grandaj politikistoj kaj revoluciistoj Marks, Engels kaj Mao Zedong ĉiuj donis atenton al internacia lingvo. Kaj Esperanto, laŭ ĝia nuna praktikado, povas esti rigardata kiel bona neŭtrala internacia lingvo. Ĝin varme aprobis la mondfamaj literaturistoj kaj sciencistoj. H. Barbusse, A. Einstein, M. Grokij, Romain Rolland, R. Tagore, Lusin kaj aliaj. Post preskaŭ jarcenta uzado de diverslandaj esperantistoj en la kampoj de sociologio, scienco, kulturo kaj literaturo, ĝi jam fariĝis lingvo kun tre riĉa esprimivo. Tial Chu opiniis, ke venis tempo kiam diversaj Esperantaj organizoj, inkluzive de la Ĉina Esperanto-Ligo, krom daŭre plifortigi la disvastigon kaj studadon de Esperanto, devas prezenti al UEA jenajn proponojn:

A. UEA faru decidon, ke diverslandaj esperantistoj iniciatu subskribadon de eminentuloj kaj prudentaj politikistoj de siaj landoj por levi kampanjon propagandi kaj lerni Esperanton, ke



*Profesoro Chu Tunan*

pli da homoj komprenu kial lerni tiun lingvon.

B. UEA kolektu iliajn subskribojn kaj per tio proponu al ĝenerala sekretario de UN plenan utiligon de la sperto multjare akumulita de UEA en disvastigo de Esperanto kaj establon de speciala organo sub UN por studo kaj disvastigo de Esperanto.

C. La dirita organo respondecu pri aranĝo kaj eldonado de Esperantaj libroj kaj gazetoj, laŭplane kaj laŭpaŝe esperantigu diverslandajn famajn kaj elstarajn verkojn literaturajn, historiajn, filozofiajn, edukajn, sciencajn kaj teknikajn kaj medicinajn, kaj starigu por diverslandaj esperantistoj servopunkton por liveri kaj interŝanĝi Esperantajn librojn.

D. Kiam la supre diritaj laboroj ekhavas sian bazon kaj Esperanto mem estos popularigita pluapase, la dirita Esperanta organo sub UN kaj Unesko kune proponu, ke ĉiulandaj registaroj prenu Esperanton kiel elektitan studobjekton en diversnivelaĵoj lernejoj laŭ ilia kondiĉo kaj poste turnu ĝin en devigan, kiam prezentiĝos la ebleco kaj la lernantoj havos tian postulon.

E. Se prezentiĝos la ebleco, UEA proponu al la Ĝenerala Asembleo de UN, ke ĝi difinu Esperanton kiel unu el siaj oficialaj laboraj lingvoj.

Fine Chu diris, ke estonte Esperanto fariĝos universala lingvo por la mondaj popoloj, tiam du lingvoj jam sufiĉos por

ajna nacio kaj ajna lando, nome la universala lingvo Esperanto kaj la respektiva nacia lingvo. Tio certe helpos progreson de la homaro.

Chu montriĝis vigla kaj senlaca en sia enhavoriĉa parolo. Li havas sian propran sperton en internaciaj aktivecoj, al kiuj li dediĉis multajn jarojn, kaj ankaŭ profundan komprenon pri Esperanto mem. Li finis sian parolon per tiuj vortoj: "Tio estas nur miaj individuaj opinioj kaj espero je referenco de Esperantaj laborantoj."

La parolo de Chu rememorigis al mi ankaŭ vortojn de profesoro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA. Li diris: "Ni vivas

hodiaŭ en komunikada revolucio. Vole-nevole la civitanoj de la mondo interrilatas unu kun alia kun pli grandaj ofteco kaj intenso . . . Kvankam la homo nun kapablas elektrone komuniĝi trans grandaj distancoj, lia lingva kapablo apenaŭ evoluis kaj li riskas sklaviĝi al sia maŝinaro . . . Hodiaŭ en la Unuiĝintaj Nacioj oni uzas seson da lingvoj kaj elspezas cent milionojn da dolaroj jare por ebligi la simplan lingvan komunikadon."

Profesoro Chu donis grandan inspiron al nia Esperanta laboro, kaj ni devas bone remaĉi liajn vortojn.

*\* Li Naixi estas vicĉefsekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo.*

LU JIANBO:

## ESPERANTO — PONTO DE AMIKECO KAJ KULTURA INTERŜANĜO

**F**AKTOJ pravas, ke Esperanto estas tre bona internacia helpa lingvo. Ĝi ne nur povas akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj, sed ankaŭ ludas sian rolon en scienca kaj kultura interŝanĝo inter diversaj landoj. Pri tio mi havas profundan komprenon el miaj pasintaj travivaĵoj.

En 1920 mi eklernis Esperanton. Antaŭ ĉio, la Esperanta literaturo min ege interesis. Sekve, mi do komencis traduki iujn literaturajn verkojn de aliaj landoj. En 1923 mi venis al Bejing (Pekino) kaj vidis ĉe mia amiko Feng Xingsan "Elektitajn Verkojn de H. Heine", esperantigi-

tajn de F. Pillath. Poste, mi aĉetis ekzempleron de tiu libro (1920-jara Esperanta eldono de Berlin) en la Ĉina Esperanta Librejo de Ŝanhajo, kaj tradukis ĝin en la ĉinan lingvon kun la germana originalo kiel referenco. Kaj en 1929 eldoniĝis mia tradukaĵo "Elektitaj Poemoj de H. Heine". La portreto de H. Heine sur la frontispico estis liverita de germana esperantisto Ernst Liebetaŭ.

En la 20-aj jaroj, mi kontaktiĝis kun la Sovetunia Asocio de Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj kaj el ĝia Esperanta gazeto mi tradukis en la ĉinan lingvon biografiojn de Tolstoj kaj Ĉaj-

kovski, artikolojn pri iliaj verkoj, pri vizitoj al ili, pri la kavernaj freskoj pri ĉasado en la primitiva Hispanio kaj tiel plu, kiujn mi kolektis poste en mian esearon "Vivo kaj la Esprimo de Vivo". El libroj kaj gazetoj senditaj al mi de alilandaj esperantistoj, mi tradukis nemalmultajn novelojn de hungaraj verkistoj F. Herczeg, Maŭro Jokai kaj S. Tömörkery kaj la poemaron de Kalocsay "Mondo kaj Koro", eldonitan en 1921. Tiuj ĉi tradukaĵoj estis publikigitaj en ĵurnaloj de elmigrintaj ĉinoj en sudorienta Azio kaj ankaŭ en enlandaj literaturaj gazetoj.



*Profesoro Lu Jianbo (maldekstre) kaj studentino de la Esperanto-kurso en Sichuan-universitato*

La Esperanta-Rusa Vortaro tiam al mi donacita de sovetunia esperantisto Sidorov nun estas ankoraŭ en la mano de mia plejaĝa filo (esperantisto). Japana s-ano T. Yamaga donis al mi grandan helpon en mia parolado de Esperanto kaj antaŭ pli ol dek jaroj li ofte sendis al mi Esperantajn librojn kaj gazetojn. Li donis al mi sian tradukajon de "Pri Moralo" de Laozi, fama pensulo en la tempo de Printempo kaj Aŭtuno de Ĉinio antaŭ du mil jaroj. Bedaŭrinde la libro perdiĝis poste. Sed iu meksikia esperantisto ĝin hispanigis.

Precipe neforgeseble estas, ke iu samideano de Venezuelo sendis al mi, antaŭ pli ol dek jaroj, verkojn en la hispana lingvo pri historio, literaturo kaj filozofio de la antikva Grekio, kiuj donis grandan helpon al nia historia fakultato en instruado. Interalie, "La Taŭro de Minos" de anglo Leopold Cottrell, historia verko pri arkeologia elterigo en Trojo

kaj Kneto de la antikva Grekio, liveris abundajn materialojn al la arkeologiefako de nia fakultato. Mi jam tradukis ĝin en la ĉinan lingvon, kiu estos eldonita ĉijare de la Sichuan-a Popola Eldonejo.

En la 60-aj jaroj, pere de Esperanto mi korespondis kun ĉeĥa ĉinologo Kamil Sedlacek, kiu studis la historion de la okcidenta Xia-dinastio de nia lando. Helpe de la de li sendita libro "Movado de Hus-anoj" verkita de prof. J. Macek en la lingvoj ĉeĥa kaj angla, mi ne nur riĉigis mian instruadon pri la mezepoka historio de la mondo, sed ankaŭ tradukis ĝin el la angla lingvo en la ĉinan. Pli frue ol tio, mi tradukis serion da artikoloj pri la antikva historio de Bulgario, verkitaj de prof. Ivan Dujcev en la esperanta gazeto Nuntempa Bulgario kaj tradukis ankaŭ alian disertaĵon pri la Bogomil-movado. En la lasta duono de la 60-aj jaroj, mi korespondis kun J. Fritzen,

ĉinologo de okcidenta Germanio, kiu sendis al mi germanigitajn verkojn de Homero, Eeschylos, Sophocles kaj aliaj. Estas aparte menciinde, ke itala samideano Mario Dezini, ĝenerala sekretario de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, korespondis kun mi plej longe, kaj en la jaro 1977 restariĝis nia interrompita korespondado. Li sendis al mi unu post alia grekajn tragediojn kun notoj en la itala lingvo, kiuj ne nur ebligis al mi progresi en lernado de la antikva greka lingvo kaj la itala lingvo, sed ankaŭ helpas min en mia instruado.

Ne estas nur tiuj supre menciitaj samideanoj de aliaj landoj, kiuj helpis min. Mi neniam forgesos ilin pro iliaj helpoj al mi. Kompreneble, miavice mi donacis al ili librojn pri historio, literaturo kaj politiko (iujn en Esperanto) kaj Han-lingvan vortaron eldonitajn de nia lando. Kvankam mi donis al ili mal multe, tamen tiuj libroj estas utilaj al tiuj samideanoj por esplori Ĉinion en koncernaj flankoj. Mi kredas, ke Esperanto, kiel ponto, ludos pli kaj pli grandan rolon kun la disvolviĝo de la moderniga konstruado de nia lando kaj la pliiĝo de kontaktoj inter la ĉina popolo kaj la popoloj de aliaj landoj en la kampoj politika, ekonomia, precipe kultura kaj scienca.

Ni devas pli multe kaj pli bone uzi Esperanton por paco, por la interŝanĝo kaj disvolviĝo de kulturo kaj scienco de la homaro.

\* La aŭtoro estas profesoro de la historia fakultato de Sichuan-universitato kaj vicprezidanto de la Chengdu-a Esperanto-Asocio.

# PRI LA ĈINA ESPERANTO-MOVADO EN LA PASINTA JARO

**K**IAM venis printempo, kelkaj Esperanto-amikoj ĝoje rememoris la novajn aferojn aperintajn en la ĉina Esperanto-movado en 1979. Inter ili estas menciindaj la jenaj:

1. La Ĉina Esperanto-Ligo havigis al si pliajn laborantojn. Ilia tasko estas, sub la gvido de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL, plifortigi enlandan kaj internacian kontakton kaj disvastigi Esperanton. La ligo kompilos kaj presos Esperantajn lernolibrojn kaj legaĵojn por ĉinaj Esperanto-komencantoj. Kaj "Nova Vortaro Esperanta-Ĉina" kaj "Ĉina-Esperanta Vortaro" estas en kompilado.

2. La Konstanta Konsilantaro de ĈEL faris decidon prezenti sian peton al UEA, ke ĝi akceptu ĈEL kiel sian landan asocion. Tio ludos aktivan rolon en plifortigo de la kunlaboro inter

ĈEL kaj UEA, en antaŭenpuŝado de la internacia Esperanto-movado, en akcelado de la kultura, scienca kaj teknika interŝanĝoj de diversaj landoj kaj en defendo de la mondpaĉo. Tiu decido estas laŭdita de la esperantistaj rondoj de diversaj landoj.

3. En Beijing (Pekino) okazis la Dua Ĉina Esperanta Labor-kunveno, kiu difinis la orientilon kaj taskon de la laboro de ĈEL kaj difinis, ke ĈEL devas disvastigi kaj uzi Esperanton, fari per ĝi internaciajn amikajn komunikiĝojn kaj sciencajn, teknikan kaj kulturen interŝanĝojn kaj batali por defendi la mondpaĉon. La kunveno multe inspiris la ĉinajn esperantistojn kaj akcelis la disvolviĝon de la ĉina Esperanto-movado.

4. La gvidaj instancoj kaj akademaj institucioj de iuj pro-

vincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj plifortigis sian gvidon super la Esperantaj organizoj kaj kreis favorajn kondiĉojn al iliaj laboroj per subteno al iliaj aktivecoj kaj monhelpo al ili.

5. En la provinco Hubei, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la urbo Chengdu (Ĉengdu) fondiĝis Esperanta asocio (ligo), kaj en la provinco Hunan kaj la urboj Shanghai (Ŝanhajo), Chongqing (Ĉongking) kaj Xi'an (Hi'an) stariĝis prepara grupo por fondi Esperantan asocion. Tio montris, ke la ĉina Esperanto-movado faris solidan paŝon antaŭen. Tiuj Esperantaj organizoj aktive funkciigis Esperantajn kursojn, faris disertojn pri Esperanto por propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj atingis novajn sukcesojn.

*Esperanto-rondo de Wuhan en tekunsido*



*Kunveno de junaj geesperantistoj en Chongqing*






6. Radio Pekino komencis ĉiutagan disaŭdigon en Esperanto. Tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esperantomovado kaj donos aktivan influon al la internacia Esperantamovado.

7. Ekde la pasinta jaro, reportaĵoj pri Esperanto estis rimarkinde pliigitaj en ĉinaj ĵurnaloj, gazetoj kaj disaŭdigoj. Laŭ nekompleta statistiko, 41 ĵurnaloj kaj gazetoj 71-foje diskonigis Esperanton aŭ raportis pri Esperanto-novajoj en la pasinta jaro. 13 radiostacioj kaj 2 televiziaj stacioj de provincoj kaj urboj plurfoje disaŭdigis Esperantajn kantojn aŭ raportis pri aktivecoj de lokaj Esperantaj organizoj. Tio estis malofte vidita en la lastaj 20 jaroj.

8. Kun la pliiĝo de propagandadoj pri Esperanto, la ĉina publiko pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. 17 grandaj kaj mezgrandaj urboj de la lando fondis Esperantajn kursojn, kiujn vizitis pli ol 1,000 personoj. Iuj altlernejoj, kiel Chengdu-universitato, Sichuan-universitato, la Chongqing-a Tria Normala Instituto, Wuhan-universitato kaj Hangzhou-universitato, prenis Esperanton kiel duan fremdan lingvon aŭ fondis postlernan Esperantan kurson. Iuj provincoj kaj urboj establis Esperanto-Instituton aŭ Esperantan esploran grupon. Estas menciinde, ke en iuj nacimalplimultaj regionoj kiel Huhhot (Huhehoto) en la Interna Mongolio kaj Lhasa en Tibeto kaj en iuj urbetoj stariĝis Esperantaj kursoj aŭ studrondoj kies partoprenantoj plejparte estas laboristoj, teknikistoj, sciencistoj kaj instruistoj. Tio montris, ke ili bezonas, en la moderniga konstruado, havigi al si internacian komunikilon



*Esperanto estas instruata kiel la dua fremda lingvo en la Chengdu-a Universitato.*



*Membroj de la Esperanto-grupo en la Shanghai-a Normala Universitato kaj lernantoj de Esperanto-kurso de Shanghai en la ekspoziciejo*

por fari kulturen interŝanĝon kaj amikajn intervizitojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

9. Ekde la kuranta jaro la Redakcio de "El Popola Ĉinio" komencos eldoni Esperantajn librojn. Nun ĝi planas kompili librojn pri Ĉinio kaj ĝiaj kulturo kaj arto.

10. En la lasta julio, la Ĉina Esperanto-Ligo sendis sian delegacion al la 64-a Universala Kongreso de Esperanto. Kaj preskaŭ 20 esperantistoj el 10

landoj vizitis Beijing kaj aliajn ĉinajn urbojn. Ankaŭ diverslokaĵaj esperantistoj kaj Esperantaj grupoj de Ĉinio pliigis sian korespondon kun alilandaj esperantistoj.

Retrorigardante la ĉinan Esperantomovadon de la lasta jaro, ni estas tre ĝojaj. Ni havas fortan memfidon pri la estonteco kaj firme kredas, ke kun la alveno de la unua printempo de la 80-aj jaroj la ĉina Esperantomovado certe faros novan progreson.

### ESPERANTA STUD-RONDO NASKIĜIS EN JILIN-PROVINCO

En januaro ĉi-jare, la Fremd-lingva Asocio de Jilin (Gilin)-provinco okazigis kunvenon kaj decidis fondi la Esperantan Stud-rondon en sia kadro. Samtempe ĝi ellaboris laborplanon de la kuranta jaro. Wang Xianzhang, prezidanto de la Fremdlingva Asocio de Jilin-provinco kaj rektoro de la Changchun- (Ĉangĉun)-a Fremdlingva Lernejo, estis elektita kiel ĝia respondeculo.

### RADIA KAJ TELEVIDA RAPORTO PRI ESPERANTO

En la lasta decembro, la Radio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĉe nia norda landlimo plurfoje elsendis informon pri la fondo de la Esperanta Asocio de la regiono en la han-a kaj mongola lingvoj, kaj la Televida Stacio de la regiono vidigis al rigardantoj la realan staton de la kongreso. En januaro ĉi-jare, la Radio de Huhhot (Huhehoto), la ĉefurbo de la regiono, speciale raportis pri Esperanto. Ankaŭ la Tagjurnalo de Interna Mongolio en la mongola kaj han-a lingvoj donis informon pri la kongreso.

*E-ekspozicio aranĝita de Shanghai-a E-kurso*



### ESPERANTO-EKSPOZICIO EN SHANGHAI

En la dua tagdeko de januaro, la Esperanto-kurso de Shanghai (Shanhajo) okazigis en Changsha-mezlernejo Esperanto-ekspozicion, en kiu estis eksponataj leteroj, bildoj, poŝtkartoj, libroj kaj gazetoj senditaj de Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj de 20 landoj. Oni koniĝis vizitantojn pri la utilo kaj historio de Esperanto sub la titoloj "Esperanto kaj Scienco", "Esperanto kaj Literaturo", "Esperanto kaj Turismo", "Esperanto kaj Radio", "Esperanto kaj Marksismo-Leninismo" kaj "Esperanto en Ĉinio". Tio interesis la vizitantojn. Laŭ peto de la Esperanto-grupo de la Shanghai-a Normala Universitato, la ekspozicio translokiĝis al tiu lernejo kaj daŭris de la 29-a de januaro ĝis la 2-a de februaro.

### ESPERANTO-KURSO EN FUZHOU

Je la 6-a de januaro ĉi-jare, la Fujian (Fugian)-a Tagjurnalo raportis la funkciadon de la unua Esperanto-kurso en Fuzhou (Fuĝoŭ), la ĉefurbo de Fujian-provinco. La kurso kun pli ol 80 lernantoj estis aranĝita de la Kultura Buroo de la provinco, la Ĝenerala Sindikato de la urbo kaj la Urba Kultura Domo.

### JAPANAJ ESPERANTISTOJ VIZITOS ĈINION

La 20-persona vizitgrupo de japanaj esperantistoj, organizata de la Japana Esperanto-Instituto, venos al Beijing (Pekino) en la dua tagdeko de oktobro kaj restados 12 tagojn en Ĉinio. Krom Beijing, la gastoj vizitos ankaŭ la urbojn Wuhan (Vuhan), Shanghai kaj Suzhou (Suĝoŭ).

### TELEVIDA PROGRAMERO PRI FILMADO DE "HEJMOSOPIRA STELO" EN SHANGHAI

En la komenco de la kuranta jaro la Shanghai-a Televida Stacio prezentis programeron pri filmado de la nomita filmo. Sur la fluoreskoekrano oni vidis faman japanan aktorinon Kurihara Komaki kaj ĉinan aktoron Gao Fei en ludado. Tiu filmo raportas pri la bone konata japana esperantistino Verda Majo kaj ŝia ĉina edzo.

### SILKA PORTRETO DE ZAMENHOF EN FARADO

Komisiite de la Ĉina Esperanto-Ligo en februaro, la fame konata Hangzhou (Hangĝoŭ)-a Brokata Fabriko faras silkan portreton de L. L. Zamenhof kun longeco de 40 cm. kaj larĝeco de 27 cm., por eksterlandaj esperantistoj espereble ĝi estos aĉetebla post junio.

### ESPERANTA INSIGNO BALDAŭ ELDONOTA DE EPĈ

Okaze de la 30-a datreveno de la fondiĝo de El Popola Ĉinio, nia redakcio eldonos la insignon "EPĈ-amiko". Ĝia desegnaĵo (vidu sur la kovrilo) el tri blankaj floroj en korbeto, verda stelo en la mezo kaj "E" sur la stelo simbolas la amikecon kaj solidarecon inter esperantistoj de la mondo.

## OFICEJO DE UEA EN NOVJORKO

Por adaptiĝi al la bezono de la ĉiam plivastiĝanta laborskalo, fondiĝis la Novjorka oficejo de UEA en novembro, 1979. La oficiala malfermo okazis en la 13-a de decembro, 1979, kaj ĝin ĉeestis invitive reprezentantoj de ne-registaraj organizoj kaj la UN-oficejo. Tie ekdeĵoris duontage salajrata direktoro, s-ino Ĝaki Makalun (Jackie McAloon). La oficejo situas rekte antaŭ la Domo de UN, oportune por sia funkciado. Por superrigardi ĝian funkciadon, establiĝis Stirkomitato konsistanta el G. Bertuĉi (Bertucci), M. Grsn (Gerson), R. Groŭsmn (Grossman), E. Mansn (Manson), J. Mansn, C. Skaj (Skye), H. Tonkin. La adreso: Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

## ESPERANTO INSTRUATA EN IRANO

En la lasta oktobro aperis en Teherano la sociologiaj lerno-libroj por gimnazioj, reverkitaj de d-ro Saheb-Zamani. En du el ili, nome tiuj de la naŭa kaj dek-unua klasoj, la aŭtoro enmetis ĉapitrojn pri Esperanto. La titolo de la ĉapitroj estas "Kulturo kaj Lingvo". Tiamaniere en la lasta jaro preskaŭ 1.5 milionoj da iranaj gelernantoj konatiĝis kun Esperanto. Pasintjare, en la nedevigaj kursoj de la Universitato de Teherano la sola fremda lingvo instruata estis Esperanto. Ĵila Saheb-Zamani instruis en tri elementaj kaj unu paroliga kursoj (entute pli ol 200 gelernantoj) en la Teknika Fakultato kaj estis pagata de la universitato kiel ĉiuj aliaj profesoroj. Dek profesoroj pri la belaj artoj lernis Esperanton en kurso gvidata de Aref Azari. Ankaŭ en Karaĝ, d-ro Pezeŝki gvidis en la loka gazeto kurson de la internacia lingvo.

## PUBLIKA MANIFESTACIO POR ESPERANTO

Je la 26-a de la lasta oktobro studentoj de GASFE (Grupo por Agado en la Lernejoj por Eŭropa Federacio) manifestaciis en Romo antaŭ la sidejo de la itala nacia televido RAT, por peti televidajn debatojn pri la lingvo-problemo, kiu ĝis nun neniam estis pritraktita. GASFE postulas oficialan eŭropan lingvon por krei eŭropan popolon kun supernacia sento. La membroj de GASFE petas la adopton de Esperanto, por solvi la lingvo-problemon de la eŭropa kontinento. La manifestacio estis fakte organizita de la roma Esperanto-grupo. La presagentejo "Ansa" dissendis informon pri tio al la tuta itala gazetaro.

## KONGRESOJ OKAZONTAJ EN LA KURANTA JARO

De la 16-a ĝis la 22-a de majo, 1980, okazos en America (Nederlando) la 32-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

De la 19-a ĝis la 24-a de julio okazos en Madrido la kongreso de la Hispana Esperanto-Federacio.

De la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazos en Malto la 14-a Internacia Konferenco de la Inter-



*K-do He Fen donas lecionon en E-kurso en Fuzhou.*

nacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

De la 23-a ĝis la 24-a de aŭgusto okazos en Jokohamo la 67-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.

## "KANTOJ KAJ ROMANCOJ" EN ESPERANTO

Antaŭ nelonge nin atingis la nomita albumo. Ĝi estis eldonita speciale por la gitaristoj-esperantistoj, sub la propono de la Kroatia Esperanto-Ligo, Jugoslavio. Ĝi havas 58 kantojn kaj romanojn. La aŭtoro estas s-ro Dragan Štokić kaj tradukinto s-ro Zvonko Rehorić. La albumo prezentas elekton de la kantoj kaj romanoj el la pli frue naci-lingve eldonitaj albumoj por gitaro de la sama aŭtoro.



*E-kurso de Fuzhou en lernado*



# Nia Esperanta Disaŭdigo

de Esperanto-sekcio de Radio Pekino

Nia Esperanta disaŭdigo komenciĝis en decembro de 1964. Ĝi okazis antaŭe du fojojn ĉiusemajne. Laŭ la postulo de niaj aŭskultantoj, ni ŝanĝis ĝin en ĉiutagan, en la 30-a de oktobro, 1979.

Ni raportas ĉefe pri Esperanto-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj, pri la moderniga konstruado kaj atingoj de Ĉinio kaj ĝiaj historio, geografio, kulturo, eduko, literaturo, arto, nacimioritatoj, moroj, kutimoj kaj popola vivo, kaj pri la en- kaj eksterlandaj politikoj de la ĉina registaro kaj ĝiaj starpunktoj kaj sinteno pri gravaj internaciaj problemoj.

Ni prezentas la jenajn Esperantajn programerojn: "Esperanto en Marŝo", "Ĉina Kulturo", "Vojaĝo en Ĉinio", "Leterkesto" kaj "Kurantaj Aferoj".

Nia ĉiutaga elsendo ricevis aplaŭdon de ĉiulandaj esperantistoj, kaj nemalmultaj el ili sendis leterojn por gratuli nin.

Japana esperantisto Muramacu Jukijoŝi skribis en sia letero: "Mi plezure aŭskultis vian programon kaj sentis profundan

ĝojon... La ĉiutaga elsendo de Esperanta programo de Radio Pekino estas granda triumfo de ĉinaj esperantistoj... Ĝi estas fierinda monumento fare de vi en la historio de Esperanto."

La Esperanto-redakcio de ORF skribis: "La ekzemplo tiel donata de la plej popolriĉa, tiom potenca, kaj de impona kulturtradicio portata nacio efikos ankaŭ en aliaj landoj, eble — iugrade — eĉ en Aŭstrio."

Nia germana aŭskultanto Hervey Taunton skribis: "Mi ĝojas pri la alta nivelo de viaj programoj kiuj montras la kulturan flankon de via lando. Efektive ili ne havas politikan mallaŭtan voĉon pro kiu iu povas timi. Ili estas instruemaj, kulturemaj kaj ŝatindaj de mi."

Okaze de la 15-jara jubileo de nia Esperanto-disaŭdigo en decembro de 1979, ni ricevis leterojn de Fujio Egami, prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto, kaj multaj aliaj esperantistoj de FR Germanio, Aŭstrio, Pollando, Francio, Belgio, Britio ktp. La nederlanda junulara Esperanto-grupo "Vesperto" sendis al ni sonbendon. Tokuda Rokuro, prezidanto de Ŝizuoka Esperanto-klubo de Japanio, diris en sia letero: "Ĉiuvespere


ĉie ajn en nia lando, novaĵoj diversspecaj en tuta lando de Ĉinio aŭdiĝas el Pekino en Esperanto. Dank' al tio, nia koniĝo pri Ĉinio ĝenerale multe riĉiĝadas. Tiu fakto certe kontribuos havigi al japanaj esperantistoj fortan konvinkon pri Esperanto, pliigante amikecajn sentojn inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj kaj popolanoj."

En la pasintaj 15 jaroj ni faris etan laboron utilan por disvastigi Esperanton kaj pliigi la interkompreniĝon kaj amikecon inter ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj kaj popolanoj, tamen nemalmultaj mankoj ankoraŭ troviĝas en niaj programeroj, ĉu enhance aŭ forme. Multaj el niaj aŭskultantoj prezentis al ni trafajn kritikojn kaj bonajn proponojn kaj ankaŭ donis al ni multajn helpojn. Pro tio ni kore dankas ilin. Ni esperas, ke niaj aŭskultantoj tion daŭre faros, por plibonigi nian servon. Nia adreso: Esperanto-sekcio, Radio Pekino, Ĉinio.

De nun, krom respondi demandojn de niaj aŭskultantoj per disaŭdigado aŭ letero, ni ankaŭ plifortigos nian kontakton kun diverslandaj esperantistoj pere de la revuo "El Popola Ĉinio".

## Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	43.7 31.9	6860 9380
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	41 30.4	7315 9860
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6 19.8	11685 15145



Huadan



Laüdan


## Dan en la pekina opero

*Dan* estas speco de aktoroj en la pekina opero ludantaj virinajn rolojn. La *dan*-oj sin dividas en *laüdan*, *huadan*, *ĉingji* kaj *vudan*. Per malsamaj bunte ŝminkitaj vizaĝoj, kaj malsamaj vestoj kaj kantoj, ili modlas virinajn figurojn diferencajn en aĝo, pozicio kaj karaktero.

Unu el la scenoj de iu pekina opero kun *dan*-oj kiel roluloj



Vudan




Ĉingji



# En la redakcio de EPĈ

El Popola Ĉinio aĝas 30 jarojn. Pere de la revuo, korespondado kaj vizitado, ĝia redakcio kaj la legantoj starigis inter si profundan amikecon. Por kontentigi la intereson de nemalmultaj legantoj pri nia redakcio, ni speciale faris raporton per jenaj fotoj.




Unu el la laborĉam-  
broj de la redakcio



Veterana esperantis-  
to Tikos helpas  
junan esperantistinon  
en ŝia laboro.



Belartistoj de la redakcio en presejo



Nia laboranto okupiĝas pri  
leteroj de niaj legantoj



La estraranoj de la redakcio en kunsido pri laboro



Intervjuo kun aktorino




Fotistoj de la redakcio  
laboras sur strato.



Redaktoroj diskutas pri  
plibonigo de sia laboro.





# POR VESTOJ DE 900-MILIONA LOĜANTARO

de Chen Yifang

**S**AME kiel problemoj de manĝo kaj loĝo, la problemoj de vestoj estas, por ĉiu lando, ne nur plej fundamenta ekonomia problemoj sed ankaŭ grava socia problemoj. Ĉinio estas lando kun plej grandnombra loĝantaro en la mondo, tial la popola registaro havas pezan taskon solvi vestan problemon por sia popolo.

## PROVIZO DE TEKSTILAĴOJ EN ĈINIO

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la jara produktokvanto de kotonŝtofo de Ĉinio estis nur 2,500 milionoj da metroj, t.e. iom pli ol 4 metroj por ĉiu loĝanto. Tiam, nesufiĉo de vestoj por laboruloj, precipe por la vasta kamparanaro, estis ĝenerala fenomeno. Dank' al 30-jara klopodado, la produktokvanto de kotonfadenoj pliiĝis de 2.4 milionoj ĝis ĉ. 14 milionoj da pako, tiu de kotonŝtofo superis 11,000 milionojn da metroj kaj tiu de trikotoj kaj aliaj teksaĵoj plimultiĝis 8-oble. Nun la problemoj de vestaĵoj de niaj loĝantoj estas solvita, kvankam ili nelukse sin vestas.

En la meza periodo de la kvindekaj jaroj, Ĉinio komencis efektiviĝi la sistemon de porciumado de kotonŝtofo. Ĉiu loĝanto meznombre povis aĉeti ĉ. 6 metrojn da ŝtofo jare, ekskluzive de multaj specoj de kotontek-

sajoj, kiujn oni povis libere aĉeti en vendejoj. Efektive, la meznombra konsumkvanto de kotonŝtofo por ĉiu loĝanto estis ĉ. 8 metroj. La aliaj ŝtofoj, kiel lanaĵoj, silkaĵoj, tolaĵoj kaj multaj kemifibraĵaj teksaĵoj, estis pogrande vendataj sur merkato.

Kun senĉesa pliboniĝo de la popola vivo, ĉiam pli altiĝis la postulo de la popolanoj pri formoj de vestoj, kaj specoj kaj kvalito de teksaĵoj. Antaŭe oni ĉiam opiniis, ke la ĉina kamparo havas malaltan aĉetpovon kaj bezonas nur kotonteksajojn. La lastatempa enketado montras, ke en la kamparo ne nur kotonteksajoj estas bezonataj, sed grandan debiton havas tie ankaŭ lanteksajoj.


Antaŭ kelkaj jaroj Ĉinio ne povis kontentigi la bezonon de urbanoj pri korduroj, poliestera kotona miksteksajo kaj lanfadenoj. Kaj nun la produktokvanto de natursilkaj litkovriloj kaj lantapiŝoj kun trikitaj desegnoj ankoraŭ ne satigas ilian bezonon, kvankam oni faris ĉiajn klopodojn por pliproduktado.

## DISLOKIĜO DE LA TEKSTILA INDUSTRIO

Ĉe la Liberiĝo Ĉinio havis kotonŝpinajn ekipaĵojn kun 5 milionoj da spindeloj, lanŝpinajn ekipaĵojn kun 120,000 spindeloj kaj kokono-elbobenajn maŝinojn kun 140,000 spindeloj. Tiam la skalo de tekstila industrio estis nemalgranda, tamen ĝia dislokigo malracia. La plejmulto de

*Ŝpina laborejo de la Shanghai-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko*





*Nova speco de koton-poliestera miksaĵo produktata de la Sepa Pres-tinktura Fabriko de Shanghai*



*Riĉa rikolto de kotono en kamparo de Anhui*

la fabrikoj de tiu branĉo koncentriĝis en kelkaj apudmaraj urboj. La spindeloj de Shanghai (Ŝanhajo), Qingdao (Kingdaŭ) kaj Tianjin (Tiangin) konsistigas ĉ. 70% de la totala nombro de la spindeloj de la lando. En multaj internaj provincoj, eĉ en iuj ĉefaj kotonproduktejoj, ne troviĝis moderna tekstila industrio.

En 1953, grandskala ekonomia konstruado komenciĝis en la tuta lando. Post kelkjara klopodado fondiĝis novaj tekstilaj bazoj unu post alia en Beijing (Pekino), Shijiazhuang (Ŝigiaĝuang), Handan, Zhengzhou (Ĝengĝoŭ), Xi-an (Hi-an) kaj Xianyang (Hianjang). Ili ĉiuj posedas po 200,000-300,000 spindelojn kaj respondan kapablon de teksado, presado kaj tinkturo.

En la lasta periodo de la kvindekaj jaroj, multaj malgrandaj tekstilaj bazoj estis konstruitaj sinsekve en la provincoj Sichuan (Siĉuan), Hubei, Zhejiang (Ĝegiang) kaj Anhui kaj la aŭtonoma regiono Xinjiang (Hingiang). Ankaŭ kelkaj modernaj lanteksejoj estis starigitaj en la aŭtonomaj regionoj Xinjiang, la Interna Mongolio kaj Ningxia (Ninghia) kaj la provinco Qinghai (Kinghai). Krome mez- kaj malgrandaj trikaj kaj teksaj fabrikoj ekfunkciis tra la tuta lando.

En Xinjiang en la nordokcidenta parto de Ĉinio estis nur kelkaj ŝpinteksaj metiejoj en la komenca periodo post la Liberiĝo. Sed nun jam funkcias 5 grandaj kaj mezgrandaj tekstilaj fabrikoj. Iliaj produktaĵoj estas vendataj en diversaj lokoj de la lando. Nun eĉ Tibeto sur la monda "firsto" havas siajn lanteksejojn.

Senĉese progresas ankaŭ produktado de la malnovaj tekstilaj bazoj de Shanghai, Tianjin, Qingdao, Wuhan (Vuhan), sudaj Jiangu (Ĝiangsu)- kaj Liaoning-provincoj. Shanghai, la plej granda tekstila bazo de Ĉinio, nun havas 400,000 ŝpinistojn kaj teksistojn. Dum la 30 jaroj ĝia totala produktovaloro kreskis je 4-oblo, kaj multaj specoj de ĝiaj produktaĵoj ĝuas bonan reputacion sur la internacia merkato.

Krome, la tekstila industrio de Nantong kun historio de 80 jaroj, la silkteksado de Suzhou (Suĝoŭ), la tekstilado de Wuxi (Vuhi) glorie nomata "malgranda Shanghai" kaj la nova pres-tinktura industrio de Changzhou (Ĉangĝoŭ), ĉiuj ludas gravan rolon en prosperigo de ekonomio de Jiangu-provinco kaj ankaŭ liveras al la tuta lando bonkvalitajn tekstilaĵojn.

## MEM FABRIKI MAŜINOJN

La tekstilaj maŝinoj kaj ekipaĵoj de Ĉinio estas faritaj ĉefe per ĝiaj propraj fortoj.

En la malnova Ĉinio, tiaj maŝinoj kaj ekipaĵoj estis importitaj el diversaj landoj. Tiam troviĝis en Ĉinio kelkaj malgrandaj kaj simplaj tekstilmaŝinaj fabrikoj, kiuj povis fari nur riparadon.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la tekstila branĉo, unuflanke, reformis aŭ plivastigis la malnovajn maŝinriparejojn kaj, aliflanke, konstruis novajn modernajn fabrikojn de tekstilaj maŝinoj. Dank' al eksterlandaj avangardaj teknikoj kaj enlandaj esploraj fruktoj, ĉinaj laboristoj mem projektis kaj fabrikis

kompletajn tekstilajn maŝinojn. En 1954, Ĉinio sukcesis fabriki kompletajn ekipaĵojn por kotona ŝpinteksado kaj ŝtofa prestinkturado kaj tiel kontentigis la urĝan bezonon por konstrui fabrikojn kun 5 milionoj da spindeloj. En la lasta periodo de la kvindekaj jaroj oni ekuzis maŝinojn faritajn de Ĉinio mem en kotona, lana, juta kaj silka teksado kaj prestinkturado. Depost la sesdekaj jaroj nia lando komencis projekti kaj fabriki ekipaĵojn por kemifibra teksado.

Nun, Ĉinio jam havas relative kompletan tekstilan industrion kun pli ol 20 grandaj maŝinfabrikoj kiel ĝia spino.

### KRUDMATERIALOJ DE LA TEKSTILA INDUSTRIO

Ĉinio estas lando favora por kulturi kotonon kaj juton kaj bredi ŝafojn kaj silkraŭpojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro ĉiamaniere disvolvis produktadon de ŝpinteksaj krudmaterialoj precipe tiun de kotonu, kiu estis malpli grava nur ol tiu de greno. En 1950, la produktokvanto de kotonu estis 700,000 tunoj, kiuj sufiĉis nur por produkti iom pli ol 3.5 milionojn da pakoj da kotonfadenoj. Nun la produktokvanto de kotonfadenoj pliiĝis je 4-oblo, kaj la kotonu ne estis importita en granda kvanto. De la meza periodo de la sepdekaj jaroj la jara produktokvanto de kotonu estis 2.4 milionoj da tunoj, kiuj konsistigis 85% de la kvanto bezonata por Ĉinio. En la kvindekaj jaroj 80% de la bezonata lano estis importitaj, sed nun 80% estas liverataj de nia lando mem. Al la juto okazis simila ŝanĝiĝo: En la pasinteco juto bezonata de Ĉinio estis impor-

*Lanĉemiza fabriko funkciigata de komunumo de Chuansha - gubernio de Shanghai*



tita ĉefe el landoj de suda Azio, sed nun pli ol 80% de ĝi estas produktitaj de Ĉinio mem. En 1979 la produktokvanto de silkraŭpaj kokonoj estis 5-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

### NOVA DISVOLVIĜO DE KEMIFIBRA INDUSTRIO

Por bone solvi la vestan problemon, Ĉinio kun grandnombra loĝantaro kaj malmulta agraro devas energie disvolvi kemifibran industrion samtempe kun pliproduktado de kotonu, lano, juto kaj natursilko.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj Ĉinio fondis la certaskalan kemifibran industrion ĉefe per siaj propraj fortoj. Ĝia industrio de sinteza fibro startis en la sesdekaj jaroj. En 1965 la jara produktokvanto de kemiaj fibroj estis nur 50,000 tunoj, kaj en 1979 ĝi kreskis ĝis pli ol 300,000 tunoj. Kompare kun la avangardaj landoj, nia produktokvanto estas malgranda, tamen ĝi servas kiel bazo por progresigi la aferon.

En la lastaj dek jaroj Ĉinio prenis la kemifibran industrion

kiel unu el la gravaj branĉoj en la nacia ekonomio. De 1971 Ĉinio konstruis, en la provincoj Fujian (Fugian), Hunan kaj Jiangxi (Gianghi), kelkajn vinilonajn fabrikojn kun karbo kaj kalkoŝtono kiel krudmaterialoj. Post 1973 Ĉinio konstruis 4 grandajn modernajn kemifibrajn fabrikojn en Shanghai, Tianjin, Sichuan kaj Liaoyang, per ekipaĵoj kaj teknikoj importitaj el Japanio, Francio, FR Germanio kaj Italio. La Shanghai-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko en la sudorienta antaŭurbo de Shanghai produktas pli ol 100,000 tunojn da kemiaj fibroj jare. La tuta fabriko havas 18 ĉefajn kompletajn ekipaĵojn, el kiuj 9 estis importitaj el Japanio kaj FR Germanio kaj la alia duono estis farita de Ĉinio mem. Ĝia konstruado komenciĝis en 1973 kaj finiĝis en 1978. Nun la fabriko provizas tekstilajn fabrikojn en diversaj lokoj de Ĉinio per siaj kemiaj fibroj. La Liaoyang-a Ĝenerala Petrolkemifibra Fabriko estas armita ĉefe per ekipaĵoj importitaj el Francio. Ĝiaj investoj kaj skalo estas pli grandaj ol la antaŭa kaj ankaŭ la lasta baldaŭ komencos produkti.



# Ŝanĝiĝo de Xigou-brigado

de Huai Bing

## — Vizito al la plej frua agrikultura interhelpa grupo de Ĉinio

**L**A impona Taihang-montaro kvazaŭ giganta drako kuŝas okcidente de la Nord-Ĉinia Ebenaĵo. En ĝia suda parto sin trovas Xigou-brigado, kiu famiĝis tra la tuta lando pro tio, ke malnova labormodelo Li Shunda tie fondis la plej fruan agrikulturan produktan interhelpan grupon en nia lando. En la lasta frosta vintro mi vizitis la brigadon.

### NASKIĜO DE LA UNUA INTERHELPA GRUPO

Xigou-brigado konsistas el 44 vilaĝetoj kun pli ol 440 familioj. Antaŭ la Liberiĝo tie estis kalvaj montoj kaj sterilaj kampoj. Sed nun, sur ĝiaj verdaj montoj paŝtiĝas bovoj kaj ŝafoj, en domoj lumas elektraj lampoj anstataŭ olelampoj kaj al la kamparanoj ne plu mankas greno kaj vestoj. Parolante pri

ŝanĝiĝo de la brigado, oni ne povas ne rakonti al vi multajn historiojn pri Li Shunda.

Li Shunda naskiĝis en Linxian-gubernio de Henan-provinco. Antaŭ 50 jaroj, pro natura katastrofo liaj gepatroj fuĝis kune kun siaj gefiloj en Taihang-montaron. Siatempe ankaŭ aliaj pli ol 20 familioj venis tien unu post alia. Ili disloĝis en valo je ĉ. 3 kilometroj longa kaj farmis kampojn de bienulo por sin vivteni. Kvankam ili tutjare penlaboradis, tamen ili ne povis ŝtopi sian stomakon. Ĉiuvintre la patro de Li Shunda devis iri aliloken por serĉi laboron kaj fine mortis de lacego en alia loko. Juna Li Shunda kun indignaj larmoj staris antaŭ ondantaj montĉenoj kaj ne sciis kion fari.

Nelonge post tio, la Oka-voja Armeo gvidata de la Komunista

Partio de Ĉinio venis al Taihang-montaro kaj tie starigis bazlokon kontraŭ la japanaj agresantoj. Li Shunda aliĝis al la Kompartio kaj gvidis popolamasojn por disvolvi rezistadon kontraŭ la agresantoj.

En 1942, pro longa sekegeco kaj ekonomia blokado fare de la Kuomintanga reakciularo kaj japanaj agresantoj, la tiea popolo suferis grandan malfacilon en vivo. Por savi sin el la malfaciloj, la kamparanoj aktive respondis al la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio "organizigu". En 1943, Li Shunda kaj aliaj 5 familioj sin organizis en la unuan produktan interhelpan grupon de la Taihang-a montregiono. En la sama jaro, ili kulturebligis 8 hektarojn da virga tero kaj rikoltis ĉ. 50 tunojn da terpomoj, per kiuj ili ne nur solvis la problemon de

manĝaĵo, sed ankaŭ helpis la fronton. Sub la influo de Li Shunda, ankaŭ ĉirkaŭaj vilaĝoj unu post alia fondis interhelpajn grupojn. En 1944, Li Shunda estis elektita kiel unuaklasa labormodelo kaj ĉeestis la Labormodelan Kunvenon de la Taihang-a Montregiono. Poste, lia interhelpa grupo progresis jaron post jaro en produktado kaj faris eminentan kontribuon en defendo de bazloko kaj subteno al la fronto.

### LAŬ LA DIREKTO MONTTRITA DE PREZIDANTO MAO

“La progreso de Xigou-brigado venis ne facile!” Shen Jilan, labormodelo de la tuta lando kaj gvidanta membro de la brigado, multe parolis al mi pri la vojo irita de ŝia brigado.

En la unuaj jaroj post la Liberiĝo, multaj homoj enviis vivon en ebenaĵo kaj iuj eĉ volis forlasi la montregionon por transloĝiĝi tien. Ĝuste tiam Li Shunda revenis de la kunveno okazinta en Bejing. Li diris al la vilaĝanoj: “Prezidanto Mao montris: Por riĉigi montregionon, oni devas samtempe disvolvi agrikulturon, forstumadon kaj brutobredadon. Kvankam nia Xigou-brigado ne havas multe da agroj, tamen ĝi estas bona loko por disvolvi agrikulturon, forstumadon kaj brutobredadon.” Tiam li opiniis, ke por fari plenableksan disvolvon en Xigou, ne sufiĉas la forto de interhelpaj grupoj kaj oni devas unuigi ilin en kooperativon. En printempo de 1952 naskiĝis la produkta kooperativo “Ora Stelo” de Xigou.

Tamen la vojo de la kooperativo ne estis glata. Nelonge post ĝia fondiĝo, iuj membroj, kiuj

havas fortajn laborfortojn kaj fekundajn kampojn, petis ekskooperativigi, timante ke la kooperativo malprofitigos ilin. Li Shunda diris al ili: “Aliĝo al kaj eltiriĝo el la kooperativo estas tute libera. Kiu volas ĝin forlasi, do bonvolu!” En tiu jaro la kooperativo akiris bonan rikolton, ĝia meznombra hektara produktokvanto de greno atingis 2,550 kilogramojn, kaj per pli ol 750 kilogramoj superis tiun de la interhelpa grupo. En vintro de la sama jaro, ne nur tiuj, kiuj eltiriĝis el la kooperativo, sed ankaŭ multaj membroj de proksimaj interhelpaj grupoj petis aliĝi al la kooperativo. Tiel, la produkta kooperativo “Ora Stelo” de Xigou pligrandiĝis de 26 familioj ĝis pli ol 400 familioj.

Post sia fondiĝo la kooperativo ellaboris la planon: fari barajojn por krei kampojn kaj konstrui akvorezervejojn en valo; planti fruktarojn ĉe montpiedoj; kaj kreskigi aliajn arbojn kaj herbojn sur montdeklivoj. Sub la gvido de Li

Shunda kaj Shen Jilan, la kooperativanoj komencis konstrui novan Xigou. En printempo kaj aŭtuno ili plantis arbedojn kaj en vintro ili faris konstruadon kampan kaj akvoutiligan. Dank’ al multjara klopodado, Xigou fine fariĝis nova riĉa montregiono.

### VERDIGO DE MONTJOJ

Iun tagon, akompanate de brigada kadro Zhao, mi iris okcidenten laŭ zigzaga vojo sur monttalo kaj vidis, ke malsupre sur valofundoj kuŝas ebenaj kampoj; sur montdeklivoj kreskas fruktarbaroj; pli supre sur la sensuna flanko de montoj prosperas verdaj pinoj kaj cipresoj; kaj sur la suna flanko sin paŝtas gregoj de bovoj kaj ŝafoj.

Fingre montrante la pomarban ĝardenon apud la vojo, Zhao diris, ke en la pasinteco Xigou ne havis pomarbojn, multaj eĉ ne vidis, kia estas pomo. En la unuaj jaroj post la Liberiĝo, foje Li Shunda revenis de Bejing post kunveno kunportante kelkajn

*Financa kunveno antaŭ la jarfina divido de la enspezoj*



pomojn. Rigardante la pomojn, iuj kooperativanoj diris: "Kiel bone estus, se nia Xigou produktus pomojn!" Aliaj diris: "Estas bedaŭrinde, ke nia Xigou ne taŭgas por kreskigi pomarbojn." Tamen Li Shunda ne kredis tion. Ĉiufoje, kiam li kunvenis aliloke, li ĉiam kaptis la ŝancon por konsulti pri pomarbokulturo. Foje li speciale vizitis pomĝardenon de iu montregiono por lerni teknikon pri kulturado de arbidoj, grefto kaj stuco. Poste li aĉetis el la Nordoriento aron da pomarbidoj kaj sukcese transplantis ilin en Xigou. Post kelkaj jaroj la arboj komencis doni fruktojn. De tiam, ĉu la pomarboj aŭ la produktokvanto de pomoj plimultiĝis jaron post jaro. Nun la brigado ĉiujare produktas ĉ. 200 tunojn da pomoj. Montrante al mi nuks-, vinber-, pir- kaj aliajn fruktajn arbojn apud la vojo, Zhao ĝoje diris: "Nun multspecaj fruktarboj jam kreskis en nia brigado."

Parolante pri forstumado, Zhao rakontis al mi jenan epizodon. Tio okazis en printempo de 1953: Li Shunda kaj novaj kooperativanoj ĉiutage semis arbojn sur montoj de la frua mateno ĝis la malfrua vespero. Ili tiel semis 20 hektarojn, sed nur tre malmultaj el ili burĝonis. Iuj moke diris: "Kiom da fortoj Li Shunda movis por tio, sed vivas nur unu arbo!" Aŭdinte tion, Li Shunda ne koleris kaj diris al la kooperativanoj: "En la pasinteco, sur niaj montoj estis neniuj arboj. Nun burĝonas unu arbo, tamen tio montras eblecon vivi pli da arboj sur la montoj!" Sed ankaŭ li ne komprenis, kiel tiom da semoj ne burĝonis. Li konsultis arbo-kulturanton Wu Houli kaj trovis la kaŭzon. De tiam ĉiujare Xigou-brigado faris

arboplantadon. Nun sur ĉiuj sensunaj montdeklivoj estas pinoj kaj cipresoj, kaj sur ĉiuj sunaj montdeklivoj herboj, kio ne nur konservas akvon kaj teron, sed ankaŭ akcelis disvolviĝon de brutobredado. Nun 800 hektaroj da pinoj kaj cipresoj jam komencis liveri lignojn.

### ŜANGIĜO DE LA MALRIĈA MONTREGIONO

Sub la gvido de la Partio, la kamparanoj de Xigou-brigado multe ŝanĝis la fizionomion de sia loko dank' al sia 30-jara penema laborado.

Antaŭ la Liberiĝo, en Xigou estis multaj fuĝintoj kaj almozuloj; iuj eĉ vendis siajn gefilojn pro mizera vivo. Hodiaŭ ĝin regas prospereco de ĉiuj entreprenoj, kaj la loĝantoj vivas feliĉe. Nun, en antaŭaj dezertaj valoj oni konstruis 650 kultureblajn terpecojn kun totala areo de 33 hektaroj, 7 akvokonservejojn kaj digojn kun longo de pli ol 6,000 metroj. En la lastaj ok jaroj, la meznombra hektara produktokvanto de greno de la tuta brigado superis 7,500 kilogramojn, la jara porcio de greno por ĉiu komunumano superis 200 kilogramojn kaj ĉiu labortago kostis ĉ. 1 juanon. Krom la greno uzata por semoj, furaĝo kaj rezervo, la brigado ĉiujare vendas al la ŝtato 150 tunojn da greno. Kun disvolviĝo de agrikulturo, forstumado kaj brutobredado, la brigado aĉetis traktorojn, semilojn, draŝmaŝinojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn kaj funkciigis muelejon, olepremejon, brikfarejon, plastfabrikon kaj maŝinriparejon.

Oni ankaŭ rakontis al mi disvolvigon de produkto de la brigado: En 1952, kiam fondiĝis la

kooperativo, la totala enspezo estis 41,000 juanoj, 92% de kiuj venis de agrikulturo kaj 8% de forstumado kaj brutobredado. En 1958, kiam stariĝis la popola komunumo, la totala enspezo estis pli ol 90,000 juanoj, kies 70% konsistigis agrikultura enspezo kaj kies 30% enspezo de forstumado kaj brutobredado. En la sepdekaj jaroj, la jara totala enspezo superis 300,000 juanojn, el kiuj malpli ol 30% venis de agrikulturo kaj pli ol 70% de la aliaj du flankoj.

### ĜOJO DE LA KOMUNUMANĜOJ

Dum restado en Xigou-brigado, mi ankaŭ vizitis familiojn de kelkaj kamparanoj.

En la okcidenta parto de la brigado estas malgranda vilaĝo Houbei kun nur tri familioj. Ĉirkaŭ la domoj kreskas multaj fruktarboj, kaj en la kortoj petolas aroj da kokoj kaj kunikloj. Kiam mi eniris iun korton, tri knaboj elpaŝis renkonte al mi. Ĝuste tiam la patrino de la knaboj revenis hejmen pelante gregon da bovoj.

La virino nomiĝas Fang Haizhen. Informiĝinte, ke mi venis de Bejing, ŝi varme prezentis pleton da aromaj pomoj kaj nuksoj, dirante: "Ni havas neniun frandajon por vin regali, bonvolu gustumi la lokajn fruktojn."

Fang Haizhen kaj ŝia edzo fuĝis tien ĉi kune kun siaj gepatroj antaŭ la Liberiĝo. Post la Liberiĝo, ili aliĝis al la kooperativo kaj ekhavis feliĉan vivon. Ili havas kvar infanojn. Kiam la infanoj iom post iom elkreskis, ŝi liberigis sin de dommas-trumado kaj ekpaŝtis bovojn por la brigado. Por bone paŝti la bovojn, ŝi ĉiutage frue eliris kaj

malfrue revenis. Ĉiuj bovoj paŝtataj de ŝi fariĝis grasaj, kaj pro tio ŝi estis laŭdata de la komunumanoj kaj premiita de la brigado kaj komunumo.

Parolante pri sia familia vivo, Fang Haizhen diris: “Pasinte ni ĉiujare devis pleniĝi la stomakon per branoj kaj legomoj, kaj nun ni ne plu sin ĝenas pro manĝo kaj vestoj. En la jarfina distribuado de 1979 ni nete ricevis 664 juanojn post pago por grenporcio.” Mi demandis: “Ĉu vi havas deponitan monon en banko?” Ŝi respondis: “La tuta ricevita sumo estas deponita!” Mi demandis kun dubo: “Ĉu vi ne bezonis monon por ĉiutaga elspezo?” Fingre montrante fruktarbojn ĉirkaŭ la domo, ŝi diris: “Rigardu, ili donas al mi monon! Mi ricevis pli ol 300 juanojn per vendo de pomoj, nuksoj, kokovoj, porko, kuracherboj kaj aliaj produktaĵoj.” Aŭdinte tion, mi ekkomprenis, ke la kamparanoj havas nemalmultajn enspezojn de diversaj flankokupoj!

La vivo de familio de Fang Haizhen estas miniaturo de tiu



*Li Shunda semas arbojn kune kun komunumanoj.*

de la komunumanoj en Xigou-brigado. Post la agrikultura kolektivigo, la vivo de ĉiu familio pliboniĝis tagon post tago. Precipe post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la agrikulturaj politikoj de la Partio estas efektivigataj, laŭ kiuj la komunumanoj denove ricevis parcelon

por privata uzo kaj povas libere sin okupi pri hejmaj produktoj. Pro tio, plejparto de la komunumanoj havas superfluaĵajn grenon kaj monon, la kvanto de superflua greno de iuj familioj eĉ atingis 500 kilogramojn kaj la sumo de deponita mono 1,000 juanojn.

WEN BING:

## Knabinoj tefoli-kolektantaj



*Ĉu kolor-nuboj kisas dorson de la montserio?  
Ĉu buntaj juvoj rebriletas de la nubostrioj?  
Popolaj kantoj fluas kun la nuboj kaj riveroj,  
elsorĉas ĉarmon ebriigan de l' te-idilio.*

*La lertaj manoj flugas kiel flirtaj papilioj,  
jen supren jen malsupren inter verdaj te-folioj.  
Ho, vi, knabinoj, la junecon ŝvitas pro l' te-arboj;  
je via amo plenas tasoj de mil familioj. . .*

# PLEJ ELSTARAJ SPORTISTOJ DE ĈINIO

*Je la fino de 1979, pli ol 90 mil sportaj amatoroj de  
Ĉinio per baloto elektis la jenajn dek sportistojn kiel  
plej elstarajn.*

*La Red.*

**Chen Xiaoxia**, plonĝistino, 17-jara. Ŝi gajnis oran medalon de turoplonĝo en la Oka Azia Sportkunveno de 1978. Kaj en 1979 ŝi gajnis oran medalon de turoplonĝo kaj arĝentan medalon de trampiloplunĝo en la Deko Monda Studenta Sportkunveno.

**Chen Weiqiang**, halterlevisto, 21-jara. Li kreis la mondan rekordon per dumana etendo de 153 kg. (pezkategorio 56 kg.) en la 33-a Monda Halterleva Ĉampioneca Konkurso okazinta en Grekio en novembro de 1979.

**Ge Xin'ai**, tablotenisistino, 26-jara. Ŝi gajnis la ĉampionecon de virina unuopa ludo en la 35-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca

Konkurso de 1979. Ŝi kun aliaj tablotenisistinoj gajnis la ĉampionecon de virina teama konkurso kaj kun alia tablotenisisto gajnis la ĉampionecon de gea parludo.

**Wu Shude**, halterlevisto, 19-jara. Li gajnis oran medalon per dumana ŝiro de 110 kg. (pezkategorio 52 kg.) en la Monda Halterleva Ĉampioneca Konkurso okazinta en Grekio en 1979.


**Rong Zhixing**, futbalisto, 31-jara. Li estas fama ĉina futbalisto. En la Beijing (Pekin)-a Internacia Futbala Invita Turniro de 1977, kiam ambaŭ flankoj estis egalaj per du poentoj kontraŭ du, li returne piedbatis alten kaj ŝotis la pilkon en golon

kaj tiel gajnis la venkon por la ĉina teamo.

**Nie Weiping**, vejĉioludisto, 27-jara. En la Monda Amatora Vejĉia Ĉampioneca Konkurso okazinta en Japanio en 1979, li gajnis la ĉampionecon. Dum la lastaj jaroj li ludis en 23 matĉoj respektive kun 17 naŭgradaj vejĉioludistoj de Japanio, li gajnis 14 matĉojn, egalis rivalojn en 2 matĉoj kaj perdis 7 matĉojn. Tial oni nomis lin "vento-kirlo Nie".

**Luan Jujie**, skermistino, 21-jara. En la finalo de la 29-a Monda Junulara Skerma Ĉampioneca Konkurso de 1978 ŝi venkis kelkajn eŭropajn skermistinojn


*Wu Shude*




*Rong Zhixing*




*Nie Weiping*







*Chen Xiaoxia*



*Chen Weiqiang*



*Ge Xin'ai*

kaj gajnis arĝentan medalon. Kaj en la Oka Azia Sportkunveno de 1978 ŝi gajnis la ĉampionecon de virina rapirado.

**Zou Zhenxian**, atleto, 23-jara. En la atletika turniro inter Ĉinio kaj Japanio en 1978, lia trisalto atingis 16.90 metrojn. En 1979, li kreis novan rekordon de 17.02 metroj en la Azia Atletika Ĉampioneca Konkurso okazinta en Japanio. Kaj tiel li fariĝis la unua trisaltisto de Azio, kiu superis 17 metrojn.

**Song Xiaobo**, korbopilkinisto, 21-jara, kiu altas 1.82 metrojn kaj ludas kiel avanulino kaj la

dua halfino. Ŝi vigle moviĝas kaj pilkotrafas altaprocente. Ŝi plurfoje vizitis multajn landojn de Azio, Afriko, Eŭropo kaj Latinameriko kaj partoprenis tie en konkursoj.

**Wu Xinshui**, korbopilkinisto, 35-jara, altas je 1.78 metroj. Li kondukas la pilkon rapide kaj povas trarompi defendon de la kontraŭa teamo. En la konkurso kontraŭ la usona teamo li multfoje kondukis la pilkon en la malantaŭa placo de la rivalo, trarompis plurajn defendliniojn kaj sukcesis atingi la rivalan korbon.





*Wu Xinshui*

*Luan Jūjie*

*Zou Zhenxian*

*Song Xiaobo*





# La Sep Steloj-rokoj

de BIAN DIANTAI

ĈINOJ ofte diras ke “la montoj kaj akvoj de Guilin estas la plej belaj en la tuta lando” kaj “la pejzaĝoj de la Okcidenta Lago ekfamigis jam de antikveco”. Fakte, la pejzaĝoj de Sep Steloj-rokoj en Zhaoqing de Guangdong-provinco estas ne malpli ĉarmaj ol tiuj de Guilin (Gujlin) kaj la Okcidenta Lago. Poemo pri ĝi diras:

*De l' Okcidenta Lago prunt-  
prenitas klara akvo,*

*de Yangshuo (Jangŝuo) estas  
translokitaj la sep krutaj  
montoj.*

*Graciaj plorsalikoj aldonigis  
al la digoj,*

*Jen, vere ĉarma bild' sen-  
morta en la homa mondo.*

Ĉar la Sep Steloj-rokoj posedas la ĉarmon de la Okcidenta Lago kaj de la karstaj montoj de Yangshuo de Guilin, tial ili fariĝis fama pitoreskejo por turistoj.

Ĉe la fronta enirejo de ili troviĝas unu antikva portalo kun la vortoj Sep Steloj-rokoj sur ĝia supro. Trapasinte ĝin, oni povas vidi antaŭ si vastan lagon ondantantan en zefiro. La lago estas dividita de verdaj kaj zigzagaj digoj kun longeco de 22 km. en plurajn pecojn interligatajn. En la lago, dekstre de la longa digo, estas du naĝbasenoj, maldekstre de ĝi surakva restoracio kun ruĝaj muroj, verdaj tegmentoj kaj supren levitaj tegmentanguloj kiu ŝajnas miraĝo flosanta sur la akvo. Ĉi tie turistoj povas ĝui purpuran, iom acidan

kaj aparte aroman trinkajon faritan el la loka planto purpurafolia begonio (*Begonia fimbripulata*).

Sur la digo kuŝas asphaltita ebena vojo kun verdaj arboj kaj floroj ambaŭflanke. Piedirinte ĉ. 40 minutojn laŭ la digo, oni povas vidi antaŭ si sep rokojn sur la lago viciĝintajn de la sudoriento ĝis la nordokcidento. Ili estas famaj Sep Steloj-rokoj. Popola legendo diras, ke la sep malsamaj rokoj formigis el sep falintaj steloj. Tial ili portas la supre diritan nomon.

Langfengyan estas la unua roko, sur kiu kreskas densaj arboj kaj sub kiu estas mirindaj kavoj. Dum printempo kaj somero, interne de ili akvogutoj falas kaj frapas suban akvon, kaj sekve aŭdiĝas ĉarma resonado, kiu similas al tiu de sonorilo kaj tamburo.

Tuj apud Langfengyan estas roko Yupingyan, kiu aspektas kiel granda ekrano kaj blanka kiel jado. Laŭ la ŝtonaj ŝtupoj oni povas ascendi la rokon. Ĉe ĝia talio vidiĝas granda ŝtono kies duono kuŝas apud la ŝtonaj ŝtupoj kaj la alia duono elstariĝas en aero. Kiam oni perkutas ĝiajn malsamajn partojn, ĝi eligas malsamajn sonojn, tial ĝi portas la nomon “Ok-sona Ŝtono”. Preterpasinte la ŝtonon, oni venas al la arbaro de groteskaj ŝtonoj. Okcidente de la vojo estas profunda puto kun akvo dum la tuta jaro. Kiam oni estas

Ferĉena Ponto



*Stela Lago*



jetinta ŝtonon en ĝin, aŭdiĝas pum kun longa resonado. De tie oni povas ascendi la roksupron, kie estas la restoracio Yuping por turistoj.


Descendinte la rokon kaj trapasinte la Sep-stelan Ponton, oni venas al la fame konata antikva templo Shuiyuegong, kiu konstruiĝis en la komenco de Ming-dinastio en la 14-a jarcento kaj havas tri halojn, la antaŭan, mezan kaj malantaŭan. Ĝiaj originaj konstruaĵoj jam ruiniĝis en militoj sinsekvaj en la historio. La unua templo estis rekonstruita post la fondiĝo de la popola respubliko. En ĝi ofte okazas ekspozicioj de belartoj, kaligrafiaĵoj kaj elterigitaj antikvaĵoj. Inter ili la plej okulfrapa estas dentaj fosilioj de pando, elterigitaj en la norda parto de la pejzaĝa loko en 1958. Laŭ esploro, antaŭ centmiloj da jaroj, tie kreskis primitivaj arbaroj kaj vivis multaj bestoj. La fosilioj montris, ke la


praavoj de la pandoj, kiuj vivas nun en Sichuan (Siĉuan)-provinco, iam vivis en la regiono Zhaoqing de Guangdong.

Laŭ la vojeto malantaŭ la templo, oni povas ascendi la ĉielskrapantan rokon Shishiyan. Supre de ĝi estas teraso, la plej alta supraĵo el la sep rokoj. Tie oni povas vidi la tutan lagon, la longan digon similan al fadeno kaj ondantajn montĉenojn en

malproksimeco. Sub la roko estas granda kaverno, kies ŝtonaj muroj surhavas pli ol 300 pecojn da gravuritaj kaligrafiaĵoj kun malsamaj stiloj de ĉiuj periodoj de la dinastio Tang (618-907 p.K.). Tiu loko estis difinita de la ŝtato kiel grava antikvaĵo protektenda. En la kaverno sin trovas diversformaj stalaktitoj kaj stalagmitoj, laŭ la formoj oni donis al ili diversajn intere-

*Xinghu-parko*






Parto de la Sep Steloj-rokoj

sajn nomojn, kiaj “Karpō Eligas Akvon”, “Kokino Kovas”, “Aglo Etendas Siajn Flugilojn” ktp. Unu ŝtono povas eligi grandan bruon je frapo per mato kaj

pro tio ĝi portas la nomon “Ŝtona Tamburo”. Alia ŝtono nomata “Ŝtona Korno” povas hupadi, kiam oni blovas ĝin per la buŝo.

Shuangyuandong estas la plej granda kaverno de la Sep Steloj-rokoj, en ĝi estas larĝa rivero longa je pli ol 270 metroj. Ĉe la fino de la kaverno estas natura “palaco”, en kiu multaj ŝtonaj kolonoj staras kvazaŭ tiuj en vera palaco, kaj paro da stalagmitoj antaŭ la kolonoj kvazaŭ leonoj kaŭrantaj antaŭ la ŝtonaj ŝtupoj. Antaŭ ili estas malgranda baseno. Kiam diverskoloraj lamplumoj speguliĝas en la akvo de la baseno, ja prezentiĝas bildo de fea mondo.

De 1956, la ŝtato riparigis la Sep Steloj-rokojn, konstruis digon longan je pli ol 5 km., plivastigis la lagon je pli ol 400 hektaroj, verdigis montojn kun areo de pli ol 150 hektaroj per plantado de milionoj da arboj kiel liĉioj, mangoj, pampelmusoj kaj aliaj specoj. Kaj krome, ĝi sinsekve konstruis pli ol 50 belajn pavilonojn, kioskojn kaj pli ol 40 hotelojn, restoraciojn kaj sanatoriojn. Ĉio ĉi tio faris la Sep Steloj-rokojn pli ĉarmaj.



## ELILOGO EI LA DOMO

(humoraĵo)

Zhu estis ŝercemulo. Iun tagon li estis en la domo de Tang. La lasta diris: “Vi estas famkonata pro spriteco. Nun mi sidas endome, ĉu vi povas logi min eksteren?” Zhu diris: “Estas malvarme ekstere. Vi certe ne volas

eliri. Se vi staros ekstere, mi povos logi vin internen.” Tang jesis kaj eliris, dirante: “Ĉu vi povas logi min internen?” Zhu ekridis, aplaudante: “Mi jam logis vin eksteren.”

# 60 JAR- OJN EN BEIJING

de Li Kuchan



*Li Kuchan en pentrado*

**L**A nova Ĉinio aĝas 30 jarojn. Mi venis al Beijing (Pekino) antaŭ 60 jaroj, kaj tiel kalkulite, mi vivis 30 jarojn en la malnova Beijing kaj 30 jarojn en la nova. La du malsamaj periodoj antaŭ kaj post la Liberiĝo estis drastaj antitezoj kaj enhavis multajn amaraĵojn kaj ŝanĝojn. Nun, kiam nia lando estas iranta al reordigo, mi rememoris multajn pasintaĵojn kaj tio vekis ĉe mi grandan eksciton.

Mi aĝas 82 jarojn kaj okupis min de juneco pri belarta instruado kaj ĉinstila pentrado. Oni nomas pikturon arto studanta verecon, bonecon kaj belecon. Tamen mia artista vivo estis preskaŭ ĉiam akompanata de suferoj.

Mi devenis de familio de malriĉa kamparano, kaj mi decidis lerni pentradon sub la influo de

iu templa farbisto. Post multaj klopodoj mi sukcesis veni al Beijing en 1919. Tie mi havis kontakton kun la Duonlabora kaj Duonstuda Asocio, kiu helpis min en mia vivteno. Poste mi studis literaturon en la Beijinga Universitato kaj pikturon en la Stata Arta Instituto. Sed per kio mi vivtenu min? Mi laboris nokte kiel rikiŝisto. Tiam en vintro estis multe pli froste ol nun. La norda vento penetris min tra mia vatita robo ĝis la ostoj. En la lernejoj mi aktivadis ofte sola kaj min tenis malproksime de riĉaj kunlernantoj por eviti ilian malestimon al mi. Por daŭrigi mian lernadon, mi vivis tre modeste, ekzemple, kelkfoje mi devis pentri per krajonostumpoj forjetitaj de aliaj. En plej malfacilaj tagoj mi havis ĉiutage nur kaldronon da kaĉo. Se mi iris ien, ĉiufoje mi uzis miajn

piedojn, malgraŭ longa distanco. Ho, kiel malfacile por lerni pentradon! Tial mia kolego donis al mi kromnomon "Kuchan", signifantan "mizeran pentriston". Iuj proponis al mi preni alian nomon bonaŭguran, sed mi ne tiel faris kaj daŭre portis tiun nomon ĝis nun.

Komence mi lernis la okcidentan pikturon kaj miaj instruistoj estis fama ĉina pentristo Xu Beihong kaj kelkaj fremdlandanoj. Tiam la aĉeto de materialoj kaj vendo de pentraĵoj dependis de fremduloj (ĉar ĉinoj malofte aĉetis olepentraĵojn), kaj el tio la fremduloj multe profitis kaj sendube ofte ofendis min. Poste, pro malriĉeco kaj ŝato al la tradicia arto, mi komencis lerni ĉinstilan pentradon. Tiam en Beijing loĝis multaj famaj pentristoj, tamen la stilo de iliaj



Falko

penetraĵoj estis rutina kaj la atmosfero en la pentrista rondo sufoka. Sed tiam estis pentristo ne tre fama, kiu havis sian propran stilon kaj ne lasis sin katenita de la rutinaj metodoj de antaŭuloj. Li estis s-ro Qi Baishi. Mi decidis lerni de li. En 1923, kiam mi aĝis 26 jarojn, mi unuafoje vizitis lin. Majstro Qi akceptis min afable kaj havis grandan simpatian al mi pro mia mizera vivo, ne postulante de mi kotizon. Li estis senlaca en sia instruado. Ĉiu-

foje, kiam li finis sian penetradon, li interparolis kun mi pri pentra tekniko. Li volis, ke oni prezentu sian travivaĵon per pentrado, sed ne kopiu liajn verkojn. Lia neordinara diligenteo en pentrado ĝis nun ankoraŭ inspiris min. Poste mi fariĝis profesoro, sed en tiuj jaroj estis senĉesa batalado inter militaristoj, tro rapida altiĝo de prezoj, malpliigo de salajro. La vivo ne povis esti garantiata. Mi devis instrui en pluraj lokoj kaj vendi miajn penetraĵojn por

akiri minimuman panon por la vivo. Pro mia situacio mi amikiĝis kun iuj malriĉuloj kaj just-amaj personoj. Tiam en kaj ekster la urbo Beijing aktivadis subteraj komunistoj, precipe kiam Beijing estis sub la regado de japanaj agresantoj. Ofte okazis, ke nekonatoj estis venigitaj de miaj amikoj en mian dometon por kaŝiĝi aŭ pasloĝi. Tiam mi jam forlasis la instruadon kaj vivtenis min per vendo de miaj penetraĵoj. Mi aĉetis kelkajn malnovajn vestojn kontraŭ miaj penetraĵoj kaj ilin donacis al la pasloĝantoj, por ke ili sin alivestu, kaj ankaŭ donis al ili iom da poŝmono por vojaĝo. Jen pro tio mi estis denuncita de malbonulo kaj enkarcerigita de japanaj ĝendarmoj. Iliaj kruelaj batoj kaŭzis al mi grandan cikatron sur la kruro.

En 1949 Beijing estis liberigita. Pro ia hazarda kialo mi renkontis malfacilojn en la vivo. Mi tuj ekmemoris prezidanton Mao, kun kiu mi konatiĝis en la Duonlabora kaj Duonstuda Asocio. Mi sendis al li grandliteran leteron kun longeco de 3 metroj. Nelonge poste, prezidanto Mao skribis al Xu Beihong, ĉefo de la Centra Belarta Instituto, leteron, en kiu mi estis menciita. Kaj krome, li sendis sian sekretarion viziti min, kio multe kortuŝis min. La sekretario diris: "Prezidanto Mao havas multajn laborojn kaj ne povas viziti vin. Tamen li taskis tion al mi. Li diris, ke nun nia lando ankoraŭ havas grandajn malfacilojn en ekonomio, sed ili baldaŭ forpasos, kaj nia vivo sendube pliboniĝos. Li diris ankaŭ, ke vi devas daŭrigi vian penetradon kaj pentri por niaj posteuloj..." Mi diris: "Prezi-

danto Mao estas tre okupita de la ŝtataj aferoj. Mi ne devas ĝeni lin per miaj bagateloj kaj mi tre pentis pri tio..." Post nelonge prezidanto Mao sendis solvi la malfacilojn en mia laboro kaj vivo.

Post la Liberiĝo mi okupis min ĉefe pri instruado de pentrarto kaj kelktempe partoprenis en iuj sociaj aktivadoj. Por ke la instruatoj lernu pli multe, mi aplikis la metodon de demonstrado samtempe kun pentrado. Mi pentris kion la instruatoj demandis. Kaj tiamaniere la instruatoj povis facile kompreni. Mi havis lernantojn el Egiptio, Hindio, Ĉeĥoslovakio k.a. Ni starigis inter ni amikecon, kaj mi ankoraŭ bone memoras nun iliajn vizaĝojn kaj nomojn.

Mi estis plurfoje invitita pentri antaŭ fremdlandaj amikoj. Ili montris grandan intereson pri la ĉina pikturo. Dum mia pentrado ili iom ekkriis de ekscitiĝo kaj ĉirkaŭprenis min. Foje mia kolo tre jukis de la malmola barbo de iu fremdlanda amiko. Tamen ni ĉiuj dronis en gajeco. Mi ĝojis, ke miaj pentraĵoj ludas certan rolon en plifirmigo de la amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Dum la periodo de la kvarpersona bando, mi kaj multaj kamaradoj estis persekutataj. Fine venis la ĝojiga informo pri venko super la bando, kaj multaj intervizitis transdirante la informon. Kun granda ĝojo mi faris plurajn pentraĵojn de plene disvolviĝantaj ruĝaj umefloroj kaj sendis ilin al la ekspozicio en la Ĉina Belarta Domo. Nun mi kaj miaj kolegoj reprenas la penikon por la ŝtato en la Krea Grupo de Ĉinstilaj Pentraĵoj.



*Gruo kaj Pizango*

# Sciencistino Lin Lanying

**I**UN fruvintran tagon mi iris viziti faman ĉinan transistoro-fizikistinon Lin Lanying. Ŝi atendis min antaŭ pordo de iu simpla etaĝdomo en la loĝkvartalo Hepingli de Beijing (Pekino). Ŝiaj haroj tute blankiĝis, tamen ŝi iris firmpaŝe kaj kondukis min en sian domon.

“Mi tre bedaŭras, ke mi ĝenas vin en dimanĉo,” mi diris.

“Ne, tute ne.” Ŝi kondukis min en la akceptejon kaj verŝis teon por mi dirante: “Gustumu, ĝi estas fame konata teo alportita de mi antaŭ nelonge el Anhui-provinco.”

Sia apartamento sin trovas en la dua etaĝo de la domo. La du ĉambroj frontantaj al sudo estas dormoĉambroj de ŝi kaj ŝia nevo kaj lia edzino. Sur la balkono metiĝas florvazoj.

La 61-jara Lin Lanying ne edziniĝis. Kiam mi demandis ŝin pri ŝia vivo, ŝi serene diris: “Nemalmultaj transmaraj amikoj maltrankviliĝas pro mi, ili opinias min certe soleca en mia maljuneco. Efektive mi havas tre agrablan vivon.”

Ŝi diris al mi, ke ĉiutage ŝi elitiĝas je la 5-a horo kaj iras labori en la Transistora Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj je duono post la 7-a kaj hejmenrevenas post la 7-a vespere. Kaj tio jam fariĝis ŝia kutimo en la pasintaj pli ol 20 jaroj. Tage ŝi estas tre okupita de laboro kaj havas tempon por legi nur nokte.

Ŝia nevo estas aŭtoriparisto kaj lia edzino laboras en ledaja fabriko. Ili tre zorgas pri sia onklino. Ĉar ili ne dungis servistinon, ili ambaŭ prenas sur sin ĉiujn hejmajn laborojn, kiel preparo de manĝo, aĉeto de legomoj kaj lavo de vestoj. En postlabora tempo Lin Lanying plej ŝatas ludi kun sia trijara nepino Lin Lan. Ŝi rakontas al ŝi diversajn fabelojn kaj lernigas al ŝi fremdan lingvon. La infano vere fariĝis ŝia amata perlo.

Pro okupiteco Lin Lanying kaj ŝia familio malofte vizitas parkojn. Kelkiam la knabineto nepre volis viziti parkon kaj la geedza paro senescepte tiris Lin Lanying kune kun ili. Foje iu usona amiko de Lin Lanying regalis ŝin per manĝo en restoracio en Beihai-parko. Vidante la harmonion en ilia familio, la usona amiko tre admiris ilin.

Lin Lanying tre emociiĝis parolante pri sia pasintaĵo.

En 1918 ŝi naskiĝis en riĉa familio en Fujian (Fugian)-provinco. Pro kateno de feŭdismo ŝi malfacile sukcesis viziti mezlernejon. Tamen inter la lernantoj ŝi estis la sola knabino. La knaboj malestimis ŝin kaj malofte parolis kun ŝi.

En iu ekzameno de matematiko Lin Lanying per pli ol 90 poentoj gajnis la unuan lokon inter la 14 lernantoj. Tio okazis nehazarde, sed rezultis el ŝia diligenta lernado.

En 1940 ŝi diplomitiĝis el la Unia Universitato de Fujian kun tre bona atesto. Post tio ŝi eklaboris kiel instruistino en la universitato. Ŝajne ŝi povis vivi kun levita kapo, sed efektive ne. Ne-niom ŝanĝiĝis la situacio, en kiu la virinoj estas malestimataj, kaj ŝi preskaŭ maldungiĝis. Ŝi indigne forlasis la patrolandon kaj veturis al Usono por studi matematikon kaj ankaŭ fizikon kaj kemion en Dickanson-kolegio. Tiam dekano de la matematika fakultato profesoro Aryes trovis ŝin rimarkinde talenta kaj tre atente kulturis ŝin. Tiam profesoro Aryes estis kompilanta fakan libron “Diferenciala kaj Integrala Kalkulo”, en kiu estis multaj matematikaj problemoj, kiuj bezonis solvon. Tiun taskon li komisiis al Lin Langying. Samtempe kun konstanta aŭskulto de lekcioj, ŝi tre bone plenumis la taskon en la difinita tempo. Finleginte ŝiajn klarigajn notojn, la profesoro ne povis sin deteni de ĝojo kaj emocie diris al ŝi: “Mi rekomendos vin al Ĉikago-universitato, kie vi skribu doktoran disertaĵon, kaj vi certe sukcesos.”


En somero de tiu jaro Dickanson-kolegio de  $\phi\beta K$  okazigis kunvenon ĉeestitan de ĉiuj ĝiaj membroj kaj donis al Lin Lanying delikatan oran ŝlosilon. La ora ŝlosilo estis atesto de la nomita asocio. Kun ĝi oni povis partopreni en ĉiuj akademiaj aktivadoj de tiu asocio en la tuta Usono.



Guste en tiu jaro fondiĝis la nova Ĉinio. La koro de Lin Lanyingondiĝis kiel maro. Tamen ŝi studis en Usono nur unu jaron kaj ne estis tempo por ŝi reveni al la patrolando. Se ŝi revenos en iu tago estonte, kion ŝi alportu al ĝi? Lin Lanying kun dankemo rifuzis la proponon de profesoro Aryes kaj iris studi solidan fizikon en Pensilvanio-universitato, ĉar ŝi vidis, ke solida fiziko multe prosperis en Usono post la Dua Mondmilito kaj ĝi jam montris fortegan vivopovon nur en kelkaj jaroj. Ŝi opiniis, ke por konstrui novan prosperan Ĉinion nepre necesas tiu scienco.

Post kvin jaroj okazis la 200-jara jubileo de la fondiĝo de Pensilvanio-universitato. En la diplomada ceremonio okazigita dum la jubileo Lin Lanying estis titolita doktorino pri solida fiziko. Ŝi estis la unua doktorino en tiu fakoj en la universitato. Post la diplomitiĝo en la nomita universitato ŝi laboris kiel altklasa inĝeniero en iu fama transistora kompanio de Usono. En 1957 ŝi kun plena entuziasmo revenis al la patrolando forlasita de ŝi antaŭ 9 jaroj. Tiam Ĉinio ĵus ellaboris sian 12-jaran planon de scienco kaj tre bezonis rapidan disvolvon de transistora scienco. Kiam respondeculo de la instituto prezentis al ŝi esploran planon, ŝi foliumis ĝin kaj kuntiris la brovojn.

Tiu plano estis ellaborita sub la helpo de iu fremdlanda specialisto. Laŭ ĝi Ĉinio estis povonta entrepreni “esploradon pri kreskiĝo de solkristala materialo” nur en la sesdekaj jaroj. Lin Lanying diris: “Se ni plenumus tiun planon, eĉ ombron de transistoro ni ne povus vidi en la sepdekaj jaroj.”



*Lin Lanying en laboro*

Lin Lanying bone konis solkristalan teknikon en fremdaj landoj, kaj ŝi kun grupo da teknikistoj sub sia gvido komencis la esploradon. Post pluraj monatoj ili elfaris la unuan stangeton de solkristala silicio de nia lando, kio skuis sciencajn rondojn en kaj ekster Ĉinio.

Sed la problemoj de kristala pureco ne estis solvita, kaj apartaj elementoj faritaj el ĝi funkciis nestabile. La ĉefa kaŭzo kuŝis en tio, ke mankis al ili necesaj ekipaĵoj. Tiun malfacilon ŝi neniam renkontis en Usono. Ŝi konsciis, ke Ĉinio devas iri sian propran vojon en fabrikado de duonkondukaj materialoj.

Ŝi kaj aliaj teknikistoj iris inter la laboristojn por kune fari kaj reformi ekipaĵojn. Dum provfarado de solkristala forno

la laboristoj montris grandan fervoron kaj saĝon kaj Lin Lanying elmetis projekton pri nov-tipa forno. Aŭtune de 1962 la solkristala forno estis sukcese farita, kaj dank’ al ĝi la solkristalaj materialoj de nia lando rapide proksimiĝis al la internacia avangarda nivelo. Oni forprenis de tie kristalajn grajnoj kaj semis ilin sur la vasta tero de la patrolando.

En la meza periodo de la sesdekaj jaroj Lin Lanying komencis esploradon de nova materialo — arsenika galiumo. En la kultura revolucio ŝi devigite ĉesis fari esploradon dum certa tempo. En 1972 ŝi kaj aliaj sciencistoj denove sin ĵetis en la esploradon pri malaltigo de normo de delokiĝo de arsenika galiumo. Por plenumi tiun laboron, ŝi persone prilaboris kris-

## En korto de Beijing

**E**STIS tre frostaj la februaraj tagoj de Beijing (Pekino). Ankoraŭ ne degelis la rivera glacio nek verdiĝis la salikoj.

Tamen la Beijing-anoj sin preparis por la Printempa Festo. Tiu festo, la novjara tago laŭ la luna kalendaro, estas plej ĝojplena tradicia festo de la ĉina popolo. Kiel ordinaraj loĝantoj traktas sin reciproke en ĉiutaga vivo? Antaŭ la Printempa Festo mi vizitis korton en la kvartalo Dongsj.

### I

Ĉiuj, kiuj bone konas Beijing, scias, ke la korto ĉirkaŭita de muroj kaj brikaĵoj loĝdomoj en la oriento, sudo, okcidento kaj nordo estas ĉefa formo de la antikvaj loĝdomoj de Beijing. En malgranda korto loĝas tri aŭ kvar familioj kaj en granda korto pli ol 10 familioj, kaj troviĝas ankaŭ korto kun unu sola familio. Kvankam vicoj kaj vicoj da

novtipaj etaĝdomoj stariĝis post la Liberiĝo, tamen multaj malnovaj Beijing-anoj preferas tian kvietan, oportunan korton.

La korto, kiun mi vizitis, konsistas el tri kortetoj unu post alia, en kiuj loĝas 10 familioj. En la korto ĉiuj loĝdomoj estas unuetaĝaj, brikaĵoj kaj puraj. Kiam mi venis al la korto, Zhao Suzhen, komitatano pri virinaj aferoj de la loĝkvartala komitato, estis kudranta en sia hejmo. Vidinte min, ŝi tuj stariĝis kaj afable akceptis min. Subite mi estis altirita de diverskoloraj pecoj de ŝtofo kaj ĵus faritaj lanŝtofaj pantalonoj sur tablo.

“Vi faris tiel multe da vestoj por viaj familianoj?” mi miris.

“Ne, por niaj najbaroj.”

“Kia lerteco!” mi laŭdis.

“Bagatelo mi faris. Ĉe alproksimiĝo de la Printempa Festo ĉiuj en niaj kortoj estas tre okupitaj!”

Zhao Suzhen sidiĝis. Funkciigante la kudromaŝinon ŝi rakontis al mi pri la korta frateco.

Ĉiuj loĝantoj en la kortoj konkure faris purigadon. Precipe kelkaj maljunuloj balaadis en kaj ekster la korto ĉiutage. Ili diris: “Ni prenis sur nin la tutan purigadon, ĉar la aliaj loĝantoj estas tre okupitaj.” En la kortoj ĉie kaj ĉiam estas pureco.

Se unu familio havas malfacilon, aliaj ĝin helpas memvole. Antaŭ nelonge la filino de Zhang Encai estis toksita de gaso, kaj la familianoj estis maltrankvilaj kaj ne sciis kion fari. Informiĝinte, najbaroj alrapidis kaj la knabino saviĝis.

La juna fraŭlo Niu Xijian iras al fabriko frue. Ĉiutage la emerita laboristo Hou plenigas por li la termoson. En frosta vintro la maljunulo ofte hejtas por li la fornon. Ankaŭ la lasta multe respektas la antaŭan. La filino de la maljunulo laboras en an-

talajn pecojn kaj faris mezuradon

En marto de 1978 Lin Lanying kaj ŝiaj kolegoj prezentis al la Tutlanda Scienca Konferenco la frukton de sia esplorado — arsenikan galiumon, kies delokiĝa normo atingis la mondan avangardan nivelon. Ili prezentis ankaŭ oranĝflavan, brilan

fosforikan galiumon, per kio ili kovris la blankon de duonkondukaj materialoj de nia lando.

Tiu nova materialo estas la nervo de mikroonda komunikado, okuloj de telegvidado kaj koro de laseraĵoj instrumentoj. Dank’ al ĝi la modernaj elektronikaj ekipaĵoj povas esti multe malgrandigitaj kaj grandegaj

komputeroj povas fariĝi portebaj. Tial ĝi havas belan perspektivon.

Finiĝis la intervjuo, tamen la vortoj de Lin Lanying restas en mia animo. Ŝajnas al mi, ke fajro brulas en la koro de la maljunulo kaj ĝi donos lumon kaj varmon en la nova longa marŝo.

taŭrbo kaj malofte hejmenrevenas. Kiam la maljunulo malsaniĝas, Niu akompanas lin al hospitalo kaj helpas lin en diagnozo, injekto kaj preno de medikamentoj. Li tiel prizorgas la maljunulon, ke ĉiuj en la hospitalo prenas lin por filo de la maljunulo.

Por respondi la ŝtatan alvokon pri naskolimigo, la juna laboristino Wu Wei akceptis steriligon post nasko de unu bebo. Ŝiaj najbaroj iris al la hospitalo por viziti ŝin, kunportante fruktojn, kukojn kaj aliajn donacojn.

La dek familioj helpas unu alian kaj zorgas unu pri alia ankaŭ en multaj aliaj flankoj. Kiel ekzemple, je ekpluvo oni portas en sian domon por la forestantaj najbaroj la sunumatajn vestojn. Kiam liveristo alportas karbon, se la bezonanto de karbo forestas, do lia najbaro aĉetas karbon por li kaj bone ordigas karbopecojn. Kiam bolas la akvo en la kruĉo sur la forno de najbara domo, oni tuj plenigas la termoson por la mastro kaj aldonas karbon al la forno, por ke ĝi ne estingiĝu.

## II

Kiam mi interparolis kun aliaj loĝantoj, ili plurfoje menciis

Zhao Suzhen, kies familio estas laŭdata kiel modela familio.

Hazarde, antaŭvespere de la Printempa Festo mi venis denove al la hejmo de Zhao Suzhen. En la domo regas plena ĝojo kaj la familianoj sin preparas al la festo. La kuna prenado de la jarfina manĝo de la familianoj en tiu tago estas tradicia moro de la ĉina popolo. Ĉiu familio sin regalas per abundaj pladoj kaj la anoj gaje kunestas por drinki kaj manĝi ĝissate. Post la manĝo la infanoj iluminas la ĉambrojn kaj eksplodigas fajraĵojn; la plenkreskuloj faras duonlunajn pastbuletojn kun farĉo, tradicia manĝaĵo ŝatata de la nordaj ĉinoj precipe en la Printempa Festo. Oni prenas tian manĝaĵon en la festo ne nur pro ĝia bona gusto, sed ankaŭ pro ĝia bona aŭguro, ĉar la pastbuleto forme similas al arĝenta ingoto uzata kiel mono en la feŭda periodo de Ĉinio. Iafaĵe oni ankaŭ enmetas en farĉon arakidan grajnon. Tia pastbuleto simbolas riĉecon kaj longvivecon.

La familio de Zhao Suzhen konsistas el 12 membroj, ŝi, ŝiaj edzo, filo, du filinoj, bofilo, bofilino kaj kvin genepoj, loĝas kune. Ŝi bone aranĝas la familian vivon, kaj en ŝia hejmo troviĝas




*Kortopordo*

bicikloj, kudromaŝino, televidilo k.a.

Ŝiaj najbaroj ofte diras: “Bopatrinoj devas lerni de Zhao Suzhen, kaj bofilinoj de Zhou Desheng.” Jes, Zhao Suzhen kaj ŝia bofilino Zhou Desheng estas tre intimaj kiel patrino kaj filino. Zhou, instruistino de la Beijing-a 128-a Mezlernejo, amas sian profesion. La lernejo konfidis al ŝi klason el pli ol 40 lernantoj kiuj lernis ne tre bone. Por ilin progresigi, ŝi ĉiutage helpis ilin en lernado kaj hejmen revenis nur post la 7-a horo vespere. Ŝia bopatrino ofte kuraĝigis ŝin: “Ne zorgu pri la hejmo, sed plej grave estas progresigi la lernantojn.” Dank’ al ŝia senlaca instruado, la lernantoj akiris tre bonajn poentojn en la semestra ekzameno. Ŝi ankaŭ tre zorgis pri siaj bogepatroj. Kiam ili sentis sin iom malbona, ŝi ilin demandis zorgeme. Kiam ili kuŝis sur lito malsanaj, ŝi flegis ilin tre zorgeme.

La familianoj de Zhao vivas harmonie kaj tenas intiman rila-



*Malnovtipa korto de loĝdomoj en Beijing*



*Zhao Suzhen faras veston por sia najbarino.*

ton kun la najbaroj. La 69-jara avino He Jingyi vivis najbare kun ili 30 jarojn. Pro ŝia neoportuneco en irado kaj la okupiteco de ŝiaj filo kaj bofilino, Zhao ordonis siajn genepojn aĉeti por ŝi legomojn kaj grenon. Ŝi ofte sendis ion bongustan al He. Ŝi preparis por ŝi apetitovekan manĝaĵon, kiam ŝi estis malsana. Kelkfoje, kiam gastoj vizitis la familianojn de Zhao kaj ili forestis, tiam He petis la gastojn eniri ŝian domon kaj regalís ilin per teo kaj cigaredoj.


### III

Nature, ne ĉiuj loĝantoj en la korto estis tiel helpemaj. Zhao Guizhi, kiu antaŭe loĝis aliloke, transloĝiĝis en tiun korton pro kverelo kun siaj najbaroj. Ne longe post la enloĝiĝo, ŝi kverelis ankaŭ kun siaj novaj najbaroj pro iu bagatelo. Foje ŝia infano perdis vojon kaj ne povis reveni hejmen, kio forte maltrankviligis ŝin. Por serĉi ŝian infanon, ĉiuj ŝiaj najbaroj ekagis, kaj fine la infano estis trovita. Tio tre kortuŝis ŝin. Ekde tiam okazis

neniaj kvereloj inter ŝi kaj ŝiaj najbaroj.

Kiel agas la plenkreskuloj, tiel agas ankaŭ la infanoj. La naŭ infanoj en la korto amike traktas unu alian. Ili ofte kune rigardis televidon aŭ preparis siajn lecionojn. Inffuate de la plenkreskuloj, tiuj infanoj al kutimiĝas zorgi pri aliaj kaj ami fizikan laboron. Informiĝinte ke iu ajn familio urĝe bezonas oleon, salon, sojon aŭ vinagron, ĉiu el la infanoj volas aĉeti por ĝi. La 13-jara Wu Dong ofte forportas per ĉareto la rubon de la najbaroj.

En la Printempa Festo regis plena vicleco en la kortoj. La parencoj, amikoj kaj najbaroj esprimis unu al alia festajn bondezirojn. La maljunuloj babilis, ŝakludis kaj tetrinkis. La infanoj estis festvestitaj. Nokte la knaboj estis ludantaj petardojn kaj fajraĵojn. Ĉie aŭdiĝis tiaj eksplozod-bruoj. La antikvaj kortoj de Beijing estis plenaj de printempa gajeco.




\* Milena Leviĉnik, Adr: Gomilškova 14, 62250 PTUY, Slowenio, Jugoslavio, 15-j. mezlernejano dez. kor. kun esperantistoj el la tuta mondo.

\* Ahmed Kavazoviĉ, 27-jara studento de literaturo dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj kaj aliaj landoj pri ĉ.t., precipe pri literaturo, muziko, sporto, vojaĝoj. Adr: 78300 Prijedor, M. Suljanoviĉa 11, Jugoslavio.



*Infanoj ludas per petardoj dum la Printempa Festo.*



\* Marke Truszkowski, 18-j., Ul. Gabinska 39 PL-09-500, Gostynin, Pollando, dez. korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn.

\* August Verswyvel, Kastanjeweg 33, B-2850 Beerbergen, Belgio, kun ĉinaj geesperantistoj.

\* S-ro Antero Harju, Kuusmiehentie 62 E, Sf-00670 Helsinki 67, Finnlando, 35-j. invalidpensiulo, kun ĉinaj esperantistoj pri ŝakludo, politiko, Esperanto kaj aliaj temoj.

\* Ludoviko Vajo, 19-j., Budaors, Levai strato 33, VII. 68, Hungario, kun ĉina knabino pri naturo, junularo, muziko, ktp.

\* S-ro Gavrilă Cornel, 23-j. elektroteknikisto, Aleea Stupilor nr. 3, Bloc F.9, ap. 10, et.III, 75562-Bucuresti, R.S. Rumanio, kun ĉinaj geesperantistoj.

\* Pavla Pajk, 23-j., studentino, Gorenja vas 23, 68220, Imarjeike Joplice, Ilovciuja, Jugoslavio, kun esperantistoj.

\* Prof. German Jimenez, 47-j. profesoro kaj administranto, Calle 5, N. 5-13, Paipa Boyaca, Kolombio,

Sud-Ameriko, kun geesperantistoj de iu ajn lando.

\* S-ro George Gurbala, 32-j. inĝ. kemiisto, 31-816 Krakow 39, P.O. Box 35, Pollando, kun gesamideanoj kaj geesperantistoj en Ĉinio.

\* Prenc Silvano, 18-j. lernanto de medicina mezlernejo en Pula, Rizanska 2, 52000 Pula, Jugoslavio, kun samaĝaj ĉinaj medicinistoj kaj medicinistinoj okupiĝantaj pri medicino kaj akupunkturo.

\* F-ino Katoo Akiko, 22-j. oficistino en kolegio, Ooike 1333-2, Kakegawasi, Sizuokaken, Japanio, kun ĉinaj esperantistoj.

\* S-ro Brenkman-Abraham, 66-j. pensiita laboristo, Eendrachtsweg 121, 2806 ME Gouda, Nederlando, kun ĉina esperantisto.

\* Duncan Adam, Hare Park Stud, Six Mile Bottom, Newmarket, Suffolk CB8 OU2, Anglio, kun ĉinaj esperantistoj, prefere dekkelkjaruloj.

\* Veronique Haren, 9-j. knabino, S49 Avenue Gengral Cartier, Bissy, F73000 Chambéry, Francio, kun samaĝaj geknaboj en la tuta mondo, precipe en Ĉinio.

\* S-ro Chiritescu Vasile, Str. Co-tita Nr. 2 R.-3400-Cluj-Napoca, Ru-

manio, dez. interŝanĝi p.m. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

\* Heinrich Post, Lendringens, Berkenhofskamp 50, D-5750 Mendden 2, FR Germanio, dez. kor. kun ĉinaj E-istoj 60-80 jaraj aŭ pli junaj.

\* Daniel Luez, 1, rue Victor-Faglain, 02000 Laon, Francio, dez. kor. kun junaj ĉinaj geesp-istoj pri ĉiuj temoj.

\* Tibulka Alexandru, 13 Dumbrava Minunata, 5750-Falticehi-Rumanio, inĝeniero dez. interŝanĝi poŝmarkojn, poŝkartojn, librojn, kun geesp-istoj ĉinaj kaj alilandaj.

\* Lukacs Andras, Budapest XI, Budafoki ut 81.11.8. H-1117, Hungario, geofizikisto dez. kor. pri geofiziko.

\* Dana-Ligia Ilin, studentino, pri teatro, filmo, pentroarto, ĉinaj lingvo kaj literaturo, dez. kor. kun ĉinaj gestudentoj en Esperanto. Adr: Bd. Magheru, 31-36, sc. A, ap. 32, Bucuresti, 70159-S.R. Rumanio.



## NOVE RICEVITAJ LIBROJ

\* **Dekdu Piedetoj** verkita de Marjorie Boulton, kun 33p., represita de la eld. Stoke-on-Trent 1964; **Bibliografio de la Publikajoj** (1962—1979), la dua eld., verkita de Reinhard Haupenthal; kaj **Du Intervjuoj** de Reinhard Haupenthal, interparoloj. kun Kalman Kalocsay kaj William Auld. La tri libroj estis eldo-

nitaj de la Sarlanda Esperanto-Ligo (Schulstr. 30, D-6601 Scheidt, FRG) kaj estas aĉeteblaj ĉe ĝi.

\* Jus aperinta lernolibro **Esperanto laŭ la Patrino Metodo** kaj en Esperanto kaj en la germana lingvo, verkita kaj eldonita de s-ro August Weide.

\* **Vivo de Lanti** verkita de E. Borsboom kaj eldonita de SAT. Ĝi pritraktas parton el la historio de SAT kaj estas aĉetebla ĉe ĝi.

\* **Estonia Soveta Poezio** tradukita de Hilda Dresden, eldonita de "EESTI RAAMAT", Tallinn 1977.



# RELIGIOJ EN ĈINIO

de Tian Wen

**Ĉ**INIO estas lando kun multaj religioj, inter kiuj budhismo, taoismo, islamo kaj kristanismo (inkluzive de katolikismo kaj protestantismo) havas longan historion. Ili havas sian influon en parto de la hanoj kaj precipe inter nacimalplimulto.


Budhismo estis enkondukita en Ĉinion el Hindio en la unua jar-


cento. Dank' al subteno de feŭdaj dinastioj, ĝi populariĝis en Ĉinio kaj multe influis ĝiajn ideologion, kulturon kaj arton. Taoismo estas propra al han-nacieco de Ĉinio, oficiale formiĝis en la unua jarcento kaj kultis fantomojn, diojn kaj praulojn laŭ la antikva kutimo de han-nacieco. En la ĉina historio taoismo kaj budhismo ambaŭ

donis plej grandan influon, tamen en la moderna epoko la influo de taoismo pli kaj pli malfortiĝis. Islamo estis enkondukita en Ĉinion pere de persaj kaj arabaj islamanoj-komercistoj en Tang-dinastio (618-907 p.K.) kun la disvolviĝo de negoco inter la oriento kaj la okcidento. Nun krom la hui-naciecaj islamanoj dise loĝantaj tra la tuta Ĉinio, ĉinaj islamanoj sin trovas ĉefe en nordokcidenta Ĉinio, kie koncentre loĝas uĝura, kazaha kaj aliaj sep nacimalplimulto. Kristanismo atingis Ĉinion plej malfrue. Nur en la fino de la 16-a jarcento aperis en Beijing (Pekino) katolika preĝejo. Kaj post la Opia Milito en 1840, diversaj sektoj de kristanismo akiris certgradan disvastiĝon kaj disvolviĝon.

La popola registaro ĉiam praktikas politikon de libereco de kredo je religio. Kaj difino pri la libera kredo je religio estas skribita en ĉiuj ŝtataj konstitucioj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La vastaj amasoj de la religianoj kaj patriotoj de la reli-

*Imamo de Kashi en predikado*





*Bonzoj en la templo Baisuigong sur Jiuhua-monto en Anhui-provinco*



*Moskeo en Kashi*

gياج rondoĵ kondukis kontraŭimperiisman patriotan movadon, abolis feŭdisman privilegion kaj subpreman kaj ekspluatatan sistemon en ĉiuj religioj, forigis la superregon de en- kaj eksterlandaj reakciaj fortoj super la ĉinaj religiaj organizoj, efektivigis sendependecon kaj memstarecon kaj memmastrumadon de religiaj aferoj kaj starigis tutlandajn organizojn kaj patriotajn rondoĵn de diversaj religioj, kiel ekzemple la Ĉina Budhisma Asocio, Ĉina Taoisma Asocio, Ĉina Islama Asocio, Ĉina Katolika Patriota Asocio kaj Ĉina Kristanisma Patriota Asocio de Aŭtonomeco, Memevangeliado kaj Memfinancado.

Dum la kultura revolucio, Lin Biao kaj la kvarpersona bando subfosis la politikon de la registaro pri religio. Rezulte de ilia agitado kaj subteno, multaj temploj kaj preĝejoj estis detruitaj, la vastaj amasoj de la religianoj kaj personoj de la religiaj rondoĵ estis malestimataj kaj perseku-

tataj. Post frakaso de la kvarpersona bando, la registaro reemfazis la politikon de libereco de kredo je religio kaj faris multe da laboroj, tio estas bonvenigata de religianoj, personoj de la religiaj rondoĵ kaj popolanoj de la tuta lando. Nun la tutlandaj religiaj rondoĵ kaj lokaj religiaj organizoj revigliĝas en siaj aktivecoj, pastroj de diversaj religioj revenis unuj post aliaj al temploj kaj preĝejoj por konduki religiajn aktivecojn. En 1978, pli ol 20 famaj personoj de la religiaj rondoĵ estis nove elektitaj aŭ reelektitaj kiel reprezentantoj de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso aŭ membroj de la Tutlanda Komitato de la Kvina Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Inter ili estis famaj personoj el la budhisma rondo Zhao Puchu, viva budho Jia Muyang kaj majstro Zhen-guo, islamaj imamoj Zhang Jie, An Shiwei, Liu Pinyi, episkopo de la Shanghai-a diocezo Zhang Jiashu, episkopo de la Changde-

a diocezo de Hunan Yang Gaojian, episkopo de protestantismo Ding Guangxun, pastro Jiale, ĝenerala sekretario de la Shanghai-a Kristanisma Junulara Asocio Luo Guanzong, kaj sinjoro Wu Yaozong, prezidanto de la Ĉina Kristanisma Patriota Asocio de Aŭtonomeco, Memevangeliado kaj Memfinancado, kiu forpasis en septembro pasintjare. Ankaŭ en provincaj kaj urbaj popolaj kongresoj kaj komitatoj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco estas reprezentantoj de la religiaj rondoĵ. Ili partoprenas en diskutado pri ŝtataj aferoj kaj iliaj opinioj estas atentataj kaj alte taksataj.

Dank' al plena subteno de la registaro, multaj famaj temploj kaj preĝejoj difektitaj kaj detruitaj estis riparitaj kaj malfermiĝis al la publiko unu post alia, ekzemple Baima-templo en Luoyang, la plej antikva budhisma templo en la interna loko de Ĉinio, Huajue-moskeo en Xi'an,

# Kaligrafado kaj pentrado de



1

1 2 3 4 5 Kaligrafas kaj pentras artistoj en la Kultura Domo.

3



Ĉinio estas unu el la plej antikvaj civilizitaj landoj en la mondo kaj havas brilajn kulturajn heredaĵojn. La ĉinaj tradicia kaligrafio kaj nacia pentrado estas konsistiga parto de la heredaĵoj.

Por lerni kaj disvolvi la tradician arton, oni ofte faras aktivadojn de kaligrafado kaj pentrado, en kiuj partoprenas artistoj en diversaj aĝoj. Tio ne nur riĉigas la kulturen vivon de la popolo, sed ankaŭ kreskigas ŝaton de gejunuloj pri arto kaj helpas ilin levi sian nivelon de arto.

2





# amatoroj



4



Amatoraj kaligrafinoj en la Geknaba Palaco

5





Kaligrafa kurso por fremdlandaj studentoj en la Beijing-a Universitato





**D**UM la lastaj jaroj montriĝis vicleco en kreado de lirikaj kantoj en Ĉinio.

La kanto "Tintsonoras Fonto" estis elektita, antaŭ nelonge, de pli ol 121 mil aŭskultantoj kiel unu el la 15 elstaraj kantoj de la pasintaj jaroj. La verkinto de tiu kanto estas Lü Yuan, fama ĉina komponisto kaj komitatano de la Ĉina Muzikista Asocio. La lirikaj kantoj komponitaj de li havas fluajn kaj belajn melodiojn, densan nacian guston kaj riĉan vivetoson. Nemalmultaj el liaj verkoj vaste cirkulas en la amasoj.

Dum la intervjuo li diris al mi, ke en la vivo ne povas mal esti kantoj, precipe lirikaj kantoj. Jam en la malnova Ĉinio de la 30- kaj 40-aj jaroj cirkulis lirikaj kantoj, kvankam iuj el ili estis bonaj, tamen plejparte ili estis nesanaĵoj kaj ne povis doni al la amasoj artan ĝuon. Finfine ili estis elkombitaj de la epoko. La lirikaj kantoj de la nova

Ĉinio havas serenajn kaj sanajn melodiojn kun enhavo prikan-tanta la novan vivon de la popolo, la belan naturon de la patrolando kaj la sinceran amon de la gejunuloj. Dum aprecado de muziko la aŭskultantoj ne nur ĝuas la arton, sed ankaŭ estas stimulataj per espero pri la estonteco.

Li diris, ke plejparto de la lirikaj kantoj nun verkitaj estas dividita en du specojn: Unu kun ĉina nacia stilo kaj la alia kun ĉina kaj fremdlanda stiloj en kombino. Ili havas sanan enhavon kaj lingvajon ŝatatan de la popolo. La kanto "Tintsonoras Fonto" estas nacia lirika kanto kaj ensuĉis iujn esprimmanierojn de alilandaj popularaj kantoj, ekz. la ripetiĝo de la temo ĉe la komenco kaj la fino kaj la finiĝo per ĝi. Tio ne estas simpla kopiado, sed rekreaĵo kiu servas por esprimi penson kaj senton de la popolo kaj estas facile akceptebla por ĝi. Fine li emfazis, ke en verkado de lirikaj kantoj la ĉinaj kompo-

nistoj daŭre klopodos en sia reserĉado.

Lü Yuan estas 50-jara. Antaŭe li studis prospektoradon kaj faris muzikan verkadon kiel amatoro. Poste li elektis por si la profesion de komponisto. En dekoj da jaroj lia verkado kovras tre vastan kampon: Li verkis kiel operojn, filmomuzikaĵojn kaj filmokantojn, tiel ankaŭ kantotekstojn, kantomuzikojn kaj poemojn. Iu eldonejo estas kolektanta liajn ĉefajn muzikajn verkojn en diversaj periodoj kaj publikigos ilin.

Kiam Lü Yuan informiĝis, ke la Redakcio de "El Popola Ĉinio" estas preta konigi lian kanton "Tintsonoras Fonto" al diverslandaj esperantistoj, li tre ĝojis. Li diris, ke, kvankam li estas neesperantisto, tamen li tre volantas subteni nian laboron. Kaj krome, li opinias, ke kiel komunikilo Esperanto havas gravan signifon por forigi la baron de la naciaj lingvoj kaj fari interŝanĝon de pensoj inter la popoloj.



*Lü Yuan (maldekstre) kaj Ma Jinxing, la verkinto de la teksto de la kanto "Tintsonoras Fonto"*


# Tintsonoras Fonto

(Soprana solo)

Teksto de MA JINXING

Muziko de LÜ YUAN

Andantino



Tint- so- no- re, tin- so- no- re flu- as jen la font',



de sur mon- to, tra her- be- jo, al mi por ren- kont'.



Di- ru al mi, ka- ra fon- to, ki- en i- ras vi,




kaj kan- tan- te kaj tin- tan- te al la ho- ri- zont' ?



I- ru, ho, bon-vo- le nun kun mi- a kor' tra mon-  
 Di- ru, ho, bon-vo- le al mi- a ka- rul': Pen- su




te- goj al la ma- ra mond'. Ka- ra fon- to,  
 nek pri mi nek pri la hej- ma rond'. Ja mu- zi- ko de la



vi ja me- mo- ras lin-- flan- ke de vi mi lin a- di- a- ŭis al mar-  
 tint- so- no- ra font' es- tas mi- a mil- da kan- to por li sur la



front'.  
 front'.




Tint- so- no- re, tint- so- no- re flu- as jen la font', tint- so- no- re,




tint- so- no- re al la ho- ri- zont'. al la ho- ri- zont'.

*rit. dim.*



al la ho- ri- zont'.



# Flutado de cervopaŝtistino

de Han Jingting

**M**I pasigis kelkajn tagojn ĉe la piedo de Changbaimontaro kaj konatiĝis kun knabino sin okupanta pri cervopaŝtado. Frumatene mi iris paŝtadi kune kun ŝi sentante, kvazaŭ mi enirus mondon de mito. Estis printempo. Violis la foraj montoj kaj bluis la proksimaj. Verdaĵo de sukaj herbedoĵoj disetendiĝis rekte al la horizonto. La sovaĝaj floroj, kiel koloraj steloj, abundas ĉie en la arbaro. Sveltaj betuloj, tremoloj kaj belaj pinoj ĉarme sin luladis. Ŝvebadis blankaj nebuloj en la valoj kaj la homoj kvazaŭ flosis sur nubaro. Kaj niaj petolemaj cervoj ĝoje kuris de valo al valo. La vircervoj estis viglaj kaj facilmovaj kiel ĉevaloj, kaj la cervidoj mildaj kiel ŝafoj. La ruĝaj cervoj kun blankaj makuloj similaj al umefloroj rebrilis en la lumo de la leviĝanta suno. Kun skarлата kaptuko ĉirkaŭ la bela alabastra vizaĝo, ruĝa flago surŝultre kaj fluto ĉe la talio, la cervopaŝtistino malgranda Feng gvidadis sian trupon de cervoj, zumante kanton. De tempo al tempo ŝi palpebrumigis siajn brilajn okulojn kaj petolis kun sciuroj kaj birdoj sur arbobranĉoj... Kredeble, neniu pentristo povas bildigi tian feolandan mirindaĵon, kiom ajn lerta li estas.

Malgranda Feng elektis kiel paŝtejon lokon sur milde leviĝanta deklivo kun klara fluo kaj multaj kverkoj. La cervoj disiĝis inter la arboj kaj avide demordis kaj maĉis kverkajn foliojn aŭ trinkis el la dolĉa fonto. Jen ili subite starigis siajn orelojn viglatente kaj pafiĝis malproksimen kiel sagoj. Malgranda Feng eksvingis la ruĝan flagon, tuj kolektiĝis la cervoj el foraj kaŝejoj, kvazaŭ “batalantoj” je vido de la standardo de la “generalo”... Du petolemaj cervidoj kun rondigitaj okuloj, klinitaj kornetoj kaj streĉita kolo ial malpaciĝis kaj pretis por luktado. Ĝuste en tiu momento ŝi starigis sin, kun kolereto en la okuloj, inter la cervidojn kaj mallaŭte kriis: “Blankpalpebrulo, denove vi petolas...” Vere mirinde, la cervido kompreneme mallevis la kapon kiel infano konfesanta sian eraron. Kaj la alia cervido rigardis malgrandan Feng per siaj amindaj brilaj okuloj kaj ludis sin premante al ŝia basko. Ŝi ridklukadis kaj diris karese frapante ĝian frunton: “Kiel bonaj kornoj, petolemulo. Ĉu vi ne domaĝus pro ilia difektiĝo?”

Mi estis ravita de la vortoj kaj la vidaĵoj. La intimaj rigardoj kaj tonoj de la knabino montris,

ke inter ŝi kaj la cervoj troviĝas ia konvencio, la intima interkomuniko. Eble makulaj cervoj vere povas kompreni la knabino?

“Malgranda Feng, ĉu la cervoj komprenas viajn vortojn?”

Ŝi ekridis brue kaj tuj kovris per kaptuko sian buŝon por sufoki la ridon, sed ju pli forte ŝi kovris, des pli sonore ŝi ridis. Ŝi ridis tiel dolĉe kaj mistere. Por montri al mi sian dresarton, ŝi volvis la ruĝan flagon, forlasis la cervojn kaj sola kuris al malproksima deklivo.

Mi kuris post ŝi. Ŝia ruĝa kaptuko flirtis kiel papilio; ŝi kuris tra arbaro kaj trans montfluron facilpaŝe kiel cervo. Ĉe la monto ŝi malaperis je palpebrumo. En miro kaj perplekseco mi subite aŭdis ridklukadon super mia kapo. Ekbrilis la ruĝa kaptuko, jen la knabino sidis sur tremanta arbobranĉo. Ŝi elprenis sian fluton kaj ĝi sekvigis tonoserion al ŝia sonora rido je ekmovado de ŝiaj ruĝaj lipoj. Flutmuziko resonadis en la densa arbaro kaj profundaj valoj. Ha, je tio la cervoj kvazaŭ inteligentaj komencis atenteme aŭskulti la flutadon kaj serĉi la ludanton. Iuj el ili blekadis, kvazaŭ respondante al la flutado

kun kompreno. Iom poste, la akr-okula gvidanta cervo rimarkis la ruĝan kaptukon kaj ĝoje kuris al la knabino. Post ĝi galopis la tuta grego kiel trupo disciplinema. . .

Ho, kial la flutado en la profunda valo havas tiel mirindan forton? Kiel la knabino trovis la lingvon komunan kun siaj cervoj? Kio esprimiĝis en la flutado?

Mi rememoris la laŭdojn pri ŝi cirkulantajn en la cervobredejo.

La knabino, sciu, estas mia samlokano! Ŝi forlasis Beijing (Pekinon) kaj venis en Changbai-montaron por labori tie. Ŝi enamiĝis al la bredejo. La paŝtista vivo donis al ŝi senliman ĝojon. Ŝi estas tiel ridema, kvazaŭ ĉe la cervoj estus senfinaj ridindaĵoj. Sed ankaŭ malgranda Feng havis malĝojon: Estis iu mateno fruaŭtuna. Pro neglekto ŝi ne strikte fermis la pordon de la cervostalo, kaj unu petolema vircervo forkuris. Tiam estis sezono por detranĉi cervokornojn. La kornoj estas valorega drogo vendebla ankaŭ en la internacia merkato. Ŝi tiel ĉagreniĝis, ke ŝiaj okuloj ruĝiĝis de plorado. La bredeja sekretario Wang sciis ŝian malĝojon kaj ne kritikis ŝin. Li nur ĵetis al ŝi signifoplenajn rigardojn. Tamen malgranda Feng ne povis elteni eĉ tion, ŝi kuris profunde en la montaron kun senoleigitaj sojfaboj ŝatataj de cervoj por serĉi la cervon. Kaj pro ŝia faro oni devis iri serĉi ŝin. Du tagojn poste, ŝi kaj la cervo estis trovitaj. Sed rompiĝis la kornoj de la cervo belaj kiel koralo. De tiam ne plu aŭdiĝis la rido de malgranda Feng. Tiu progresema knabino komencis lerni de veterana cervobredisto, studi cervobredadon kaj fine trovis sperton:

Por ke la cervoj ŝanĝu sian karakteron de timemo, ŝi interkonsiliĝis kun veterana cervobredisto kaj decidis fari fortan bruadon per tamburo kaj gongo en la stalo. Komence la cervoj terurigiĝis kaj kaŝiĝis ĉe la anguloj de la stalo kun starigitaj oreloj, hirtigitaj haroj kaj plene malfermitaj okuloj kaj larmujoj. Tamburante malgranda Feng murmuris: “Vi, timemuloj, estu kuraĝaj, vi al kutimiĝos post trejnado. . .” Vere, la cervoj al kutimiĝis tagon post tago al tia bruado kaj ne plu terurigiĝis je ventsusuro. . . Malgranda Feng tutkore okupiĝis pri la cervobredado. Ĉiumatene, tuj post sia ellitiĝo, ŝi iris al la stalo por observi, kio eksterordinara okazas al la cervoj, kiam ili vekigiĝas kaj stariĝas streĉante la talion. Ŝiaj okuloj estis tre akraj kaj en la momenteto ŝi povis rimarki, kiu cervo malsaniĝis. Kaj se iu el ili malsaniĝis, ĝi tuj ricevis zorgan kuracadon. Iuj ŝerce nomis ŝin vartistino de cervoj.

Pro sia dresado de cervoj per fluto malgranda Feng iam estis skandalita. Ĉu iu ajn cervobre-

disto foje dresis cervojn per fluto? Oni diris, ke malgranda Feng estas ensorĉita. Sed ŝi tute ignoris tion. Ŝi ne volis vipi siajn amatajn cervojn. Dum bredado ŝi disŝutis plenmanon da senoleigitaj sojfaboj kaj flutis por momento kaj per foj-refoja ripetado de tio akiris sukceson en dresado. Ŝiaj kuntiritaj brovoj etendiĝis, kaj ĉie en la bredejo denove aŭdiĝis ŝia sonora rido. Ŝi surprizis la kolegojn per tio, ke, kiam ŝi envolvis sian kapon per la ruĝa kaptuko kaj metis la fluton al siaj lipoj, tiam la cervoj levis sian kapon kaj obeeme sekvis ŝin. Iuj cervidoj eĉ venis tuj apud ŝin kaj petolekis ŝian baskangulon. Tiaokaze, la veterana cervobredisto diris, ke malgranda Feng estas interparolanta kun la cervoj per fluto. Kie ajn ili forestas, ili tuj revenas al la knabino je ŝia voko per la fluto. . .

Pensante pri tio, mi sentis nature respekton al la juna cervopaŝtistino.

“Mia samlokano, kiom da jaroj pasis depost via alveno al Changbai-montaro?” mi demandis.



Ilustris Jiang Jiwei.

“Jam kvin jaroj,” ŝi respondis per pura nordorienta dialekto.

“Ĉu vi ne vizitis viajn parencojn en Beijing?”

“En la pasinta jaro mi restis en Beijing kvar tagojn. Sed ne pli longe. Ĉar la cervoj sopiris kaj atendis min. Kvankam ili ne povas paroli kaj skribi, tamen ili havas koron.” Je tiuj vortoj ŝi denove komencis ridkluki, “kaj

plie, mi ne povis vivi sen la cervoj, eĉ en sonĝo. Mi ne povis forestadi kaj revenis antaŭdate. . .”

La knabino diris nenium bran vorton, sed dum la interparolado mi sentis, ke ŝi profunde amas sian vivon kaj la aferon de cervobredado. Aŭdinte ŝiajn vortojn, mi komprenis, de kie venis la mirinda forto de ŝia flutado.



### KUNSIDO PRI VERKADO DE DRAMAJ KAJ SCENAROJ EN BEIJING

Lastatempe la Asocio de Ĉinaj Dramistoj, la Asocio de Ĉinaj Verkistoj kaj la Asocio de Ĉinaj Filmistoj kune okazigis kunsidon pri verkado de dramoj kaj scenaroj en Beijing (Pekino). Ĝin ĉeestis pli ol 100 tiurilataj laborantoj kaj recenzistoj el Beijing, Shanghai (Ŝanhajo) kaj aliaj provincoj kaj urboj kaj la Popola Liberiga Armeo. Ĝi estis unu el la gravaj kunsidoj en la literaturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio. He Jingzhi, vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj, prezidis la kunsidon kaj gvidantoj de la literaturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio Zhou Yang, Xia Yan, Chen Huangmei, Zhang Geng kaj aliaj faris al ĝi paroladon. Hu Yaobang, estro de la Propaganda Departemento de CK de KPC, faris en ĝi longan paroladon.

En la kunsido oni senĝene diskutis pri iuj gravaj problemoj en verkado de dramoj kaj scenaroj dum la lastaj tri jaroj kaj iuj gravaj teoriaj problemoj koncerne la literaturan kaj artan verkadon. Ĉe la kunsido

oni montris, ke la socialisma literaturo kaj arto devas kontentigi diversajn bezonojn de la popolanoj en la spirita vivo, kulturi novajn socialismajn homojn kaj levi la nivelon de la socia ideologio kaj moralo. La kunsido kuraĝigis la literaturajn kaj artajn laborantojn, ke ili klopodu por riĉigi siajn sciojn, larĝigi sian vidkampon, altigi sian artan lertecon, kombini diligentan librolekadon kaj enprofundiĝon en la vivon kaj fari novajn kontribuojn al la literaturaj kaj artaj aferoj de socialismo.

### ĈINIO GAJNIS SES ĈAMPIONECOJN

La ĉina tablotenisa teamo gajnis la ĉampionecojn de vira kaj virina teamoj kaj kvar ĉampionecojn el la kvin unuopaj konkursoj ĉe la 29-a

Kun rideto sur la lipoj la knabino denove komencis ludi sian fluton, sidante sur montodeklivo. La tonoj estis tiel klaraj, naturaj kaj belaj, ili similas al ŝvebantaj nuboj ĉe la montpintoj, al fontakvo en la montaj riveretoj, al kantado de birdoj en printempo kaj bleko de cervoj en profundaj valoj. Kiu ajn aŭdas la flutsonon en la profundaj valoj, li certe enamiĝos al tia idilia vivo. . .

Internacia Tablotenisa Turniro okazinta en Ruesselsheim de FR Germanio. En la teama konkurso, la ĉina dua vira teamo kun Cheng Yinghua kaj Shi Zhihao kiel la membroj gajnis la ĉampionecon, venkinte la ĉeĥoslovakon teamon per 3:0. La ĉina unua virina teamo kun Zhang Deying kaj Cao Yanhua kiel la membroj gajnis la ĉampionecon, venkinte la ĉinan duan virinan teamon konsistantan el Bu Qijuan kaj Qi Baoxiang. En la kvin unuopaj konkursoj, Cao Yanhua kaj Bu Qijuan gajnis respektive la ĉampionecon kaj subĉampionecon en la virina solludo. Zhang Deying kaj Cao Yanhua gajnis la ĉampionecon en la virina parludo. Shi Zhihao kaj Wang Huiyuan gajnis respektive la ĉampionecon kaj subĉampionecon en la vira solludo. Li Zhenshi kaj



Ĉirkaŭurba vetkuro de Beijing



Zhang Deying gajnis la ĉampionecon en la ĝea parludo. Jacques Secretin kaj Patrick Birocheau (Francio) gajnis la ĉampionecon en la vira parludo.

### ĈINA BELARTA EKSPOZICIO EN BEIJING

La ĉina belarta ekspozicio okazis en la Ĉina Belarta Domo de Beijing en februaro. La montritaj 417 ĉinstilaj pentraĵoj, olepentraĵoj, lignogravuraĵoj, skulptaĵoj kaj aliaj pentraĵoj estis faritaj de 481 artistoj el 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio en la lastaj tri jaroj. Dum la ekspoziciado okazis ankaŭ premi-aljuĝado de eminentaj verkoj.



La unua kaj dua volumoj de la serio "Vojaĝo tra Ĉinio"



### KANTOJ ŜATATAJ DE LA AŬSKULTANTOJ

La kantoj ŝatataj kaj elektitaj de la aŭskultantoj publikiĝis je la 16-a de februaro. Tiu aktivado estis kune iniciatita de Radio Pekino kaj la redakcio de "Kantoj". La elektitaj 15 kantoj ĉiuj estas lirikaj kaj kreitaj en la lastaj jaroj. El tiuj kantoj *Tostado* gajnis la unuan lokon per 150,000 balotiloj. *La Fratino Serĉas la Fraton kun Larmoj*, *Nia Vivo Plenas de la Suno*, *Adiaŭ*, *Panjo*, *Tintsonoras Fonto* kaj aliaj gajnis ankaŭ pli ol 100,000 balotilojn respektive.

### PRINTEMPOFESTA ĈIRKAŬ-URBA KURA KONKURSO EN BEIJING

Je la 18-a de februaro, 1980, preskaŭ 3,000 sportaj amatoroj startis de Tian'anmen-pordego en la centro de Beijing. Ankaŭ 14 Tokiaj kuristoj kaj kuristinoj partoprenis en la konkurso. La 14-jara Yang Xiufeng, unuaklasa lernantino de mezlernejo de Beijing, gajnis la ĉampionecon en la virina 5,000-metra kurado, rompinte la rekordon per 18 minutoj kaj 58.3 sekundoj. La 26-jara Tokia sportisto Kenĝi Sato gajnis la ĉampionecon en la vira 13,000-metra kurado per 42 minutoj kaj 15.3 sekundoj.

### UNUAJ ŜAKAJ MAJSTROJ DE ĈINIO

La unuaj ŝakaj majstroj de Ĉinio naskiĝis ĉe la Kvara Malta Klasa Ŝaka Turniro okazinta en Valletta. La ĉinaj ŝakistoj 39-jara Liu Wenzhe kaj 19-jara Liang Jinrong gajnis respektive 9.5 poentojn, superinte sep rivalojn, egalinte kvin rivalojn kaj perdinte du matĉojn, tial ili akiris la titolon de ŝaka majstro.

Ili gajnis la trian lokon samtempe kun itala ŝaka majstro Toth. La turnira ĉampiono estas granda majstro V. Tukmakov de Sovetunio kaj la subĉampiono Karaklajic de Jugoslavio.

### KUNLABORO INTER ĈINAJ KAJ FREMDAJ ELDONISTOJ

Lastjare, kunlaborante kun eldonejoj de Japanio, Jugoslavio, Usono, Britio, FR Germanio kaj aliaj landoj kaj Hongkongo, pli ol dek ĉinaj eldonejoj eldonis librojn aŭ subskribis kun ili kontraktojn pri kuna eldonado de libroj. Tiuj libroj temas pri turismo, antikvaj objektoj, arkitekturo, sciencoj kaj teknologio, sporto, historio, vortaroj kaj kuirarto.

La kunlaboro komenciĝis de «Vojaĝo en Ĉinio», kompilita kaj eldonita de la Popola Belarta Eldonejo de Ĉinio kaj Kodanŝa-eldonejo de Japanio. Ĝiaj unuaj du volumoj "Beijing" kaj "Norda kaj Nordorienta Ĉinio" jam eldoniĝis lastjare. La ceteraj tri volumoj eldoniĝos en la unua duono de la kuranta jaro. La albumo prezentas pitoreskejojn, historiajn vizitindejojn, revoluciajn lokojn kaj atingojn de la socialisma konstruado de Ĉinio.



# Gejunula rajdludo de kazaĥoj

de DING BINXUAN

**S**UR la vasta stepo norde de Tianshan (Tianŝan)-montaro de Xinjiang (Hingiang) de Ĉinio loĝas centmiloj da kazaĥoj. La kuraĝaj kaj gajaj kazaĥoj ŝatas rajdkonkursadon. La gejunula rajdludo estas la tradicia nacia aktivado, per kiu gejunuloj de la kazaĥa nacieco esprimas sian amon kaj faras rajdkonkursadon, kaj ofte okazas en festaj tagoj.


En la komenco de la ludo unu junulino iniciate defias la junulojn pri konkurso, la akceptanto do fariĝas ŝia parulo en la konkurso. Oni diras, ke en la konkurso partoprenas almenaŭ dek paroj, kelkfoje eĉ dekoj da paroj. Laŭ kutima regulo, la junulino rajtas laŭvole elekti por si ĉevalon, sed la junulo ne

havas tiun rajton. Post la elektado paroj da gejunuloj forrajdas galope al la difinita returna punkto. Laŭ la tradicia kutimo, survoje la junulo povas laŭplaĉe inciti la junulinon kaj ŝerci pri ŝi, sed la lasta devas silente aŭskulti kaj ne devas lin refuti. Tamen, sur la revena vojo la junulino rajtas vipi la junulon, kaj la lasta absolute ne devas rebati. La kazaĥaj virinoj estas rajdistoj fortikaj kaj kuraĝaj. Rajdante sur elektita bona ĉevalo, la junulino ofte povas kuratingi la junulon, malgraŭ ke li forkuras kiel ajn rapide. Se la junulino ŝatas la junulon, ŝi do afekte svingas la vipon. Per tio ŝi montras sin neofendebila en la konkursado kaj sian koran inklinton. Male, la lasta povas estis senkompate vipita kaj eĉ

falas de sur la ĉevalo pro la pezaj frapoj.

Iun tagon, kiam mi vizitis la Balikun-an Kazaĥan Aŭtonoman Gubernion, vicestro de popolkomunumo entuziasme invitis min rigardi rajdkonkurson. Sur la vasta stepo kolektiĝis ĉiuj elstaraj rajdistoj de la komunumo kaj multaj paŝtistoj en belaj vestoj venis de diversaj paŝtejoj por ĝin rigardi. Kiam ni atingis la konkursejon, tie prezentiĝis la gejunula ludo.

Post kiam mi rigardis konkurson de paroj da gejunuloj kaj estis en gajeco, subite venis al mi unu kazaĥa junulino sur ĉevalo. Ŝi havas ruĝajn vangojn kaj portas ĉapon sur la kapo kun starigita plumo kaj arĝentajn ornamajojn sur la brusto. Ŝi deĉevaliĝis kaj ridete rigardis min. Mi ne komprenis ŝian intencon nek sciis kiel fari. La vicestro de la popolkomunumo apud mi per kubuto puŝetis min kaj diris en la han-a lingvo: "Ŝi invitas vin partopreni en la ludo." La vortojn tuj aplaŭdis la ĉirkaŭaj paŝtistoj. Tio forte embarasis min: Kiel mi, kun ne tre bona rajdarto, kuraĝas konkursi kun elstara kazaĥa rajdistino? Se mi estus unufrape deĉevaligita de la junulino, tiam mi fariĝus ridinda antaŭ la publiko. Mi dankis la junulinon kaj diris al la vicestro: "Mi ne lertas en rajdo!" Sed li diris: "Nia kazaĥa junulino invitas



Gejunula rajdludo

vin al rajdkonkurso, tio montras nian respekton al han-aj kama-  
radoj. Se vi rifuzus la inviton,  
tio signifus, ke vi ne respektus  
nin kazaĥojn.” Li donis al mi  
sian ĉevalon kaj diris: “Surĉe-  
valiĝu! La junulino ne povos  
vin kuratingi kaj vi venkos  
certe.” La persista invito estis  
malfacile rifuzebla, mi devis per  
mia tuta kuraĝo rajdi sur la alta  
blanka ĉevalo.


Mi kaj la junulino kune galo-  
pis al la returna punkto, survoje  
dirinte neniun vorton pro kora  
streĉiteco. Mi klare sciis, ke mi

devas ĉiel rapide forkuri por  
eskapi de la vipado de la  
junulino, post kiam ni atingis la  
returnan punkton. Tial mi forte  
vipis mian ĉevalon kaj ĝi rapide  
kuris, kiel sago forlasita de  
pafarko, al la fina punkto.  
Rajdante sur la ĉevalo, mi aŭdis  
nur ventoblovon ĉe la oreloj kaj  
pensis, ke la junulino certe ne  
povas min kuratingi.

Post kurado de 200-300  
metroj, mi alproksimiĝis al la  
rigardantoj kaj mi aŭdis aplau-  
dojn unu post alia. Mi opiniis,  
ke la rigardantoj aplaŭdas min

pro mia rapida kurado, kaj fiere  
retrorigardis la junulinon multe  
postlasitan. Sed mi surprizite  
trovis, ke la skarлата ĉevalo de  
la junulino jam kuratingis mian  
blankan ĉevalon kaj tuj galopis  
apud la mia. La junulino unu-  
mane tenis la bridon kaj alima-  
ne svingis la vipon. Anstataŭ  
vipado ŝi min rigardis kun  
rideto. Nur tiam mi komprenis,  
ke la nova epoko freŝigis la  
rajdludon. La aplaŭdado de  
la rigardantoj ja estis varma  
aklamado al la rajdludo.  
kiu manifestis naciecan unuiĝon  
sur la Balikun-a stepo.

## KARIKATURO




En la Oka kaj Naŭa de Marto

de ADA

## Atento Unuflanka

de LU MIAOKUN



## Eskortado de Honoraj Gastoj

(Tiu ĉi verko gajnis apartan premion en konkurso de internaciaj karikaturoj aranĝita de la redakcio de la japana ĵurnalo "Yomiuri Shinbun".)

de JIANG FAN

## KIU ESTIS LA UNUA VOJAĜISTO AL MEKSIKIO?

**N**E estis Hernan Cortes\*, kiu la unua surpaŝis la teron de Meksikio. Ĉirkaŭ 1,000 jaroj antaŭ ol eŭropanoj povis tion fari, iu ĉino jam vizitis tiun landon.

En la kuranta jarcento ĉinaj kaj fremdlandaj historiistoj plurfoje elmetis tiun tezon. Kaj nun ĝi denove vekis intereson ĉe sciencaj rondoj kaj liberalaj profesiuloj.

La tezo baziĝas sur tio, ke laŭdire en 499 p.K. ĉina bonzo Huishen faris neimageblan vojaĝon, kiu okazis je 993 jaroj pli frue ol la malkovro de Ameriko fare de Kolumbo.

Neniu scias, kiel Huishen atingis Nord-Amerikon, eble ŝipe veturinte trans Pacifikon, eble transirinte la glaciĝintan Bering-markolon, kiu ligas la kontinentojn de Azio kaj Ameriko.

Neniu povas klare scii, kiu loko estas "Fusang" menciita de Huishen. Ĝi ne havas specialan sencon en la ĉina lingvo, do ni supozu, ke ĝi estas loko vizitita de Huishen siatempe.

Tiun tezon firme kredis la forpasinta ĉina ĵurnalisto kaj historiisto Deng Tuo. Li iam estis ĉefredaktoro de la ĉina ĉefa tagĵurnalo "Renmin Ribao".

En "Noktaj Babiloj ĉe Yan-shan" verkita de li en 1961, li citis kelkajn ekstraktojn el la ĉina literaturo pri la antikva historio, en kiu troviĝas viva kaj elokventa priskribo pri vojaĝo de Huishen al Fusang en la 54-a volumo de "Kroniko de

Liang" (Liang estas unu ĉina dinastio 502-557 p.K.) kompilita de ĉina historiisto Yao Silian (557-637 p.K.) en la frua periodo de Tang-dinastio:

"En 499 p.K. ĉina bonzo Huishen revenis de Fusang-lando al Jingzhou (nun urbo de Hubei-provinco)." Li havis jenajn vortojn: "Fusang sin trovas oriente je pli ol 10,000 kilometroj for de Han-regno. Ĝi akiris sian nomon pro sia abundo de fusang-arboj. La folio de la arbo similas tiun de tung-arbo, la arbido estas manĝebla kiel bambuido, ĝia ŝelo povas esti uzata por teksado kaj domkonstruado kaj kiel papero. La lando ne havas urbomuron, ĝi havas sian propran skriban lingvon."

"Kiam la reĝo ekskursas, lin antaŭiras kornoblovanĵoj kaj tamburantoj, kaj liaj vestoj estas ŝanĝitaj laŭ la sezonoj."

"Tie estas bovo kun tre longaj kornoj, kiuj estas uzataj por porti objektojn, . . . ĉevalĉaro, bovĉaro kaj cervoĉaro. La landanoj bredas cervojn, kiel la ĉinoj bovojn, kaj faras fromaĝon el lakto. Produktiĝas fusangpiroj, kiuj ne putriĝas dum la tutaj jaroj, kaj abundas vinberoj. Tie ne estas fero, tamen sin trovas kupro. Tie ne alte valoras oro kaj arĝento, nek estas luo kaj komerco."

"Koncerne al geedziĝo, la fianĉo devas loĝi ekster la domo de la fianĉino kaj faras purigadon matene kaj vespere. Se la fianĉino ne enamiĝas al li post

jaro, ŝi lin forpelas kaj se ŝi lin amas, ili geedziĝas."

Klarigante tiun noton, Deng Tuo montris, ke ankaŭ en aliaj historiaj kronikoj troviĝas notoj pri vojaĝo de ĉinaj budaistoj al Ameriko tra Aleutoj kaj Alasko.

Li opiniis, ke Huishen estis siatempa eminenta klera bonzo, sed ne ordinara budaisto. Multaj produktaĵoj kaj moroj kaj vivkutimoj en Fusang priskribitaj de Huishen ja tre similas al tiuj priskribitaj en historia literaturo pri Meksikio en la frua periodo.

Deng Tuo diris, ke fusang-arbo estas efektive agavo — iu speco de kanto en Meksikio. Ĝi maturiĝas kaj ekfloras nur post mult-jara kreskado kaj baldaŭ velkas. Tiam ĉiuj nutraĵoj kaj vestaĵoj de la meksikianoj ĉerpiĝis el tiu planto.

Deng Tuo montris ankaŭ, ke multaj grandaj sovaĝaj bovoj kun tre longaj kornoj sin paŝtis ĉie sur la stepo de Meksikio, kiel "Kroniko de Liang" priskribis. Krome, antaŭ ol eŭropanoj atingis Amerikon, tie jam troviĝis sovaĝaj vitoj.

Iu artikolo en "Monda Geografio" eldonita en 1932 diris, ke kiam la eŭropanoj ĵus atingis Amerikon, ili nomis ĝin "Vine land" (vitlando).

En la pasinteco oni opiniis, ke estis hispanoj kiuj transportis ĉevalojn al Sud-Ameriko. Sed Deng Tuo diris, ke animalaj ostoj elfositaj de arkeologoj montris, ke longe antaŭ la

alveno de la eŭropaj “konkerintoj”, jam vivis ĉevaloj en Ameriko.

Nombro da memorŝtonoj kun gravuritaj vortoj eltrovitaj en Meksikio tre similas al tiuj de la maŭzoleoj de Ming-dinastio en Nanjing (Nankino) en orienta Ĉinio. Inter ili troviĝas granda ŝtona testudo kun alteco de 8 futoj kaj pezo de pli ol 20 tunoj kaj kun multaj gravuritaj ideografiaĵoj. Iuj arkeologoj asertis, ke en ili evidentiĝas influo de Ĉinio.

“Indianoj en Ameriko” eldonita de la Sovetunia Akademio de Sciencoj montris, ke la antikvaj meksikianoj kaj peruanoj scipovis fandi oron, arĝenton, platenon, kupron kaj bronzon, sed ne feron. Tion konfirmis ankaŭ Huishen per sia observado.

En “Kroniko de Liang” troviĝas ankaŭ interesa materialo pri kodo de Fusang kaj ĝi tre similas al tiu de la antikva Meksikio.

Huishen diris: “Tie troviĝas norda kaj suda malliberejoj. La suda malliberejo estas por teni malgravajn krimulojn kaj la norda por la gravaj. Amnestio povas esti donita al punatoj en la suda malliberejo, sed neniam al tiuj en la norda. La geviroj en la norda malliberejo povas pariĝi kaj ilia filo devas fariĝi sklavo en la aĝo de 8 jaroj kaj ilia filino sklavino en la aĝo de 9 jaroj. La punatoj mem neniam ricevas liberon dum la tuta vivo.”

Iu artikolo en “Geologia Revuo” eldonita en 1913 diris, ke la delikata argila statuo trovita en Meksikio havas nenian diferencon de tiu de ĉino en aspekto kaj ĝia vesto similas al

tiu farita en la dekkelka jarcento de Ĉinio.

La artikolo atentigis ankaŭ la similecon de indianoj kaj ĉinoj en lingvo kaj korpo.

Nun oni ĝenerale opinias, ke indianoj en Ameriko devenas de Azio. Ili siatempe piediris tien trans la glaciiginta Bering-mar-kolo antaŭ pli ol 20,000 jaroj kaj poste disloĝis en la tuta kontinento de Ameriko.

Deng Tuo ne estas la unua kiu elmetis la tezon, ke Ĉinio jam trovis Meksikion antaŭ 1,500 jaroj. En la 30-aj jaroj de la dudeka jarcento historiistoj kaj arkeologoj en kaj ekster Ĉinio varme diskutis tiun vidpunkton. Frue en la komenco de la 50-aj jaroj la forpasinta ĉina historiisto Zhu Qianzhi elmetis multajn novajn tezojn por certigi tiun hipotezon.

### NOVA ATESTAĴO PRI PLEJ FRUA ALVENO DE ĈINOJ AL AMERIKO

Antaŭ nelonge arkeologo de la usona Universitato de San Diego D-ro James Robert Moriarty skribis al la ĉina fama arkeologo Jia Lanpo: “Serio da novaj eltrovoj komencis liveri novan atestajon pri la transpa-

cifika vojaĝo de ĉinoj antaŭ la tempo de Kristoforo Kolumbo. La atestaĵo estas ŝtonaj ankroj.”

Tiuj ankroj estis eltrovitaj en du fojoj. Unuafoje oni trovis tri artefaritajn ŝtonajn objektojn en malprofunda maro ĉe duoninsulo Palos Verdes de Kalifornio antaŭ tri jaroj, du el ili estis cilindraj en formo kaj la alia en formo de egallatera triangulo. Aliafoje oni elakvigis ĉirkaŭ kabeto Medecino de Kalifornio grandan kaj rondan ŝtonon kun truo en la centro, kiu surhavis maldikan tavolon da mangano.

Moriarty diris: “Sendube, ili estis ankroj uzitaj de Azio en frua periodo.” La konkludo estas bazita sur tio: 1) Ili havas historion de 2,000-3,000 jaroj (kalkulate laŭ la akumulita tavolo de mangano: milimetra dikeco en 1,000 jaroj), 2) Similajn ŝtonajn objektojn oni neniam trovis en la pacifika marbordo de Nord-Ameriko, kaj 3) Laŭ registro, tiaj artefaritaj ŝtonaj objektoj estis uzitaj kiel ankroj en Azio.

*\* Hernan Cortes estis hispana oficiro. Laŭ historia literaturo, li atingis Meksikion en 1519 kaj estis la unua eŭropano, kiu sukcesis tion fari.*

## Kunlaboru!

**T**RADUKO aŭ alimani-  
eraj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur, ke oni notu la fonton kaj sendu al ni 3 ekzemplerojn de la gazeto aŭ alia presajo, en kiu ĉerpajo aŭ

tradukajo el nia gazeto estas aperigita, kaj fotojn pri ekspozicioj en kiuj niaj eldonaĵoj estis montritaj. Per tio vi helpos ne nur nian gazeton, sed ankaŭ la Esperantomovadon en Ĉinio.

LA RED.



## LA ĜENEVA NOKTO DE ESKALADO

Kvankam Ĝenevo jam fariĝis sendependa komunumo en la komenco de la 17-a jarcento, tamen ĝi estis ofte invadita de siaj najbaroj. En profunda nokto de la 11-a de decembro, 1602, regis fulga mallumo. Ĝia malica najbaro la duko de Savoy kolektis milojn da dungitaj soldatoj por surprizi la dormantan urbon kaj ĝin konkeri. Sed la ruzaj atakantoj ne povis eskapi la gvataĵon de la viglaj sentineloj de la urbo. Kiam la dungitaj soldatoj estis grim pantaj la urbomuron per eskaloj, ekbruegis ĉiuj sonoriloj de la katedralo, kaj je la alarmino la civitanoj tuj prenis siajn armilojn kaj sin ĵetis en batalon por defendi la urbon. En tiu batalo aperis multaj heroinoj, inter kiuj estis iu virino nomata Royaume. Tiunokte, ŝi estis preparanta manĝaĵon en kuirejo. Aŭdinte la alarman sonoradon, ŝi haste puŝmalfermis fenestron por vidi, kio okazas. Ho, soldatoj de la duko de Savoy estis ascendantaj sur la eskaloj! En la danĝera momento, subite en ŝian kapon venis ruza ideo. Ŝi levis poton kaj verŝis la bolantan supon al la malamikoj, kaj poste ĵetis la poton al la kapo de iu malamiko. Dank' al la brava luktado de la solidaraj popolanoj de Ĝenevo, fine la invadantoj estis venkitaj. Kaj pro tiu historia okazaĵo tiu tago fariĝis la festo de eskalado, kiu estas celebrata ĉiujare por memorigi la patriotisman batalon de la Ĝeneva popolo.

En la pasinta jaro, celebrado de tiu festo komenciĝis en la 7-a de decembro. Vespere de la 9-a, en la urbo-centro okazis manifestacio riĉa je naciaj koloroj. La partoprenantoj ĉiuj portis tradiciajn kostumojn de

Ĝenevo. Fronte de la kolonoj iris honora gvardio, kaj en ili estis kavalerianoj, kavaliroj, virinoj kaj infanoj. En impona muziko de marŝo, la kavalerianoj kaj kavaliroj trapasis bravpoze la movoplenajn stratojn, kun lancoj en mano kaj puŝante pezajn antikvajn kanonojn antaŭe uzitajn. La infanoj alte tenis torĉojn, dum la virinoj portis subbrake korbojn plenajn de legomoj por montri, ke ili subtenas la batalantojn. Dekoj da miloj da urbanoj en la frosta vento starantaj ambaŭflanke de stratoj huradis kaj salutadis al la manifestaciintoj.

Dum la festado, la urbanoj okazigas kunvenojn, koncertojn kaj vesperkunvenojn kun kampfajro kaj en iuj restoracioj de la urbo oni preparas por la klientoj "supon de onklino Royaume". En sukeraĵoj oni povas havigi al si "poton de onklino Royaume" zorge faritan el ĉokolado. Multaj familioj de Ĝenevo aĉetas tian poton kaj ordonas la plej junan membron ĝin rompi per tranĉilo, kaj poste la familianoj sin regalas per ĝiaj fragmentoj kaj la bombonoj en ĝi, por celebri la venkon de la prapatroj super la invadantoj.





### URBO DE ALUMETOJ

La impetan disvolviĝon de la tekniko de ekbruligiloj oni ŝuldas al la moderna kemiindustrio. En la komenco de la 19-a jarcento aperis la unua skatolo de alumetoj en la mondo. Tiam la kapo de la alumetoj estis farita el blanka fosforo, kiu estas venena. En la jaro 1844, prof. Gustaf Pasch de Stokholmo elfaris alumeton kun kapo el sulfuro kaj ricevis patenton por tio. Kaj krome li ankaŭ inventis specon de frotsurfaco priŝmirita per ruĝa fosforo. En 1852, J. Lundstrom faris plibonigon al la tiama sekura alumeto kaj fondis en la sveda urbo Jönköping la unuan subĉielan alumetan farejon.

Dum la disvolviĝo en la sekvan-taj jardekoj, la alumeta fabriko de Jönköping faris nombron da maŝinoj, kiuj pretigis kondiĉojn por grandskala produktado de alumetoj. En 1917, fondiĝis limigita alumeta kompanio por la tuta Svedio.

La urbo Jönköping situas en la suda parto de Svedio. En la centro de la urbo estas blanka ligna du-etaĝa domo. Ĝuste en tiu konstruaĵo naskiĝis, antaŭ pli ol cent jaroj, la nova produktajo sveda sekura alumeto, kio faris sensacion en la tuta mondo. Hodiaŭ tiu konstruaĵo jam fariĝis Muzeo de Alumeta Historio kaj pro tio Jönköping diskoniĝis kiel "urbo de alumetoj".

### PARKO DE VULKANO

En oktobro, Novzelando prezentas belan bildon de printempo. La mirinda naturo kaj la lertaj manoj de la novzelandaj popoloj kune kreis plurajn originalajn vulkanajn parkojn en tiu lando. Tangariro-parko sur la Norda Insulo estas unu el ili.

En tiu parko sin trovas 15 krateroj, inter kiuj estas 3 famaj aktivaj. La impona montaro kaj la vulkana spektaklo altiradas al si turistojn el ĉiuj partoj de la mondo.

En Tangariro-parko ĉie videblas diversaj signoj de terovarmo kiel bolaj fontoj, intermitaj fontoj, vaporŝprucigaj truoj kaj lagoj kun

bolanta ŝlimo. En vintro, la varmaj fontoj kun tre klara akvo kaj konvena temperaturo estas naturaj naĝejoj. En kratera lago troviĝas insulo kun lageto en la mezo, ĝi aspektas tre ĉarma dank' al arta aranĝo.

La hoteloj kaj vendejoj en tiu loko ĉiuj utiligas terovarmon en varmigo de siaj domoj. Puto kun profundo de dekoj da metroj povas elŝpruci vaporon varman je pli ol 100° C. uzeblan por varmigo de domo kaj aliaj vivbezonoj. Pli interese estas, ke ekskursantoj povas utiligi "terovarmajn vaporumilojn" en la parko por pikniko. Oni povas prepari per ili ne nur terpomojn sed ankaŭ ŝafajon!



### PROGRESADO DE LA ĈINA INDUSTRIO

Lastatempe la ĉina industrio havis plian disvolviĝon. En januaro de la kuranta jaro, la taga meznombra produktovaloro de Ĉinio pliiĝis je 8.7% kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro. Ekzemple, la produktokvanto de karbo pliiĝis je 8.9% kaj tiu de elektro je 10.8%. La tutlanda meznombra produktovaloro de la malpeza kaj tekstila industrio per 17% superis tiun de januaro de 1979 kaj kreskis de 43% ĝis 46.1% el la totala industria produktovaloro de Ĉinio.

### DU NOVAJ PETROLKAMPOJ

Dongpu-petrolkampo, kiu estas nove trovita de Ĉinio, situas ĉe la limo de la provincoj Shandong (Ŝandong) kaj Henan kaj kovras 9 guberniojn sur ambaŭ bordoj de Huanghe-rivero (Flava Rivero). Jam estas boritaj pli ol 200 putoj por produktado, enpumpo de akvo kaj esploro. La petrolkampo havas

plurajn, riĉajn gaspetrolajn tavolojn, kiuj estas malprofundaj kaj la nafto entenas malmultan sulfuron kaj havas malaltan specifan pezon.

La alia nova petrolkampo sin trovas en la sudokcidenta parto de Qaidam-baseno. Tie oni jam boris 26 putojn esplorajn, el kiuj 20 atingis gas-petrolan tavolon. Kaj du el ili produktas ĉiutage po 100 tunojn da nafto kaj 10,000 kubmetrojn da gaso.

### CHONGQING-A ŜOSEA PONTEGO FINKONSTRUITA

Tiu pontego super Changjiang (Jangzi)-rivero el tridirekta antaŭpremita ŝtalbetono estis finkonstruita la 8-an de februaro. La pontego longas je 1,100 metroj kaj larĝas je 21 metroj. La spano inter ĝiaj ĉefaj pilieroj kun distanco de 174 metroj estas la plej longa el la nunaj ŝoseaj pontoj en Ĉinio, kaj la pilieroj altas je 50-60 metroj. Eĉ post konstruo de alta digo ĉe la Tri Gorĝoj de la rivero, granda ŝipo povos libere navigacii dum inundo. Post sia malfermo al trafiko la pontego povos sekure trapasigi 210-tunan remorkon.





## BEIJING KAJ NOVJORKO, TIANJIN KAJ FILADELFIO FARIĜIS FRATINAJ URBOJ

En la 25-a de februaro, Lin Hujia, la urbestro de Beijing kaj Edward Koch, la urbestro de Novjorko, subskribis en Beijing (Pekino) interkonsenton por starigi inter ambaŭ urboj rilatojn de fratinaj urboj. Ili ankaŭ faris amikan interparolon pri komercado, kulturaj interŝanĝoj k. a. inter la du urboj.

Ankaŭ Tianjin (Tiangin) kaj Filadelfio fariĝis fratinaj urboj. Pro tio Chen Weida, la urbestro de Tianjin, kaj William Green, la urbestro de Filadelfio, telegrafe gratulis unu la alian en la 11-a de la sama monato.

## EKSPOZICIOJ DE ĈINAJ ARTAĴOJ EN ITALIO

En februaro la ekspozicio de ĉinaj novjaraj pentraĵoj okazis sinsekve en la Muzeo de la Tutlanda Tradicio de Populara Arto en Romo kaj en suda urbo Bari sub aŭspicioj de la Itala-Ĉina Amikeca Asocio. Elmontriĝis en la ekspozicio tradiciaj kaj modernaj novjaraj pentraĵoj de Yangliuqing (en Tianjin), Meihuawu (en Suzhou) kaj Weifang (en Shandong). Tiuj pentraĵoj kun brilaj koloroj kaj vivecaj figuroj prezentas la varian kaj enhavoriĉan vivon de la ĉina laboranta popolo. Ankaŭ la ekspozicio de ĉinaj infanpentraĵoj kaj tiu de ĉinaj lignogravuraĵoj okazis en aliaj urboj de Italio.

## FAMA USONA PIANISTO DANIEL POLLACK EN BEIJING

En januaro s-ro Daniel Pollack vizitis Beijing, tie li sukcese ludis "Sonaton n-ro 26" de nuntempa usona komponisto Samuel Barber kaj ricevis varman aplaŭdon de ĉinaj aŭskultantoj. S-ro Pollack estas profesoro de la Universitato de Suda Kalifornio kaj plurfoje premiita en internaciaj konkursoj.

## DELEGACIO DE ĈINAJ MUZULMANOJ VIZITIS IRANON

Invitite de la irana registaro, la Delegacio de Ĉinaj Muzulmanoj estrata de Zhang Jie, vicprezidanto de la Ĉina Islama Asocio faris dusemajnan viziton al Irano en februaro. La delegacio partoprenis en la aktivecoj de la irana registaro por celebri la komencon de la 15-a islama jarcento kaj la unuan datrevenon de la islama revolucio de Irano. La religia gvidanto Khomeini kaj prezidanto Abolhassan Bani Sadr de Irano akceptis la ĉinan delegacion.

## ĈINA GLACISKULPTAĴO "NEZHA TUMULTIGAS LA MARON" RICEVIS PREMION

Glaciskulptaĵo prezentanta ĉinan tradicion miton "Nezha Tumultigas la Maron" estas premiita pro sia "nacia karaktero" en la Oka Internacia Konkurso de Glaciskulptaĵoj okazigita februare en Quebec, Kanado.

En la konkursejo, milojn kaj milojn da rigardantoj allogis la eksterordinara ĉina glaciskulptaĵo: Sur la dorso de grandega drako rajdas diketa knabo

Nezha, kiu alte tenas magian ringon en unu mano kaj per la alia firme kaptas la drakokapon; kaj la drako kun skvamoj brilantaj en la sunradioj, levante sian kapon kaj kurbigante sian korpon, ekflugi provas, sed ne povas.

La konkurso de glaciskulptaĵoj estas unu el la ĉefaj aktivecoj de la vintra festivalo en Quebec. Ĉi-jare en ĝi partoprenis teamoj el Italio, F. R. Germanio, Francio, Hispanio, Britio, Usono, Ĉinio kaj Kanado, kaj ankaŭ Quebec-provinca kaj Eskima teamoj de Kanado. La unuan lokon gajnis la itala teamo, ĉampiono de la lasta konkurso.

## EKSPOZICIO DE ĈINAJ KALIGRAFAĴOJ MALFER- MIĜIS EN TOKIO

La 14-an de februaro, en Isetan-artgalerio de Tokio malfermiĝis la ekspozicio de ĉinaj kaligrafiaĵoj, kiun organizis la Japana Asocio por Prosperigo de Internaciaj Artoj kaj Kulturo kaj Japana-Ĉina Kultur-interŝanĝa Asocio.

Estis elmontritaj verkoj de 110 ĉinaj kaligrafoj, kiuj apartenas al Ming- kaj Qing-dinastioj kaj nuna tempo. La partoprenantoj de la inaŭguro kun granda intereso aprecis la valoregajn kaligrafiajn artaĵojn.







## LA UNUA 75-TUNA ELEKTRO-ARKA FORNO EN ĈINIO

La elektro-arka forno, kiu povas fandi unufoje 75 tunojn da altkvalita ŝtalo, estas sukcese provfarita de la Xi'an(Hi'an)-a Transformatora kaj Elektro-forna Fabriko sub helpo de la Xi'an-a Elektro-forna Instituto. Tiu nova produktaĵo estas uzata speciale por provizi 600,000-kilovatan generatoraron kaj aliajn pezajn ekipaĵojn per muldajoj de altkvalitaj ŝtal-aloj. La forno altas 16 metrojn kaj pezas 520 tunojn.

## HIBRIDA RIZO EN ĈINIO

Laŭ statistiko de la Agrikultura Ministerio, en 1979 la areo de plantita hibrida rizo atingis pli ol 5,000,000 hektarojn, nome ĝi estis je 1.5-oblo pli granda ol tiu en 1978. Tia rizo donis rikolton pli abundan kun kresko je 20-30 procentoj kompare kun la ordinara. La produktokvanto de hibrida rizo lastjare kreskis je 3,900,000 tunoj kaj okupis trionon de la totala produktokvanto de la pliigita greno de la lando. La hibrida rizo estis elkulturita en Ĉinio en 1973 kaj komencis vastaree plantiĝi en 1975.

## PROSPERIGANTA MERKATO DE FLANKMANGAĴOJ

Dank' al restariĝo kaj disvolviĝo de la agrikultura produktado, nia kamparo liveras pli multe da flankmangaĵoj al la urboj. Lastjare la ŝtato sume aĉetis pli ol 129,000,000 porkojn kaj la konsumkvanto de porkaĵo pliigis je 29% kompare kun tiu en 1978. La aĉetkvanto de bovoj kaj ŝafoj kaj la vendokvanto de ilia viando ankaŭ havis grandan kreskon. Pli ol 669,000,000 kg. da ovoĵoj estis forvenditaj lastjare, kun pliigo de 11.2% kompare kun tiuj en 1978. Ankaŭ la konsumkvanto de iuj industriaj produktaĵoj kun agrikulturaj flankokupaj produktaĵoj kiel krudmaterialo, ekzemple sukero, brando kaj biero, havis rimarkindan kreskon en 1979.

# NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ DE ĈINIO

## Konstrui Novan Ponton

(88ES-156-S)

37 bildpaĝoj 16.5 × 19 cm.  
Prezo: £0.35 US\$0.65

## Nova Vesto de la Pupo

(88ES-159-P)

12 bildpaĝoj 18 × 20.8 cm.  
Prezo: £0.22 US\$0.40

## Sportistetoj

(88ES-160-P)

20 bildpaĝoj 18 × 20.5 cm.  
Prezo: £0.22 US\$0.40

## Ĉion Faru Mem Ni Ĉiuj

(88ES-161-P)

10 bildpaĝoj 17.7 × 20.5 cm.  
Prezo: £0.22 US\$0.40

Tiu ĉi serio da bildrakontaj libroj por infanoj prezentas spiriton kaj vivon de ĉinaj infanoj en infanĝardeno.

**ELDONINTO:** Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

## ĜENERALA DISTRIBUANTO:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

MENDU ĈE LA PERANTOJ AŬ REKTE ĈE LA ĜENERALA DISTRIBUANTO

## Aŝma

(rakonto en versoj)

(10ES-253-S)

“Aŝma” estas popola eposo de sani-nacieco en Yunnan (Junnan)-provinco de Ĉinio. Ĝi varme prikantas diligentan kaj belan sanian junulinon Aŝma, kiu brave batalis kontraŭ perforta edzinigo.

La lingvo estas simpla kaj bela kaj karakterizita de nacieca gusto.

La libro estas ilustrita per koloraj bildoj.

84 paĝoj 16 × 18 cm.  
Prezo: £0.95 US\$1.95

## Rakontoj pri Fantom-spitantoj

(10ES-442-P)

Tiu libro kolektis 35 ĉinajn antikvajn rakontojn. Ĝi pri-skribas saĝon kaj sentimecon de antikvaj ĉinoj, kiuj kuraĝis insulti, forpeli, bati kaj kapti fantomojn.

94 paĝoj 11.8 × 18.5 cm.  
Prezo: £0.45 US\$0.90

# Favorajn kondiĉojn profitu!

## Abonu kaj abonigu!

En majo de 1980 venos la 30-a datreveno de la naskiĝo de "El Popola Ĉinio". Renkonte al tiu jubileo ni decidis havigi al la esp-istaro ŝancon aboni EPĈ-on je favoraj kondiĉoj dum la periodo de majo ĝis aŭgusto. Ĉiu, kiu sukcesos varbi abonantojn por ni, ricevos donacojn laŭmerite.

Dum la pasintaj 30 jaroj nia revuo ricevis varman subtenon de ĉiulandaj esperantistoj. Inter ili troviĝas niaj konstantaj abonantoj, abonigantoj kaj perantoj. Ni kore dankas ilin ĉiujn pro subteno al nia laboro. Ni sincere esperas, ke ĉiuj niaj esperantistoj-amikoj vaste diskonigos nian nunan varban kampanjon kaj aktive varbos al ni novajn abonantojn.

Ĉiu, kiu abonos la revuon en tiu ĉi periodo, senpage ricevos speciale faritan insignon "EPĈ-amiko" kaj ekzempleron de la kolora bild-kolekto "El Novaj Ĉinstilaj Pentraĵoj". Ni donace sendos ankaŭ aliajn memoraĵojn al la perantoj kaj abonigantoj, kiuj varbos al ni novajn abonantojn.

Abonu ĉe: peranto de El Popola Ĉinio en via lando

Universala Esperanto-Asocio

Esperanta Sekcio de GUOZI  
SHUDIAN, P.O. Kesto  
313, Beijing, Ĉinio

Redakcio de El Popola Ĉinio  
Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

## ABONTARIFO DE E. P. Ĉ.

(Validas ekde la 1-a de Majo 1980)

L a n d o	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj	L a n d o	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	14.40	Svisio	SF	10.50	17.60	26.40
Aŭstrio	Sch	81.60	136.00	204.00	Usono	US\$	6.00	10.00	15.00
Belgio	BF	180.00	300.00	450.00	Kanado	Can\$	7.20	12.00	18.00
Britio	£	3.00	5.00	7.50	Por aliaj landoj en Eŭropo:				
Finnlando	FMK	24.00	40.00	60.00		£	3.00	5.00	7.50
Francio	FF	26.40	44.00	66.00		US\$	6.00	10.00	15.00
FR Germanio	DM	10.80	18.00	27.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj				
Italio	Lit	5280	8800	13200	Latin-Ameriko:				
Japanio	Yen	1400	2800	4000		£	2.20	3.60	5.40
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	16.80		US\$	4.30	7.20	10.80

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN


P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Rozo

de sveda esperantis-  
to s-ro C. GRAHN

FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ



Berberiso

Malnova Lago



# Muro kun pentraĵo

Adaptita laŭ la ĉina klasika verko "Liao Zhai Zhi Yi"



1  
Meng Longtan kaj Zhu Xiaolian venis en templon kaj vidis sur ĝia orienta muro pentritajn feinojn, el kiuj unu kun knabina hararango sur la kapo tenis floron en la mano.



2  
Zhu fiksas sian rigardon longe sur la pentraĵo kaj eksentis sin leviginta sur la muron kaj ŝajne tirita de iu je la vesto. Turninte la kapon li vidis la feinojn kun floro.




3  
Sin turninte la feino lin rigardis ridetante kaj svingetis al li la floron en la mano, kaj li rapidis al ŝi.



4  
Ili eniris en dometon senhoman. Zhu haste alpaŝis kaj ŝin brakumis por sin plezurigi kaj la lasta ne rifuzis.



5  
Poste ŝi foriris, dirante, ke li ne bruu kaj ŝi revenos nokte. Tiel pasis du tagoj.




6  
Siaj amikinoj tion rimarkis kaj ŝerce urĝis ŝin ŝanĝi la hararangoŝon por montri sin edziniginta.



7  
En la okuloj de Zhu la feino kun hartubero alte kombita sur la kapo fariĝis pli bela ol antaŭe.



8  
Ili ĉronis en volup-  
toĝuo.




9  
Subite aŭdiĝis forta paŝbruo kaj la feino eksaltis de teruro.




10  
Ili ŝtelrigardis ekster la pordon kaj vidis feon en kiraso venantan por traserĉo.



11  
La feino forte teruriĝis kaj forkuris kun pala vizaĝo.



12  
Tiam Meng Longtan trovis Zhu forestanta kaj demandis la bonzon. La lasta diris: "Li estas aŭskultanta predikon!" kaj fingrofrapis la muron. Jen Zhu malsupreniris de la muro.



山村小院  
丙午年  
六月  
于北平

